

CLAUDE PIRON

LA
BONA
LINGVO


-IEM-

CLAUDE PIRON

LA
BONA
LINGVO

CLAUDE PIRON

LA
BONA
LINGVO



Vieno: IEM 1997

Piron, Claude: La bona lingvo.

2-a eld.

Vieno: IEM 1997.

Kovrilo: Miguel Gutiérrez Adúriz

ISBN 3-901752-11-7

Internacia Esperanto-Muzeo

Hofburg, Michaelerkuppel

A-1010 Vieno

1. ENKONDUKE

La bona lingvo

Pri la bona lingvo mi babilos kun vi, se vi konsentas. „Bona kiurilate?“ vi demandas sendube, konscia pri la multaj sencoj de tiu vorto. „Ĉiel,“ mi respondas. Ĝuste tion mi ŝatas pri tiu lingvo, ke laŭ tiom da aspektoj ĝi bonas al mi.

Bona en la senco *bongusta*, ekzemple. Mi ĉerpas ĝuon el ĝi, kompareblan kun la plezuro, kiun havigas bona manĝo aŭ vino riĉ-aroma. Bona kiel *bona muziko*: oreplaĉa, melodia, ĝojdona per la simpla harmonio de siaj sonoj. Bona, kiel oni parolas pri *bona ŝerco*: trafa mi trovas ĝin, kapabla bele kaj laŭcele tuŝi. Bona, kiel *bona okazo*. Vi sopiris havi libron elĉerpitan, kaj jen hazarde en brokanta librejo vi trovas ĝin. Ne perfektan: iom malkulitan, kaj kun unu aŭ du paĝoj ete ŝiritaj. Sed ĝi malmulte kostas, kaj vi akceptas ĝin kiel trezoron. Simile, esperanton oni povas senti trezoro: ne perfekta, tute certe, sed tio estas bonaĵo; se perfekta, ĝi impresus malpli home. Gravas, ke ĝi kontentigas, ĉar ĝi respondas al sopiro. Bona trovaĵo multaj sentas ĝin.

Morale bona, ankaŭ, ĉar ĝi havas konsideron por la etuloj, por tiuj, kiuj ne apartenas al prestiĝaj kulturoj aŭ al favorata sociklaso. Estas pensige vidi, kiel altranguloj miskomprenas sin reciproke, fuŝ-uzante lingvojn, kiujn ili ne regas, aŭ kiel ĝenate ili rilatas inter si pere de tradukistoj, malgraŭ la longaj studoj, la potenco, la povo ne ŝpari. Dum ĉe ni plej ordinaraj homoj, sen mono, sen diplomoj, interkompreniĝas kvazaŭ propralingve. Jes, morale bona, ĉar ĝi montriĝas pli justa ol iu ajn alia metodo interkulture komuniki.

Psikologie bona. Ĝi estas kvazaŭ modelo de psika sano. La plimulto el la lingvoj estas nek tre konsekvencaj, nek tre liberaj. Sed nia bona lingvo portas koheron al plej alta supro, kaj lasas al ni pli da libera elekto, en la maniero esprimi nin, ol iu ajn alia komunikilo. Tre rigora ĝi estas, kaj postulas disciplinon (ni nur pensu pri la *n-finaĵo*), sed kadre de tiu rigoro, kiom da libereco ĝi havigas al ni! En kiu lingvo eblas elekti laŭplaĉe inter *mi vin dankas*, *mi dankas vin* kaj *mi dankas al vi*? Inter *li ludas gitaron kun fervoro* kaj *li fervore gitaras*? Precize la rigora senco de la

finajoj liberigas la koron kaj la menson, stimulas kreemon fekunde. Tial spontaneco trovas en ĝi eblojn plene disvolviĝi, kiuj ne havas similon alilingve. Kiu scias tiel bele akordigi rigoron kun libereco, penson kun sento, tiu estas psike enviinde sana.

Bona en la senco *bonkora*. Helpema, kiel *bona amiko*. Kiom da problemoj ĝi helpas solvi ĉe vojaĝantoj! Kiom da ĝojo ĝi alportas, vibrigante la korojn samtakte, kreante tiujn okazojn, en kiuj ni interkulture retroviĝas, ĉefe por *amikumi*, laŭ la bela, profunde homa esprimo de Roger Bernard! Kiel bone ni sentas nin, babilante per ĝi! Intensan dankemon mi sentas, kiam mi pensas pri tiu aspekto de ĝia boneco: ĝi stimulas bonajn sentojn, kiuj igas la vivon pli riĉa. Ĝi disradias bonecon.

Bona lingvo, kontraste al malbona lingvouzo. Kion signifas uzi malbonan lingvon? Neklara esprimo, eble. Tamen ni diras, ke tiu aŭ tiu *bone* parolas aŭ verkas, tiu alia *malbone*. Devas esti io ĝusta en tiu juĝo, eĉ se la meza esperantisto ne povus taŭge precizigi, kio. Jes, pli bona lingvo kaj lingvo malpli bona ekzistas tiusence. Sed kio estas la bona lingvo?

Pri tiu *bona* lingvo - en la diversaj sencoj de la vorto - mi ŝatus dividi kun vi la fruktojn de mia meditado. Sed, kiam mi traktos pri punktoj, pri kiuj homoj disopinias, bone konsciui, ke mi esprimos nur mian senton, aŭ la konkludon de mia pripensado, ne „veron“, kiun mi volus trudi, timante, ke, se oni ne respektos ĝin, esperanto disfalos.

Mi fidas je la sana prudento de nia kolektivo. Esperanto, kiel ĉiu vivanta lingvo, prezentas diversajn formojn; ili estas kelkfoje tre rivalaj, ĉar ili spegulas konkurajn konceptadojn pri la esenco de monda komunikilo. Eble du formoj de esperanto kunekzistos senĝene, same kiel nun kunekzistas la brita kaj la usona formoj de la angla. Sed pli probable la historia evoluo favoros unu el tiuj formoj. Miaopinie, neniu aŭtoritato elektos. Decidos, nekonscie, la uzantaro, laŭ ekvilibro inter bezonoj kaj ebloj, inter diversaj manieroj taksii belecon kaj klarecon. Instinkte ĝi trovos, kio plej bone taŭgas por ĉiuj en la lingvo-evoluiga ludo. Tiel ja lingvo disvolviĝas. Kaj, kvankam tion multaj ŝajne ankoraŭ ne rimarkis, esperanto ne plu estas projekto; ĝi estas lingvo.

Jes, pri ĉio ĉi mi dezirus ĉi-verke babili. Sed, eble, unue, mi klarigu, kial.

Iom pri la fono de ĉi tiu verko

De pluraj flankoj oni petas min verki broŝuron por difini mian starpunkton pri esperanto iom pli detale ol en la kelkaj artikoloj, kiujn mi publikigis. Mi tion des pli volonte faros, ĉar mi ricevas, letere aŭ parole, multajn demandojn pri tiu aŭ alia punkto, kaj ofte mi pensis, ke estas bedaŭrinde ne publikigi la respondojn, ĉar, kiel ajn subjektivaj ili estas, ili povas interesi pli ol unuopulon.

Mi ĵus uzis la vorton *subjektiva*. Iom da komentado necesus tiurilate. Mi ŝatus objektivi. Sed de pluraj jardekoj nun mi observadas diskutojn pri lingvoj, en kadroj plej diversaj, kaj ĉiufoje min frapas la konstato, ke objektiveco tiukampe aperas neebla. Kial? Verŝajne ĉar lingvo estas tiel intime ligita al la kerno de nia konscio pri ni mem kaj pri nia identeco, samkiel al la prarilatoj kun tiuj, kiuj instruis al ni paroli (plej ofte la patrino), ke nia sinteno pri ĝi estas multe pli ol intelekta starpunkto, eĉ se tion ni ne povas vidi mem: ĝi estas interplektita kun primitivaj sentoj kaj emocioj kuŝantaj tre profunde en ni, kiuj sen nia scio enmiksiĝas tuj ĉe mencio de lingvo. Tial diskuto pri lingva punkto emas eksciti nin pli ol la situacio pravigus.

Objektivi mi do provos, sed kun plena konscio, ke, plej probable ne prosperos al mi. Por ke vi povu rigardi miajn konsiderojn kun kiel eble plej granda distanco - t.e. por ke vi povu juĝi, kion mi ĉi-sube diros, restante kiel eble plej libera, plej neinflua de mi - mi tuj klarigos la fontojn de mia prilingva subjektiveco. Pli bone komprenante, kiel kaj kial mi alvenis al mia nuna vidpunkto, vi povos pli ĝuste taksi, kiom ĝi validas via-kaze. Mi esperas, ke vi bonvolos afable pardoni tian sinprezenton: ĝi ŝajnas al mi necesa, por ke ĉio estu klara inter ni. Se tiu historio ne interesas vin, transiru tuj al la dua ĉapitro.

Stranga esperantisteco

Mia intereso pri lingvoj sendube fontas el mia junaĝa malkovro de esperanto, kiu okazis jene. Mi estis naŭjara, kiam trafis en miajn manojn multlingva presita papereto, kiu akompanis tiu-epoke (1939, 1940) filmojn produktatajn de la firmao Gevaert. Ĝi entenis du partojn; la dua titoliĝis *Garantio* kaj pri la unua mi memoras nur, ke ĝi komenciĝis per la vorto *Senpaga*. Tiu vorto kvazaŭ hipnotiĝis min, tiom ĝi malsimilis al sia traduko en la aliaj lingvoj. Kaj jen fulme ekkompreno ekbrilis en mi: en mia loka dialekto, ja, *sē* signifas „sen“ kaj *pají* „pagi“. Ke en tiu lingvo kun la stranga nomo (stranga per tio, ke ĝi elvokis nek landon nek popolon) la franca *gratuit* esprimiĝas per unu vorto kunmetita el la ideoj „sen“ kaj „pagi“, tio estis pli ol mirinda: admirinda. Tiusekunde mi enamiĝis al la lingvo. Kaj mi decidis, ke iam mi scios ĝin.

Dum du jaroj mi provis trovi manieron lerni la miraklan lingvon, sed vane. Mi trovis en la granda franca vortaro *Larousse* mallongan klarigon indikantan la funkcion de ĉiu finaĵo, kaj per ĝi mi analizis mian Gevaert- dokumenton, pli kaj pli admire, sed ankaŭ pli kaj pli malĝoja pri la nepovo lerni plu. Unu el miaj onkloj estis siatempe esperantisto kaj ankoraŭ havis librojn pri la lingvo, sed li loĝis malproksime kaj pri lia iama aparteno al la movado mi eksciis nur post pluraj jaroj.

Fakte, min helpis hazardo. En iu subtegmento, amiko trovis malnovan volumon, kiu estis bindita kolekto de revuo porknaba el la jaroj 20-aj. En ĉiu numero troviĝis esperantoleciono. Avide mi jetis min sur ĝin. Post eble tri monatoj mi legis la lastan tekston, kiun mi plene komprenis. Kvankam mi neniam uzis la lingvon aktive, escepte por fari la ekzercojn, mi havis la senton, ke mi nun posedas ĝin. Eble miaj subjektivaj starpunktoj pri la lingvo devenas de tio, ke el tiu iluzio mi neniam resaniĝis. Estis infaneca reago: la fakto, ke mi atingis la lastan lecionon, signifis por mi, ke mia studo nun estas kompleta.

Iusence, ĝi montriĝis kompleta: mi povis per ĝi esprimi ion ajn. La radikaro, kiun mi disponis, estis limigita. Sed la ebloj

kombini, kiujn la strukturoj de la lingvo al mi havigis, estis tiel vastaj, ke mi ne devis peni multe por trovi solvon al ĉiuj esprimproblemoj. Mi bedaŭrinde ne memoras verajn ekzemplojn, sed la sistemo estis jena: se mi bezonis vorton por la koncepto „imagu al vi“ kaj tiu ne troviĝis en mia vortprovizo, neniam mi pensus, ke mi povus enkonduki novan radikon, mi provis esprimi la ideon per la haveblaj elementoj. Mi do diris, ekzemple, *bildigu al vi* aŭ *prezentu al vi*. Se mankis la vorto „traduki“, mi diris *translingvigi* aŭ *alilingvigi* aŭ uzis formon kiel *esperantigi*, *elangligi*, k.s. Fakte, kiel dirite, la du menciitaj radikoj troviĝis en mia vortareto, sed mi tamen uzis ankaŭ la sinonimojn, kiujn mi elpensis, ĉar ĝuste la fekundeco de la vortfara sistemo estis por mi plej dankoveka donaco, senkompare ĝojdona.

Tiutempe, mi ne sciis, ke ekzistas esperantistoj. La plenkreskuloj, kiujn mi demandis pri la verko de Zamenhof, respondis, ke temas pri fiaskinta projekto, aŭ pri speco de eksperimenta lingvo, kiun neniu iam ajn parolis.

Negrave. Mi tiom enamiĝis al ĝi, ke ĝi fariĝis la lingvo plej uzata en mia pensado. Kiam mi estis sola, mi parolis per ĝi laŭtoĉe, por frandi ĝiajn sonojn, kaj probable ankaŭ por la plezuro konstati, kiel kontentige vortoj surprize trafaj spontane formiĝas en mi. Mi ne serĉis tiujn vortojn. Mi nur havis penson, kaj eldirante ĝin, mi mire rimarkis ian novkombinon, kiun mi trovis plaĉa kaj esprima. Kun ĉiu tago kreskis mia admiro al la lingvo. Mi uzis ĝin por verki taglibron, en kiu lokiĝis ankaŭ multaj kantoj kaj poemoj.

Post iu tempo, unu el miaj fratoj lernis la lingvon, kaj, ĉar la cirkonstancoj apartigis nin dum unu jaro, ĝi iĝis tiutempe nia letera komunikilo. Ĝi rolis por ni kiel sekreta lingvo. Perfekte taŭga.

Kaj jen, kiam mi estis 15-jara, sekve al du hazardoj, kiujn detaligi estus tro tede, mi ekkonis la esperanto-movadon. Mi estis ege ĝoja ekscii, ke mia frato kaj mi ne estas soluloj, ke ankaŭ aliaj homoj admiras la zamenhofan mirindaĵon, kaj aktive uzas ĝin. Ve! La unua renkonto estis katastrofa. Mi defalis de plej alte. El la vundo (la *traŭmo* se vi preferas fakjargonon), kiun mi travivis tiufoje, mi neniam resaniĝis. Tiuj franclingvanoj parolis ne tre flue, multaj eĉ preskaŭ balbute, pro nebona

regado de la lingvo, kaj ili uzis, kun terura lastsilaba akcentado, ĉiaspecajn vortojn, kiujn - laŭ mia impresio - ili simple ĉerpis el aliaj lingvoj, ĉefe el la franca, maskante la fremdecon per esperantaj finaĵoj.

Eble jam okazis al vi, ke en malnova urbo vi ege ŝatis placon, ĉar ĝin ame kaj arte aranĝis, antaŭ longe, homoj plej talentaj, kaj jen vi revenas post iom longa restado alilande, antaŭĝojas la revidon kaj... ĉio estas fuŝita. La harmonion de la loko oni mortbatis: malaperis la malnovaj tilioj, kiuj ornamis ĝin kaj plaĉe bonodoris, staras nun moderna alta konstruaĵo, kiu fuŝas la tutan etoson, oni forprenis la antikvan fontanon por fari spacon por la aŭtoj, unuvorte, oni multrilate difektis ion plej karan al via koro. *Sakrilegio!*, vi diras al vi, amare.

Tian senton mi havis, renkontante miajn unuajn esperantistojn. Ili difektis ion, kio estis sankta. Ili ne konsciis la belecon. Pri la fekundeco de la genia sistemo, ili ŝajne havis neniun ideon. Kaj la lingvon ili tiom komplikis al si, ke ili ne povis uzi ĝin flue. Mi sentis min perfidita.

Sed samtempe mi eksciis, ke esperanto uziĝas tutmonde. Jes, eĉ en Japanio kaj Ĉinio, eĉ en Orienta Eŭropo, eĉ en Sudameriko. Resti sola kun mia riĉa, flua, sed bazvorta lingvo estus stulte. Por la kontaktoj mi do rezignacie akceptis (iom) ŝanĝi mian lingvaĵon. Baldaŭ mi korespondis kun diverslandaj esperantistoj, i.a. knaboj el orienta Azio, samaĝaj kiel mi, kun kiuj mi interŝanĝis plej interesajn leterojn. Kaj jen dua surprizo: iliaj leteroj, kvankam ne plene laŭnormaj gramatike, estis en la sama lingvo, kiun mi sola, aŭ kun mia frato, praktikis dum tri jaroj! Ni povis tuŝi ĉiajn temojn, kaj perfekte interkompreniĝis. Ni intersendis ŝercojn kaj poemojn, kaj por tio ne necesis dikaj vortaroj. Mi retrovis plezure la *bonan lingvon*, kiun mi tiom amis...

Tri pliaj konvinkofontoj

Al tiu historio mi devas aldoni tri faktojn por klarigi, kial mi preferas kombini elementojn el la baza provizo, kiam tio eblas por esprimi la koncernan ideon, ol uzi vortojn transprenitajn el nacilingvo.

Unue, mia ĉina korespondanto enkondukis min en sian lingvon, kaj mi efektive ĝin plu lernis, ĝis, post multaj jaroj, mi ricevis diplomon pri ĝi. Mi do rimarkis, ke er-kombinemo ne estas fantazio mia, sed ke ekzistas lingvoj, en kiuj ĝi estas la normala maniero riĉigi la vortaron. Ŝokis mian senton pri justeco, ke kiam mi, okcidentano, unuafoje en mia vivo renkontas en ĉina teksto la vortojn „helikoptero“ aŭ „teologio“, mi ilin tuj komprenas, malgraŭ la plena ĉineco de ilia aspekto, ĉar ili estas formitaj el jam konataj eroj, dum ĉino lerninta esperanton devas ĉu diveni laŭ la kunteksto (sed ne ĉiam estas kompreniga kunteksto), ĉu traserĉi vortaron, ĉu miskompreni (*teologo* unuavide ŝajnas esti fakulo pri teo; ni ja nomas *vinologo* la fakulon pri vino, kaj en lando, kie estas multaj specoj de teo, kun subtilaj aromnuancoj, ekzistas rilate al teo homoj kompareblaj al vinologoj pri vino). Ankoraŭ nun, la neegaleco sentiĝas dolore: kial mia lingvo stumbligas lin, dum lia min helpas?

Dua grava faktoro en mia starpunkto estas, ke mi fariĝis tradukisto en UN. Nu, profesia tradukisto ne rajtas fabriki lingvon laŭplaĉe. Lia tasko estas transigi en sistemon, kiu estas, kio ĝi estas - kun la propraj mankoj kaj limigoj - pensojn esprimatajn en alia sistemo. En UN, ni tradukis ĉefe el la angla. En tiu lingvo ekzistas grandega kvanto da vortoj, kiuj ne havas samsencaĵon en la franca. Ĉiufoje, kiam tradukisto renkontas vortojn kiel *to fix*, *pattern* aŭ *issue*, li devas elpensi taŭgajn manierojn esprimi la ideon laŭ la koncerna frazo, ĉar li ne disponas jam-pretajn francigojn, ĉiatekste uzablajn, same kiel ne ekzistas jam-pretaj francigo de vortoj kiel *trafa*, *taŭga* aŭ *amikumi*. Alivorte, tradukisto, se li volas konservi sian poston, devas akcepti la principon „mi adaptu min al la lingvo, ne la lingvon al mi“. En UN mi travivis rilate la francan ion similan al tio, kion mi sentis kiel 12-jarulo rilate al esperanto: la sistemon mi ne rajtas ŝanĝi, mi trejnu min trovi la solvojn al la esprimproblemoj kadre de la sistemo. Nur tia disciplino, miaopinie, ebligas plene malkovri la riĉaĵojn, kiujn ĉiu lingvo latente portas en si.

La tria faktoro estas, ke forlasinte la tradukan profesion, mi fariĝis plifeliĉigisto. Bonvolu pardoni la enkondukon de tiu

vorto, sed ĝi estas trafa ekzemplo pri miaj esprimproblemoj. En la franca, mi neniam scias, kiel difini min laŭprofesie. Mi oficiale estas psikanalizisto kaj psikoterapiisto. Sed psikanalizo inkluzivas teoriojn kaj praktikojn, kiujn mi ne aprobas kaj ne uzas, kaj „terapiisto“ elvokas la kuracadon de malsanulo, dum la homoj, kiuj venas al mi, ne estas speciale malsanaj. Mia agado konsistas el tio, ke mi helpas (aŭ provas helpi) ilin fariĝi pli feliĉaj. Esperanto ebligas esprimi unuvorte, kion mi franclingve povas klarigi nur per longa frazoĉeno.

Estu kiel ajn, fakto estas, ke homoj venas rakonti al mi plej konfidence pri sia vivo, siaj problemoj, siaj sentoj, sonĝoj kaj revoj. Ili pritraktas la sencon de la vivo, la malfacilon orientiĝi en la politikaj, sociaj aŭ ekonomiaj realaĵoj, ili raportas pri sia religia historio kaj siaj seksaj ĝenoj, unuvorte ili parolas pri ĉio ajn. Kelkaj - ĉefe intelektuloj - komence parolas per komplika lingvo. Sed ju pli kreiĝas etoso de fido, ju pli ili profundiĝas en la fundaj tavoloj de sia psiko, des pli la vortprovizo fariĝas baza. Kial? Verŝajne ĉar tio sufiĉas kaj montriĝas pli efika.

Mia sperto estas, ke la komunikado tiam disvolviĝas pli bone, kaj tiu malkovro de simpla lingvaĵo por esprimi, tre nuance, malsimplajn faktojn kaj sentojn ŝajnas esti faktoro en evoluo al stato pli kontentiga. Eble malsimpla esprimado estas masko, kaj la transiro al alia maniero eksterigi sin signas pliproksimiĝon al la vero, al la realo. Kaj vero efikas sanige. Mi do scias, pro sperto ĉiutaga, ke plej simplaj lingvaj rimedoj ebligas komuniki je ege alta grado de komplekseco. Tiun miraklon ni ŝuldas al la senfinaj ebloj de kombinado. La sep notoj de la gamo ebligas verki mirindajn simfoniojn, kaj la dudekelkaj literoj de nia aboco komunikas same profundajn pensojn, kiel komplika, plurmilsigna sistemo de hieroglifoj.

La francoj kaj mi

En ĉi tiu verko mi plurfoje preparolos francajn kutimojn, la francan pens- kaj edukmanieron, la francan influon al esperanto. Plej ofte kritike. Certe tio estas kampo, en kiu mi ne povas objektivi, kaj mi esperas, ke miaj francaj legantoj komprenos mian

partiecon kaj sukcesos defendi sin kontraŭ miaj asertoj, kiuj riskas esti troigitaj.

Dum dekkvin jaroj de mia vivo, mi troviĝis en la nekomforta situacio esti nefranca francparolanto meze de francoj, el kiuj la plimulto estis parizaj. Sed la rilatoj kun tiu francaro, intelektuloj vivantaj ekster Francio, estis ege malfacilaj. Tre ofte ili alprenis superecan sintenon, al kiu mia antaŭa vivo tute ne preparis min, kaj al kiu mi ne sciis, komence, trovi taŭgan reagon. La kaŝita mesaĝo en illaj diroj estis: „Kiel vi povas esti tio, kio vi estas, tiel malsama ol ni?“ Ofte ili vundis min. Ofte, sub miaj okuloj, ili humiligis aliajn, kies sola kulpo estis, kiel ĉe mi, esti nefranco, aŭ ne esti trapasinta la francan lernejsistemon kaj do havi en sia kulturo nepardoneblajn truojn. Tiuj homoj konstante funkciis antaŭjuĝe, kaj mia neakcepto de tiu maniero pensi incitis ilin.

Mi konscias nun, ke tio estis psike nesana medio, kaj ke estus terura eraro juĝi la francojn laŭ tiuj strangaj specimenoj. Sed la amasefiko estis tia, la vundado tiel ofta, ke tiu sperto stampis min. Eble io tro akra en miaj juĝoj pri la franca lingvo, aŭ pri la rilato de la francoj al esperanto, fontas el tiuj inferaj travivaĵoj. Ree mi konstatas, malfiere, ke mi ne kapablas objektivi. Mi ŝatus sed... Ne postulu, ke hundo, kiun infanoj ade turmentis, ne boju, kiam infano pasas, eĉ plej bonkora kaj hundama.

Tamen mi emfazu, ke similan agmanieron mi preskaŭ neniam renkontis ĉe francaj esperantistoj. Tio pensigas, ke esperanto utile distancigas de aĉaj naciaj kutimoj, aŭ ke venas al ĝi homoj, kiuj tiujn ne aprobas.

Ĉu mi tedis vin, parolante pri mia persona historio? Mi petas vian amikan pardonon. Precize ĉar mi kredas, ke vero multe helpas solvi problemojn, mi nepre devis rakonti la veron pri mi. Nun vi scios, kie fontas mia eventuala partieceo. Kaj sekve via juĝo estos pli libera.

2. LA SPIRITO DE LA LINGVO

Lingvo, kiu ekzistas

Por UN kaj por Monda Organizo pri Sano mi laboris sur la kvin kontinentoj (aŭ pli ĝuste mondopartoj, ĉar mi laboris en Guam, en Nov-Zelando, en Japanio, kiujn nomi kontinentaj estus ne rigore). Preskaŭ ĉie mi kontaktis kaj renkontis esperantistojn. Al la grandega bonŝanco tiel povi vojaĝi kaj labori en lokoj al mi fremdaj aldoniĝas plia: mi ofte estas invitata al esperanto-aranĝoj, ĉu por gvidi lingvokurson, ĉu por instrui pri tio aŭ tio ĉi, ĉu por prelegi, eĉ (ĉiaj ŝatoj ekzistas en la homaro) por kanti. Krome, mi ricevas dekon aŭ dekduon da esperantlingvaj leteroj ĉiusemajne, pri temoj plej diversaj, de psikologia problemo ĝis la politika organizo de Svislando tra demandoj prilingvaj kaj komentoj pri mia verkado. Fine, ĉiaspecaj landaj, lokaj kaj fakaj grupoj aŭ asocioj regaladas min per siaj bultenoj, ofte modestaj amatorajoj, kelkfoje broŝuro aŭ revuo plej bele presita.

Rezulte, mi havas bonan, ĉiutagan kontakton kun la lingvo, tia, kia la ordinaruloj ĝin uzas. El 1000 kontaktoj miaj kun esperantistoj el la tuta mondo, 999 ja estas kun senprestiĝaj lingvouzantoj, kaj nur unu kun akademiano, gramatikisto aŭ verkisto. La konkludo, al kiu tiu sperto min kondukas, eble aperos al vi plej banala: esperanto ekzistas.

Kion tio signifas? Ke ĝi estas *reala lingvo*, matura, firmiĝinta en kolektivo, kiu ĝin uzadas tute kontentige. Ke ĝi estas fleksebla, forta, kapabla. Ke ĝi estas komparebla kun la franca kaj la indonezia, la nederlanda kaj la hebrea, lingvoj tre malsamaj, ĉiu je malsama epoko de sia vivovojo, kaj sekve kun propraj mankoj (kiuj kaŭzas la suferojn de la tradukistoj!), sed ĉiu kun sufiĉaj rimedoj por respondi al la normalaj bezonoj de komunikado. En tiu reale uzata esperanto radikas la lingvo, kiun mi nomas *bona*.

En ĝi kuŝas mia normo. Mi rifuzas serĉi normon ĉe aŭtoritatoj, ĉar mi kredas esperanton esence demokratia. Zamenhof ja rezignis posedrajton super la lingvo, li al ĝi ne donis nomon, li rifuzis, ke oni nomu lin kreinto de la lingvo, sed akceptis nur la

titolon „iniciatinto“; krome, estas klare, laŭ multaj liaj diroj, ke li fidis la ĝustecon de kolektiva, anonima disvolvo, kaj ne individuajn decidojn, arbitrajn per sia naturo mem. Li diris ekzemple:

„La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ *anarĥio*, kontraŭ reformoj *arbitraj* kaj *personaj* (...), kontraŭ forĵetado de malnovaj formoj, antaŭ ol la novaj estos sufiĉe *elprovitaj* kaj tute definitive kaj sendispute *akceptitaj*.“ (L.L.Zamenhof, *Lingvaj Respondoj*, n-ro 144, Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, 1962, p.114-115. La emfazitajn vortojn substrekis Zamenhof mem.)

En tiu sama respondo, li montras, ke la lingvo

„devas trakti al si la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj“ (L.L. Zamenhof, *samloke*, p.115).

Tiu laborado de amasoj okazis, kaj ni nun disponas lingvon, antaŭ kiu, miaopinie, la plej konvena sinteno estas respekti ĝin. La opinioj de Zamenhof estas estimindaj kaj multon ni povas ĉerpi ĉe li, sed li ne plu estas aŭtoritato, en tiu senco, ke oni severe sekvu lian lingvouzon. La lingvo ja ŝanĝiĝis. Ekzemple, li ĝenerale diris *evolucio*. Sed la kolektivo tiusence nun preskaŭ ĉiam diras *evoluo*, kaj sentas ĉi-lastan formon pli tipe esperanta ol la malnoviĝintan *evolucio*. Tial *evoluo* estas por mi nuntempe pli bona formo. Pro la sama kialo mi preferas *komenti* al la zamenhofa *komentarii*, *rezulto* al lia *rezultato* kaj *spontana* al la oficiala *spontanea*. Kiam du formoj ŝajnas al mi egale uzataj en la kolektivo, mi alprenas la pli mallongan.

Simile, mi respektas PIV pro ĝiaj tre multaj kaj laŭcele aranĝitaj citaĵoj, sed mi ne akceptas ĝiajn difinojn kaj preskribojn, se ili ne spegulas la ĝeneralan uzadon (PIV rekomendas elekti *ami* en kazoj, kiam la ege plej multaj lingvanoj uzas *ŝati*, aŭ *Izraelio*, malgraŭ la ĝenerale uzata formo - ankaŭ en la lando mem - *Israelo*). La opiniojn de Zamenhof, same kiel tiujn de Kalocsay kaj Waringhien, aŭ tiujn de Hauptenthal kaj de Diego, aŭ tiujn de Rikardo Ŝulco, aŭ ankaŭ tiujn de Piron aŭ Valano, mi povas trovi interesaj, sed, laŭ mia konceptado, ili havas neniun povon difini, kiamaniere oni esprimu sin.

Okazas, ke tiaj homoj (inkluzive min) alprenas tonon aŭtoritatan, kvazaŭ ili havus ian ĉielan komision deklari, kio estas ĝusta kaj kio malĝusta. Sed ne lasu tiun maskon influi vin. Estas konata tekniko, cetere ofte nekonscia kaj purintenca, de vendistoj kaj politikistoj: por trudi ion, oni parolu, kvazaŭ oni havus kompetentecon, potencon, kaj sciус pli bone ol la aliaj. Tia pretendata aŭtoritato impresas. Sed same kiel, „por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia“, same pri lingvaj punktoj, por havi la povon decidi por la aliaj, ne sufiĉas tiun arogi al si. Nur la sumo de la spontanaj decidoj de tiuj, kiujn Zamenhof nomis la *amasoj*, fakte difinas la lingvon.

Bedaŭrinde, la afero estas pli kompleksa ol la ĉi-supraj linioj povus pensigi. Homoj ja estas ege imitemaj. Ili bezonas modelojn. La kolektivo do serĉas, ĉe tiu aŭ tiu ĉi, ekzemplojn de bona lingvo. Tial okazas subtila ludo reciprok-influa: la kolektivo serĉas modelojn ĉe verkistoj aŭ belparolantoj, sed akceptas imiti nur tiujn, kiuj uzas la lingvon konforme al ĝia sento pri ĝi. Por esti akceptitaj, aŭtoroj kaj paroladistoj do devas mem senti, kian lingvon la kolektivo preferas, kaj kapabli uzi ĝin. Se ili ne respektas la lingvosenton de la kolektivo, ili restas surborde. Ili ne trovas lokon en la fluo de la ĝenerala evoluo. Malmultaj verkistoj tion komprenis, bedaŭrinde. La plimulto uzas lingvon, kiu ne respondas al la deziroj de la lingvanaro. Rezulte, ties sopiro, apenaŭ konscia, esprimata nur malofte, sed profunda kaj vera, plu vibras senresponde.

Riĉas la reala lingvo

Tipa ekzemplo pli la „reala lingvo“ estas la verko de Tibor Sekelj *Mondo de Travivaĵoj* (Pizo: Edistudio, 1981). Tiuj viglaj raportetoj pri plej interesaj spertoj de nia fama mondesploranto uzas tute normalan lingvon, la lingvon, kiun oni ĉie aŭdas, kiam oni travojaĝas la planedon esperantiste.

Nu, jes ja, certe, la ĵusa diraĵo ne estas centprocente valida; enestas en tiu libro kelkaj formoj, kiuj ne apartenas al la ordinara lingvo. Ekzemple Sekelj jen kaj jen uzas la vortojn *ascendi*, ‚supreniri‘, kaj *descendi*, ‚malsupreniri‘. Estus pedante tion ri-

proĉi al li. Fakte mi danku lin, ĉar tiu „makuleto“ - laŭ mia plej subjektiva takso - liveras al mi pretekston por ilustrati miajn ideojn pri la *bona lingvo*. Efektive oni ofte kritikis, kiel tro pezajn la du tradiciajn manierojn esprimi la koncernajn sinmovojn. Prave. La unua reago estis serĉi pli oportunajn radikojn ekster la lingvo; tiel enkondukiĝis la du cititaj neologismoj. Sed la „reala lingvo“, manifestante sian riĉecon, trovis alian solvon, laŭ mi pli bonan.

Dum la skiferioj organizitaj en Svislando de Kultura Centro Esperantista, la neceso konstante paroli pri irado supren kaj malsupren - kiu ja estas la esenco de skiado - kondukis al la spontana apero de du sinonimoj al la klasikaj *supreniri* kaj *malsupreniri*, nome *alsupri* kaj *alvali*. Tiuj vortoj estas interesaj el tri vidpunktoj: unue, ili **nature** ekestis, ne pro iu serĉado, sed dum interparolo (alivorte, ilin naskis **parola** esperanto); due, ili ne estas pli longaj ol *ascendi* kaj *descendi*; trie, ili estas tute konformaj al la vortfaraj reguloj de la lingvo.

Tamen, dum *alsupri* perfekte taŭgas kiel anstataŭanto de la neologisma *ascendi*, *alvali* eblas nur en difinitaj geografiaj regionoj, kaj ne sinonimas kun la neologisma *descendi*. Ne-grave! Vivanta lingvo solvas mem siajn problemojn. Same spontane kiel *alsupri* foje naskiĝis *desupri*. Se konsideri, ke, kiam vi iras malsupren vi deiras de iu relativa supro por direkti vin al pli malsupra loko, tiu vorto estas senriproĉa.

Miaopinie, tiuj naturaj formiĝoj montras, kiel nun evoluas la lingvo. Ne plu en kabinetoj de homoj kun skribilo enmane, sed dum ide-interŝanĝoj en la mil cirkonstancoj, en kiuj la lingvo hodiaŭ uziĝas. De pli ol dudek jaroj mi registras tiel ŝprucantajn esprimojn. Ili definitive mortbatas la opinion, ke la normala esperanto estas malriĉa. Jen kelkaj ekzemploj. Provu laŭvorte traduki ilin vialingven, kaj tuj evidentiĝos, kian riĉecon esperanto havas.

Mi ne estas tre orema (t.e. ‚ema aĉeti oraĵojn‘, Sarĝah, Unu-igintaj Arabaj Emiruj, 86.07.17, polino, dum halto de la al-pekina aviadilo, antaŭ budo juvelvenda)

*Kelkaj italoj estis politike **ajnistaj*** (Pekino, Ĉinio, 86.07.28, italo)

*Imagi, ke la homaro subite **malstultiĝos**...* (Tokio, Japanio, 86.08.05, usonano)

*Bona profesoro **ne profesoras*** (Tokio, Japanio, 86.08.05, japano)

*Oni nun pli simple **frazas*** (Tokio, Japanio, 86.08.07, ĉino)

*Ĉu li **oĉjas?*** (Poitiers, Francio, 87.05.02, franco, pri iu, kiu kondutas onkle al infano)

*La fenomeno de **denaskismo*** (Poitiers, Francio, 87.05.02, italo parolanta pri la denaskaj esperantistoj)

***Katolikece** aŭ pli ĝuste **katolikige** skizita kultura idealo* (Locarno, Svislando, 87.05.17, polo)

*Levu la manon, kiuj protestas... Nun levu la manon, kiuj **malprotestas*** (Oslo, Norvegio, 87.05.23, norvego)

*De ĉi tiu stacio la diversaj tramlinioj **disbrakas*** (Oslo, Norvegio, 87.05.25, norvego)

*Ili utilis por **eldomigi** fumon* (samloke, samdate, norvego)

*Nia proksimiĝo al ĝi [esperanto] estas tro **pria**, ne sufiĉe **pera*** (Santala, Finnlando, 87.07.13, finnlingva finno)
[Komparu kun *La funkcio de interlingvo estas esti **intera*** (Vieno, 87.10.30, germano)]

*Ili vivas kun **pratimo** al ĉio fremda* (samloke, samdate, finnlingva (?) finnlandano)

*Tiu **lingvisteco**, kiun li havas* (samloke, samdate, bulgarino) [Komparu: *li fidis tro stian **lingvistecon*** (Tokio, Japanio, 86.08.06, japano)]

*Vi ne estas tre **muzeema**, ĉu?* (Hanko, Finnlando, 87.07.18, svedlingva finnlandano)

*La ĉielo **bluegas*** (samloke, samdate, la sama)

*Okazis socia **distavoliĝo*** (Tallin, Estonio, Sovetunio, 87.07.20, estono)

Vortelekti** vere estas **vortkompari (Zagreb, Jugoslavio, 87.08.03, nederlandano)

*Ĉu vi konsentas, ke ni **eku**?* (Zagreb, Jugoslavio, 87.08.04, kroato, gvidonta urbviziton)

*Karaj **alprelegotoj!*** (Zagreb, Jugoslavio, 87.08.04, aŭstro)

*Ili **buŝplenas** pri homrajtoj* (Zagreb, Jugoslavio, 87.08.05, nederlandano)

*Estas senutile **longvorte elstarigi** la diferencojn* (Vieno, Aŭstrio, 87.10.28, aŭstro)

*Esperantoj, tio estas **antoj**, kiuj esperas...* (Vieno, Aŭstrio, 87.10.29, usonano)

*Jam **dekas*** [jam estas la deka horo'] (samloke, samdate, germano)

*Ili estas **transkulturigeblaj*** (samloke, 87.10.30, kroato)

*Mi **tezas**, ke...* (samloke, samdate, aŭstro)

*...**akvoingeneraj** artikoloj... **akvoaferaj** artikoloj* (samloke, samdate, hungaro)

*Li similas Orson Welles - Jes, eĉ **voĉe*** (samloke, samdate, sloveno)

*La rendevuon li nuligis. Mi uzis la **ekdisponeblan** horon por...* (Laŭzano, Svislando, 88.10.13, franclingva sviso)

Milojn da similaj esprimoj mi kolektis. Dekoj povas ŝpruci en nur unu horo, kaj ofte, la koncernatoj ilin eĉ ne rimarkas. Se ni farus slipon por ĉiu el tiuj spontanaj formaĵoj, kaj verkus el ili vortaron de parola esperanto, ni atingus nivelon de riĉeco, kiu kompareblus kun la plej dikaj vortaroj nacilingvaj. La memdifinitaj literaturfakuloj, kiuj malestimas nian vortprovizon, havas antaŭjuĝon. Postjuĝo nur povas agnoskigi la krestimulan naturon de la lingvo kaj veki miron pri ĝia tuja kompreneblo interkultura.

Esploro de la publikigaĵoj montras similan fekundecon ĉe la skriba (neliteratura) lingvo:

*Ni **sentabuĝu** la historion de la Movado* (Ulrich Lins, *Esperanto*, novembro 1975, p.186)

*La maro, kiu **gamas** tiujn nuancojn de bluo kaj verdo* (Simo Milojevic, *Esperanto*, decembro 1986, p.202)

*La angla **perbuĝete** fabrikis la konsenton, dum la franca **perprestigis** ĝin* (Probal Daŝgupto, *Esperanto*, julio 1987, p.142; temas pri la maniero akceptigi sin kiel internacie uzata lingvo)

*Eble formalismo, burokratismo, **senrimedismo**, **samgrupismo** fermas horizontale la universalecon de UEA* (Jayme Pereira, citita de Mark Fettes, *Esperanto*, julio-aŭgusto 1988, p.121)

*En interetna lingvo produkte uzebla sistemo de fidindaj, konsekvencaj gramatikaj reguloj efikas „demokrate“, t.e. **samsancige**, por la anoj de tre malsamaj gepatraj lingvoj* (Klaus Schubert, *Esperanto*, julio-aŭgusto 1988, p.134)

Ne necesas pli multigi la ekzemplojn. La leganto certe propersperte scias, kiel riĉa la originala lingvo estas en la formo, en kiu ĝi nature prezentiĝas ĉe uzado. Jes, ankaŭ el vidpunkto de esprimpovo, esperanto estas *bona lingvo*.

La du cerbaj duonsferoj

Eble nun utilis enkonduki la koncepton pri spirito de lingvo. Probleme estas, ke difini ĝin montriĝas neeble. Temas ja pri io, kion necesas aliri per la dekstra cerba duonsfero. Ne, ne, ne forkuru, kara leganto! Ne timu! Estas pli simple, ol la vortoj kredigas. Mi tuj klarigos.

Mi ne parolos pri la plej besta, primitiva parto de nia psiko - la krudaj emocioj: timo, ekdeziro, atakemo, k.s. - kies enkorpa sidejo kuŝas ĉe la bazo de nia cerbo. Sed mi iom klarigu pri la supra cerbo, kiu estas la organo de nia psiko homa. Laŭ diversaj esploroj aperas, ke ties du simetriaĵaj duonsferoj havas malsamajn funkciojn, kiuj, ĉe dekstramanulo, povas resumiĝi jene.

La maldekstra duonsfero (kiu regas la dekstron de la korpo) zorgas pri rigoro: analiza intelekto, organizo, deduktado, volo, racio, logiko, objektiva registrado de faktoj ktp. Laŭ mia persona teorio ĝi radikas en *timo*: por sin protekti, oni provas kompreni kaj scii, kaj disciplinas sin. Homo ege disvolvis tiun intelekton por transvivi en mondo plej danĝera.

La dekstra duonsfero (kiu regas la maldekstron de la korpo) funkcias en tute alia kampo: ĝi estas la cerbo de revo, de kreemo, de beloĝuo - kaj sekve de la nerigora, neteknika parto de arto - de sentado, de fantazio, de inspiro, de intuicio, de etospercepto, de la neraciaj elementoj de homa funkciado je nivelo pli malpli alta (je primitiva nivelo agas la cerbobazo kaj la zono rande de ĝi). Laŭ mia persona teorio, la agado de tiu duonsfero radikas en *fido*. Necesas ja fidi, por lasi la bildojn sekvi unu la alian en nia imago, por permesi al la neraciaj procezoj de intuicio konigi ion al ni, por senti niajn sentojn. Se mankas baza sekureco, tiuj funkcioj ne eblas, kaj ni uzas la alian duonsferon, la faktan, racian, deduktan, disciplinan, por trovi kun certeco la spurojn, kiuj kondukos nin sekurloken.

Fakte ne gravus, por nia temo, se la nunaj ideoj pri la du cerbaj duonsferoj ne estus tute ĝustaj anatomie. Gravus nur la konstatebla fakto, ke nia psiko, en sia plej homa parto, funkcias laŭ du tute malsamaj manieroj. Vera psika ekvilibro postu-

las bone kunordigitan funkciadon de ambaŭ, sed ĉe multaj homoj aŭ kulturoj, unu superregas.

Tial okazas teruraj miskomprenoj: por unuj, la aliaj agas plej strange, kaj reciproke. En multaj landoj aŭ landogrupoj, norduloj identigas sin kun la maldekstra cerbo kaj atribuas la kontraŭan rolon al suduloj: norde oni estas racia, disciplinita, organizita, kaj taksas sudulojn fantaziemaj, anarkiaj sentemuloj, pli pretaj arti kaj gaji ol fari ion seriozan. Kaj suduloj mokas la rigidecon de la nordanaro, al kiu, laŭ ili, malĝojige mankas imago, samkiel kapablo senti kaj senbare esprimi sin.

(Ion similan vi trovos ĉe religioj: komparu protestantojn kun katolikoj, konfuceanojn kun dao-anoj: grupoj portas supren valorojn, kiuj spegulas jen unu flankon de la cerbo, jen alian).

Miaopinie, ke esperanto estas tiagrade *bona lingvo*, tio grandparte ŝuldiĝas al la fakto, ke Zamenhof havis neordinare bonan kunordigon de siaj du duoncerboj. La rolo de la dekstra duonsfero evidentiĝas tuj, kiam oni esploras la lingvon. La maldekstra cerbo ja funkcias sisteme, metode, rigore. Se ĝi ĉefrolus en la ellaborado de esperanto, al la latinaj *pacem, lucem, vocem* respondus same simetria serio nialingve, kiel ni trovas en la itala (*pace, luce, voce*), aŭ en la hispana kaj portugala (*paz, luz, voz*). Sed en esperanto ni havas *paco, lumo, voĉo*. Al la latina *-tio* respondus ĉiufoje sama silabo, dum fakte *conditio, situatio* kaj *lectio* respektive naskis *kondiĉo, situacio* kaj *leciono* (komparu kun la itala: *condizione, situazione, lezione* aŭ la hispana *condición, situación, lección*). Io ŝanca, io „laŭ la momenta emo“, karakterizas multajn aspektojn de la zamenhofa verko. Tio estas tipa pri la funkciado de la dekstra duoncerbo, kiu pli atentis fantazion ol sistemecon. Sed tio en esperanto tute ne ĝenas, ĉar la taŭga interveno de la maldekstra parto efike prizorgis, ke la lingvo laŭcele funkciiu.

Pro tiu bona kunordigo de la du cerbaj duonsferoj en Zamenhof, libereco kaj rigoro, kiel antaŭe dirite, mirinde harmonias en nia lingvo. Pro ĝi la aspekto „beleco“ ricevis same grandan atenton kiel la aspekto „logiko“. Kaj ankaŭ pro ĝi, kvankam mi ne rigardas la lingvouzon de D-ro Esperanto deviga aŭ nor-

mokrea, mi havas al li plej altan estimon. Liaj komentoj, liaj konsideroj nepre estas atentindaj, ĉar li estis, lingve, ege saĝa.

La spirito de la lingvo

La ĉi-supron mi enmetis, ĉar mi ne scias, kiamaniere sentigi al vi, kio estas la spirito de lingvo. Tiu nepovo mia fontas ĝuste el tio, ke temas pri lingva aspekto rilata al la dekstra cerbo kaj sekve ne alirebla per la rigoraj metodoj de la alia duonsfero, kiuj ebligas analizon. Temas pri io nedifinebla, kio rilatas kun la identeco de lingvo. Aliro per ekzemploj plej taŭgos ĉi-okaze.

Se mi diras *li trovis trafan vortigon por elturni sin*, mi uzas frazon, kiun la plimulto sentas pli tipe esperanta, ol *li elektis vortojn, kiuj estis efikaj, por ke li povu savi sin el la ĝena situacio*. Simile, *tiuepoke li vigle sportis* impresas pli esperante ol *en tiu epoko li praktikis sporton kun vigleco*. Fakte, ankaŭ la esprimo, kiun mi ĵus spontane uzis, *impresas pli esperante*, verŝajne estos konsiderata de multaj kiel plej kontentige esperanta ol estus la vortoj *donas impreson de pli esperanta frazo*.

Bone komprenu min. Mi ne diras, ke en ĉiuj el tiuj tri ekzemploj, la dua frazo ne estas en esperanto, aŭ eĉ en bona esperanto. Ĝi ĉiufoje estas en neriproĉebla lingvo. Mi nur diras, ke, laŭ mia sperto, se vi demandos al homoj el diversaj nacioj, kiun el pluraj similaj frazoj ili sentas lingve plej kontentiga, la plimulto montros preferon por tiuj konstruitaj kiel la tri unuaj.

Se nun ni rigardos pli detale tiujn tri ekzemplojn, evidentiĝos, ke la tri frazoj, kiuj impresas malpli esperantece, havas strukturon pli similan al tiuj de la eŭropaj lingvoj, almenaŭ de tiuj, pri kiuj mi scias sufiĉe por povi kompari. Ekzemple *en tiu epoko* konformas al la maniero, laŭ kiu la eŭropaj lingvoj el la hindeŭropa familio esprimas tian tempoesprimon: prepozicio + montra vorto + substantivo. La unuvorta adverba strukturo (*tiuepoke*) ne retroviĝas, tiakaze, en la koncernaj lingvoj. Tial mi diras, ke la spirito de lingvo rilatas al ĝia identeco. Ĝin kunformas la ecoj, kiuj estas tipaj, karakterizaj, unikaj.

Estas interese rimarki, ke tiu konstato fakte validas pri ĉiuj lingvoj. En la franca la frazo *il a beau essayer, il n'arrive pas*,

„kiom ajn li provas, ne prosperas al li“, sentiĝas kiel „pli franca“ ol la samsenca *quelque nombreux que soient ses essais répétés, il ne réussit pas*. Kial? Verŝajne ĉar la esprimo *avoir beau* estas netradukebla laŭvorte alilingven, kaj ĉar uzi *arriver*, ‚alveni‘, en la senco ‚sukcesi‘ estas pura francaĵo, ne retrovebla en la pli-multo el la aliaj lingvoj.

Parolante kun ĉinoj, mi ofte havis la okazon diri, ke kvankam mi relative bone komprenas ilian lingvon lege, ofte mi ne komprenas, kiam ĉinoj parolas inter si. Kiam mi diris ion kiel *ren shuohua de shihou, wo bu mingbai, keshi wo hui kan bao, kan shu*, laŭvorte: ‚Kiam homoj parolas, mi ne komprenas, sed mi scias legi gazeton aŭ libron‘. okazis neniuj speciala reago, sed plurfoje, kiam mi esprimis la saman ideon dirante *tingbudong, kandedong*, laŭvorte ‚aŭd-ne-kompren, leg-pov-kompren‘, oni komentis: „Ho! Jen vi parolas kiel denaska ĉino! Malofte ne-ĉinoj uzas tian formon“ (Ne estas vere, ke mi bone esprimas min ĉine, sed tiun tipe ĉinan frazstrukturon mi foje memoris dum interparolo, kaj, pro la ricevitaĵoj laŭdoj, de tiam regule uzis!) Io, kio ne estas tradukita, sed kvazaŭ formita laŭ la strukturoj de la koncerna lingvo, sentiĝas pli konforma al ĝia spirito.

Jen tria ekzemplo. *I don't feel up to it*, ‚mi ne sentas min kapabla tion fari, ĝustanivela por tion fari‘, sentiĝas pli angla ol la samsenca *I do not think I have the ability to do it*. La unua uzas siaspecan vortigon, unu el tiuj, kiuj igas la anglan manieron komuniki tute tipa, aparta. Jes, temas pri ĝenerala regulo: en iu ajn lingvo, verko aŭ traduko sentiĝas bona, kiam la teksto uzas kiel eble plej ofte la apartaĵojn de la koncerna lingvo.

Precize difini tiujn ecojn estas malfacile, eble eĉ nefareble. En esperanto, rolas ia kombino de simpleco kaj denseco: *sporti* estas pli simpla kaj pli mallonga ol *praktiki sporton*, same kiel *impresas* rilate al *donas impreson*.

Miaopinie, nia *bona lingvo* strukture unikas per la kunaĝado de kvin faktoroj: neŝanĝebla de la vortelementoj; senbara povo ilin kombini; emo al formaĵoj simplaj kaj koncizaj; elvokado prefere ol difinado, tamen kun atento al la neceso sufiĉe precizi; eblo perfinaĵe alsigni al iu ajn vorto iun ajn gramatikan funkcion, kio igas la esprimon laŭvole analiza (*li havas voĉon*

similan al tiu de Petro; li iris al la hotelo per takcio) aŭ sinteza (li similas Petron voĉe; li taksitis hotelen, li iris hotelen takste).

Verŝajne aliaj faktoroj kontribuas al la unikeco de la lingvo. Kelkaj el ili, kvankam difinantaj ecojn de la lingvo mem, fakte spegulas la spiriton, en kiu ĝi estis konceptita kaj alprenita. Ni provu tion pli profunde esplori.

*Nekonsciaj principoj regas komunikadon,
malsame laŭ la lingvo*

Por pli bone kompreni fenomenon, utilas kompari. Kiam mi estis tradukisto, mi ofte miris pri la spiritdiferenco inter la diversaj lingvoj. Aperas, kvazaŭ ĉiu popolo nekonscie aplikus al komunikado kelkajn principojn, kiuj fakte regas la tutan lingvon. Por ne kompliki, mi limigos la ĉi-suban prezentadon je tri lingvoj: la angla, la franca kaj esperanto.

Ni konsideru la anglan esprimon *Japanese encephalitis vaccine*, 'japan-encefalita vakcino'. Oni tuj vidas, ke la angla uzas, por komuniki, la principon „elvoki“. La ĵus prezentita tri-vorto ja indikas al ni, ke temas pri io japana, pri la malsano „encefalito“, kaj pri vakcino. Sed neniu finaĵo aŭ vorteto helpas kompreni, kiel tiuj tri konceptoj rilatas inter si. La apudmeto de la tri estas supozata sufiĉa por komuniki la signifon: tiun ili kune nur *elvokas*. Persono, kiu ne konas la temon, povas miskompreni. Fakte, tiu estas reala ekzemplo, kiun mi memoras el la tempo, kiam mi reviziis tradukojn en Monda Organizo pri Sano. La tradukisto miskomprenis la anglajon kiel signifantan 'japana encefalit-vakcino', t.e. vakcino produktata en Japanio kontraŭ ĉiuj formoj de la malsano 'encefalito', dum temis pri vakcino produktata ie ajn kontraŭ la siaspeca malsano nomita 'japana encefalito'.

Multokaze, kiam la angla kontentiĝas per elvoko, la franca postulas plenan precizecon. La sola maniero francigi la ĉi-supran esprimon estas: *vaccin contre l'encéphalite japonaise*. La rilatoj inter la vortoj estas klare montritaj. La franca uzas ĉiujn eblajn rimedojn por sendubigi. Alia karakterizo ĝia estas, ke ĝi ne facile adjektivigas. Dum la angla donas adjektivan funkcion

al substantivo per simpla antaŭmeto, kaj esperanto per -a, la franca estas senrimeda tiurilate: ĝi devas uzi substantivojn. Kelkfoje ĝi sukcesas, en tiaj esprimoj, uzi adjektivon, sed ofte tiu havas alian radikon ol la samspeca substantivo, kaj enmeto de prepozicieca prefikso estas postulata: *flavfebra vakcino* estas, en la franca, *vaccin antimaril*, en kiu la prefikso *anti* transprenas la funkcion de la prepozicio *contre* en la sinonima esprimo *vaccin contre la fièvre jaune*.

Kaj kio pri esperanto? La normala formo estas *japan-encefalita vakcino*. (Se temus pri vakcino produktata en Japanio kontraŭ ĉiuj encefalitoj, oni dirus *japana encefalit-vakcino*). Estas interese vidi, ke esperanto uzas la tri vortojn en la sama ordo, kiel la angla, kaj ke, samkiel tiulingve, ĝi ne bezonas enŝovi prepozicion. Sed ĝi sukcesas eviti la malprecizecon karakterizan pri la ŝekspira lingvo. Ĝi ne klarigas ĉion kiel la franca: ĝi fidas la intelekton de la leganto aŭ aŭdanto: se oni parolas pri malsano kaj vakcino, la lingvouzanto deduktos mem, sen plia precizigo, ke la vakcino utilas por protekti kontraŭ la malsano. Kontraste al la franca, ĝi do pli elvokas ol difinas. Sed kontraste al la angla, ĝi precizigas la rilatojn inter la vortoj: oni tuj scias, kio estas japana, ĉu la vakcino, ĉu la encefalito. Oni povus diri, ke la angla plene fidas la kuntekston aŭ la sciojn de la alkomunikato, ke la franca plene malfidas ilin, kaj ke esperanto fidas, ne la sciojn, sed la inteligenton: la kapablon dedukti.

Bele ekzempligas ĉi-lastan trajton la tabelvorta sistemo. Esperanto fidas, ke, egale ĉu vi estas eskimo aŭ aŭstralia praloĝanto, se vi komprenis la rilaton inter *kiu*, *kto*, *kiam* kaj *neniu*, *nenio*, *neniam*, sufiĉas instrui al vi *kie* por ke vi ne risku diri, ke *en nentu loko'* vortiĝas per *neniom* aŭ *nenia*: normala homa inteligento universale kondukas nur al *nenie* por tiu signifo.

Funkciado de inteligento estas multe pli sennacia, kaj do tuthomara, ol enhavo de memoro. Unu el la aspektoj de komunikado, kia ĝin komprenas esperanto, estas strebado utili interpopole. Tial ĝi pli fidas inteligenton ol memoron.

Kaj pro tiu sama ĝenerala principo, kiu regas komunikadon nialingve, la ofte ripetata ideo, ke esperanto havu tiun aŭ tiun alian trajton, ĉar oni trovas ĝin en „la naciaj lingvoj“ (fakte, ĝenerale temas nur pri kelkaj lingvoj aŭ pri nur unu lingvofami-

lio), miaopinie mistrafas: esperanto **ne** estas nacia lingvo, ne havas saman celon aŭ funkcion, ĝia kriterio de boneco do ne estos, kiagrade ĝi kapablas fari, kion faras nacilingvoj, sed kia- grade ĝi plenumas sian funkcion: esti peranto inter gentoj.

Bona lingvo, kiel sentata de la popolo

Kial esperanto plu ekzistas, kvankam ĝi historie havis pli da ŝancoj morti ol vivi (vd tiurilate mian ĉe-uneskan paroladon *Veti pri esperanto*, reproduktitan en *Esperanto*, 1987, janu-aro)? Ĉar konstante venis kaj plu venas al ĝi homoj, kiuj ĝin tiom admiras kaj amas, ke ili dediĉas al ĝia disflorado gigantan energion. Indas demandi sin, kio, en ĝi, tiagrade logas.

Mi estas konvinkita, ke la ĉefa faktoro estas la natura fekundeco de la sistemo. Simplegaj rimedoj produktas nekredible altan esprimpovon. La lingvo rapide sentiĝas riĉa; fakte, jam post nur kelkaj lecionoj, la lernantoj spertas ion neatenditan, kaj entuziasmigan: ili kapablas kompreni kaj formi belajn, amuzajn aŭ trafajn esprimojn, kiujn ili ne povas facile vortigi en sia propra lingvo.

Krome ili sentas sin respektataj. Aliaj fremdlingvoj abundas je arbitraj reguloj, kiuj estas kvazaŭ la kapricaj decidoj de diktatoro elpensinta pli malpli sadisman manieron omaĝi al lia potenco. Nenio simila trafas ilin en esperanto.

La plej bona metodo sentigi sian potencon ja estas devigi la malsuperulon fari ion sensencan, kion li faras nur, ĉar li ne povas eskapi. Se mastro devigas sklavon rampi kaj leki liajn piedojn, tio estas maniero proklami al la vidantoj, kaj al la sklavo mem: „Rigardu, kiel potenca mi estas!“ La sklavo enkore furiozas, la ĉeestantoj sentas egan timon kaj malamon, sed neniu povas fari ion ajn: la mastro superfortas.

Nu, kiam mi parolas angle, mi devas, por esprimi tiel simplan ideon kiel ‚la infanoj povos...‘, obei la arbitrajn kapricojn de lingva diktatoro. Se ni konsiderus nur la elementojn necesajn por interkompreniĝi, mi povus apliki la normalajn regulojn de la lingvo kaj diri *the childs will can*. Sed la anglalingvaj nacioj sukcesas devigi min sekvi arbitrajn sensencaĵojn, kiuj

kontribuas nenion al glata komunikado, sed multon al malegaleco inter ni. Mi ne rajtas apliki la normalan manieron formi pluralon per aldono de *-s*. Mi devas diri *children*. Kial? La respondo al tio - kiel scias ĉiu lingvoinstruisto, ĉar infanoj estas konsekvencaj kaj malfacile kredas je sensencaj reguloj, do ili demandas: kial? - povas esti nur: „ĉar estas tiel“, alivorte: ne estas racia kaŭzo, nur ke tiu gento trudas al ni siajn absurdajn kutimojn. Krome, kvankam la normala vorto signifanta ‚povi‘ estas *can*, kaj la normala maniero uzi verbon os-tempe estas meti antaŭ ĝin la vorton *will*, mi ne rajtas ĉi-kaze agi konsekvence, normale, mi devas uzi alian verbon, ĉar *can*, ‚povi‘, ne havas os-tempon en la angla. Mi devos serĉi alian vojon kaj uzi ekzemple esprimon kiel *will be able to*.

Nur ĉar la popoloj ne kuraĝas fronti la veron, ili ne rimarkas, ke obei tiajn absurdaĵojn ĉe internacia komunikado estas sklavi antaŭ mastro, kies piedon oni iras leki, se li tion ordonas. Ke mi prenis ekzemplon el la angla, havas neniun specialan signifon. Kiam la franca estis internacia komunikilo, la situacio perfekte similis, kaj ĝi similus, kia ajn la etna lingvo interpopole uzata.

Pri ĉio ĉi ne klare konscias la personoj, kiuj enskribiĝis ĉe esperanto-kurso, aŭ kiuj hejme solaj lernas mem. Sed ili **sentas**, ke tiu lingvo respektas ilin, kiel neniu lernita fremdlingvo tion faris antaŭe. Anstataŭ pleni je stumbligaj malhelpiloj, humilige, ĝi ĉiurimede favoras komunikadon: ĝi konformas kun la naturaj emoj, ĝi konsekvence stimulas la liberigan aplikon de la principo, kiu regas spontanen sin-esprimon: inklino ĝeneraligi ĉiun strukturon, ĉiun lernitan regulon gramatikan aŭ vortfaran. En ĝi, post la unua periodo de familiariĝo, oni sentas sin hejme.

Tiu plaĉa sento baziĝas sur la fakto, ke, post la komenca etapo, esperanto konstante pli invitas dedukti ol uzi la memoron. Tio miaopinie estas tre grava, ĉar fidi la inteligenton de la aliuloj estas multe pli respekta, estima al ili, ol devigi ilin ĉerpi elmemore. Memoron havas bestoj, sed lingvan inteligenton nur homoj posedas. Tial mi kredas, ke la fenomeno esperanto ege superas la sferon de lingvoj. Temas pri renverso en la socipolitikaj kaj ĝenerale homaj rilatoj, kiujn esperanto igas pli kontenti-

gaj praktike, sed ankaŭ morale kaj psikologie. La kaŝita mesaĝo de esperanto estas, ke bona konduto baziĝu, ne sur aŭtoritato, sed sur konsekvenca apliko de libere akceptitaj reguloj. Se tion vi komprenos, vi ne plu miros, ke ĝi elvokas tian akran reziston. Nia *bona lingvo* atakas la radikojn de multjarmilaj kutimoj. Prave, miaopinie, oni vidus en ĝi mutacion.

Mutacio

Oni nomas mutacio la fenomenon, ke jen aperas nova speco de vivaĵoj kapabla teni sin viva kaj disflori kiel speco. Kiel vi scias, laŭ la nun plej ĝenerale akceptita hipotezo pri la apero de la homoj, vivis estaĵoj pli malpli simiecaj, kaj foje okazis mutacio kaj prahomo ekekestis. Kiam la simieca patrino rigardis tiun novnaskiton, ŝi certe ne fieris: ĝi ja estis videble fuŝo. Mankis al ĝi la harprotekto sur la tuta korpo, kaj ĝiaj aliaj mankoj konfirmiĝis pli kaj pli, laŭgrade, kiel la tempo pasis. Ĝi kapablis fari nenion, kion la aliaj bestoj faras ĝiaaĝe. Ke tiu strangaĵo plu vivis, estas miraklo. Eble la kvazaŭ-simiano ĝin amis kun escepta intenso: malfortuloj kortuŝas koron patrinan.

Por la aliaj bestoj, tiu fuŝito certe estis precipe ridinda. Kiam - ege malfrue - ĝi komencis paŝi, ĝi estis speciale mallerta kaj rigida. Ĝi provis antaŭeniri nur dupiede, sed pro tiu malsaĝa ambicio, ĝi konstante falis. Ju pli ĝi kreskis, des pli evidentis ĝiaj mankoj: ĝi havas nek la forton de urso, nek la rapidon de cervo, nek serpentan venenon, nek lertecon simian. Nenion ĝi havis por defendi sin en mondo por ĝi ege danĝera. Kun la timo, kiun tia situo vekis ĝi povis vivi nur disvolvante sian intelekton.

Sed dank'al tio, ĝi kapablis elturni sin el situacioj, ĉe kiuj la aliaj estis senhelpaj. Eble kelkaj bestoj tion rimarkis, kaj al ilia mokado kaj sento supereca aldoniĝis ia respekta timo: la strangaĵoj, neatendebaj reagoj de la fuŝito tro ofte taŭge efikis...

Simile impresas al mi esperanto. La lingvokreemo de la homaro produktis ĉiajn komunikilojn, sed neniam iun kompareblan al tiu ĉi. La aliaj lingvoj - se tiel diri (kiel vi rimarkas, mi nun parolas laŭ la maniero de la dekstra cerbo: mi celas, ne analizi rigore, nur sentigi) - la aliaj lingvoj, do, rigardis ĝin, kaj

ofte plu rigardas ĝin, de tre alte: „mankas al ĝi tio, kaj tio, kaj tio ĉi“, ili diras inter si, nekonscie elektante, por la komparo, nur la trajtojn, per kiuj ili superas, kaj tute ne rimarkante la grandiozan superecon multflankan de la mutaciulo.

Tiun plibonecon ili ne **konscias**, sed sub la sojlo de la konscio ili observis ĝin, aŭ ĝin deduktis, kaj ĝi ilin timigas. Tiel sendube klariĝas la facileco, kun kiu psikologia esploro evidentigas la intervenon de angoro en la reagoj de multaj al esperanto, kiel mi demonstris aliloke („Psikologiaj reagoj al esperanto“, *Esperanto-dokumentoj*, n-ro 26 E, Roterdamo: UEA, 1988).

Kiam okazas mutacio, ne nur unu nova speco naskiĝas, sed pluraj, kuzaj, kiuj post iu tempo montriĝos sterilaj: altaj kvalitoj necesas por pluvivi. Ni scias, ke pluraj kvazaŭhomaj specoj ekzistis iutempe sed ili ne havis idojn dum sufiĉe longa tempo por stabiliĝi kiel sukcesinta speco. Tiun leĝon naturo obeis ankaŭ, kiam ĝi naskis la intergentan lingvon. Volapük, Ido, Occidental, Latino sine flexione, Interlingua, Neo ktp estas la kuzoj, kiuj iom sukcesis. Kiam la tempo maturiĝis por mutacio, ŝajnas, ke Naturo naskas fekunde por certigi, ke vivos la plej altnivela. Nur rivaleco kaj konkuro praktik-terene ja povas havigi al la planedo produkton kun supera kvalito.

Pri la rezulto de la lingva konkuro ne estas iu dubo: esperanto montriĝis la plej bona.

Al kio ŝuldiĝas ĝia pliboneco? Rilate al Volapük, kiun ankaŭ karakterizas prefero al inteligento super memoro, temas pri la fakto, ke nia *bona lingvo* estas pli respekta kaj pli demokratia. Respekta: la aspekto de la devenvortoj estas en esperanto, kontraste al Volapük, ĝenerale rekonebla; Zamenhof adaptis ilin al la bezonoj de la lingvo, sed ne misformis ilian vizaĝon: li tenis sin respektate al ili; simile, en la konstruo de la frazo, Zamenhof lasas al la lingvano multe pli da libereco ol Schleyer: li respektas lin aŭ ŝin. Demokratia: ne la aŭtoro aŭ iu komitato efektive prizorgas la evoluon, aŭ decidas pri dubaj punktoj, sed anonima uzado, t.e. kolektiva akcepto aŭ malakcepto de novaj formoj, kiujn iu ajn rajtas proponi.

Rilate al la aliaj kuzoj, la pliboneco kuŝas en du trajtoj. Unue, esperanto pli atentis la postulojn de tutmondismo, dum

tiuj rivaloj estas kvazaŭ ekskluzive okcidentaj. Due, kaj precipe, ĝi plu fidas inteligenton ol memoron (komparu la tabelvortojn kun iliaj samsencaĵoj en Ido).

Dirante, ke esperanto pli fidas inteligenton ol memoron, mi esprimis min ne tute prave. Temas ja pri ia nekonscia inteligenteco, kiun eble estus pli trafe nomi refleksa dedukt-kapablo. Ne kompreneblus la derivitaj vortoj aŭ la *-u* en *ĉu ni iru?* (tute ordinara esprimo, kiu ne havas ekzaktan samsencaĵon en la franca kaj en multaj aliaj lingvoj), se ne ekzistus nia kapablo dedukti. Sed dedukti, se tiel diri, instinkte, ne per longa intelekta procezo, nur en unu sekundero. Kaj jen, indulgu min pliafoje, mi nun faros al vi kurseton pri psikolingviko.

3. NATURA SIN-ESPRIMADO

Emo ĝeneraligi tuj post asimilado

Kio ebligas dedukti tiel rapide? Mensa refleksa agado, kiun la svisa psikologo Piaget siatempe nomis *ĝeneraliga asimilado*. Oni asimilas elementon, kaj tuj ĝeneraligas ĝian uzon, ekster la kampo de la jam akiritaj scioj kaj sperto. Nu, la interesa punkto estas, ke tio estas la **natura** sistemo lingve komuniki. Per *natura* mi celas: kion spontane faras nia cerbo, kiam ne intervenas eksteraj influoj.

Kiel ni povas koni tiun naturan funkciadon? Observante la kazojn, kiam lingva esprimiĝo malkonformas kun la socia normo, ekzemple ĉe infanoj komencantaj paroli, ĉe fremduloj, kiuj provas komprenigi sin per lingvo neplene mastrata, ĉe homoj parolantaj dum kuracilo aŭ alia drogo (inkluzive alkoholajn) portempe malfortigas la kontrolilojn en la cerbo, ĉe homoj tuŝataj de forta emocio, tiel ke por ili pli gravas komuniki ol paroli laŭnorme, ktp. Studo pri la hezitoj de personoj, kiuj, parolante sian lingvon, ne tuj sukcesas vortigi sian penson, ankaŭ liveras indikojn pri la rolantaj mensaj procezoj. Eĉ analizoj pri la evoluo de lingvoj rivelas, kien kondukas la naturaj tendencoj de lingvouzado.

Tiuj esploroj montras, ke la ĉefa faktoro en natura sinesprimado estas ĝeneraliga asimilado. Mi memoras ĉinan infanon, kiu klare prononcis *wo bu you*, 'mi ne havas', dum la ĝusta formo estus *wo meiyou*: nia *ne* preskaŭ ĉiam tradukiĝas per *bu* en la ĉina, sed pro stranga escepto, antaŭ *you*, 'havi', oni devas diri *mei*. Tiu eta ĉino ĝeneraligis la asimilitan *ne*-signon. Alia ekzemplo: s-ino Bormann citis al mi germanan infanon, al kiu oni demandis „*Bist du müde?*“, 'ĉu vi estas laca?', kaj kiu respondis: „*ich bist nicht müde*“, 'mi ne estas laca'. Anstataŭ modifi la verboformon laŭ la pronomo (la ĝusta frazo estus *ich bin nicht müde*), ĝi ĝeneraligis la duapersonan.

Simile, mi foje aŭdis anglan infanon diri *he comed*, 'li venis', anstataŭ la ĝusta, neregula, *he came* (ĉe la plimulto el la verboj, la pasinta tempo esprimiĝas per la finaĵo *-ed* en la angla). Kon-

firmon, ke tiel parolas anglaj infanoj mi ĵus trovis en romano, en kiu dekjara Darren Wilkes diras *She never seed me*, ‚ŝi neniam vidis min‘ (li uzas *seed* anstataŭ la ĝusta formo *saw*) kaj *Only she never knowed*, ‚sed ŝi neniam sciis‘ (*knowed* anstataŭ *knew*) (P.D. James, *A taste for death*, New York: Alfred A. Knopf, 1988, p.402). Klare, temas pri plej natura tendenco.

Tre ofte, ĉe fremdlingvano, post-asimila ĝeneraligo montriĝas pli forta ol la strukturoj de la gepatra lingvo. Por esprimi la ideon ‚se mi havus‘, la plimulto el la anglalingvaj lernantoj de la franca spontane diras *si j'aurais*, kiel ĉiuj francaj infanoj, dum rekta traduko el la angla *if I had* kondukus al la ĝusta formo *si j'avais*. Simile, mi notis ĉe (neesperantista) anglalingvano parolanta france la formon *s'il viendra*, ‚se li venos‘ (laŭvorte, angle, *if he will come*), kvankam rekta traduko el lia nacilingvo produktus la ĝustan *s'il vient* (angle *if he comes*). En tiuj du kazoj, aperas en la franca formoj malĝustaj, kiuj estus ankaŭ eraraj en la gepatra lingvo, **sed kiuj estas ĝustaj en esperanto**: nia lingvo sekvas pli proksime la naturan funkciadon de esprimiĝo ol la plimulto el la etnaj.

Asimilado ĝeneraliga okazas ne nur ĉe gramatiko, sed ege ofte ankaŭ ĉe vortfarado. En la franca, al nia strukturo *ne--ebla* respondas oftege, sed ne ĉiam, la strukturo *in--able* (aŭ, se la unua konsonanto de la radiko estas lipa, *im--able*); la formo uzata por enŝovi la verban radikon estas tiu, kiun oni as-tempe uzas post *vous*, ‚vi‘: ‚vi trinkas‘ estas *vous buvez*, ‚netrinkebla‘ do estos *imbuvable*. Sed estas multegaj esceptoj. Ekzemple, ‚neatingebla‘ estas *inaccessible*, dum la normala maniero diri ‚vi atingas‘ estas *vous atteignez*. Tamen, ĝeneraliga asimilado konstante influas, kaj oni ofte aŭdas la eraran formon *inatt-eignable*.

La franca vorto tradukanta nian *farebla* estas interesa, ĉar ĝi manifestas dufojan nekonscian aplikon de ĝeneraliga asimilado. Kiel ĉi-supre dirite, la verba formo nekonscie uzata por formi la *able*-adjektivojn estas tiu, kiun oni uzas as-tempe post *vous*: *vous punissez*, ‚vi punas‘ > *punissable*, ‚punebla‘, ‚puninda‘. Sed tiu formo mem estas ligita al la is-tempa formo: malantaŭ *vous punissez*, ‚vi punas‘ aŭ *vous buvez*, ‚vi trinkas‘, kaŝiĝas *vous punissiez*, ‚vi punis‘, kaj *vous buviez*, ‚vi trinkis‘. Kiel

konstante en la franca, troviĝas esceptoj. Por la verbo *faire*, ‚fari‘, tiu regulo ne aplikiĝas. Oni diras *vous faisiez*, ‚vi faris‘, sed *vous faites*, ‚vi faras‘. La natura emo ĝeneraligi asimilajon estas tre forta: ne nur ĉiuj franclingvaj infanoj komence diras *vous falsez*, ‚vi faras‘ (la ĝusta formo *vous faites* enradikiĝas nur post plurjara korektado), ne nur multaj fremdlingvanoj faras same, kiam ili parolas france, ne nur same faras multaj plenkreskaj franclingvanoj, kiam ebriaj aŭ sub influo de forta emocio, sed la oficiala lingvo fakte uzis tiun formon kiel bazon por la adjektivo ‚farebla‘: *faisable*.

Kruciĝo de plene konsekvencaj serioj

Ni nun revenu al la spirito de esperanto. Se vi konsideras la ĉi-supre prezentitajn ekzemplojn, vi rimarkos, ke ĉiufoje, kiam la spontane naskita nacilingva formo estas neĝusta, apliko de la samaj formadprincipoj kondukas nialingve al tute ĝusta formo. Ni do povas konkludi, ke unu el la aspektoj de la spirito de esperanto - io tipe esperanta - estas la fakto, ke ĝeneraliga asimilado en ĝi regas senbare.

Efektive, en esperanto, la plimulto el la vortoj situas kruce de perfekte konsekvencaj kvazaŭ-senfinaj serioj. Alivorte, **ĝeneraliga asimilado okazas ne nur ĉe unu el la elementoj, sed ĉe almenaŭ du**. La tabelvortoj estas nur aparta apliko de ĉi tiu principo. Ni prenu ekzemple tute alitipan vorton: *ŝafejo*. En la menso ĝi situas jene:

ŝafo
ŝafino
ŝafido
ŝafa
hundejo ĉevalejo bovejo ŝafejo kolombejo porkejo...
ŝafajo
ŝafaro
ŝafisto
 ...

Ni komparu kun la franca. Eĉ limigante nin je la kvin vortoj centre de la kruco, tuj montriĝas, kiagrade ĉi-kaze la lingvo de Molière baras la vojon al la natura inklino ĝeneraligi asimilitan lingveron:

ovin
étable bergerie pigeonnier
mouton

Ne pli helpas la angla vortsistemo:

ovine
cowshed sheep-fold pigeon house
mutton

Nek vertikale, nek horizontale retroviĝas konsekvenca serio. Tio praktike signifas, ke, en la franca aŭ en la angla, por akiri la vorton kaj por trovi ĝin laŭbezone, la menso uzas multe pli da nerva energio.

Ŝparo de nerva energio

Kiam mi estis psikologia studento, por konsciigi nin pri la rilato inter nerva elspezo kaj reguleco de la ago-skemoj, la gvidanto de lernogrupo foje proponis jenan eksperimenton. Ni registris per plej preciza tempomezurilo (estis ja en Svislando!) la daŭron necesan por partigi kompletan da ludkartoj en diversaj kondiĉoj. Eĉ se perfekte atenditaj, la rezultoj imponis. Se la instrukcioj estas, ekzemple:

Metu ĉiujn ruĝajn maldekstren, escepte de la bubo; de iu ajn sepo; de la kera deko; de la karoa aso; de la reĝino, egale ĉu ĝi estas kera aŭ karoa, se ĝin antaŭas nigra karto; de la kera reĝo, se ĝi aperas post karto kun valoro inter du kaj ok, alia ol la trefa kvaroj; ktp,

la tempo necesa por ricevi la postulatan kartogrupon estas multe pli longa ol se la regularo konsistas el unu frazo:

Metu la ruĝajn maldekstren kaj la nigrajn dekstren.

La pli longa daŭro de la unua tasko spegulas la pli altan kvanton da energio, kiun bezonas la nerva sistemo por ĝin plenumi.

Nu, la plimulto el la naciaj lingvoj enhavas regulojn kompareblajn al la unua serio de instrukcioj. Sekve, la nerva fluo konstante elspezas sian energion ĉe blokoj, baroj, devojigoj kaj stumblejoj ĉiaspecaj. Legante ĉi tion, verŝajne kelkaj el vi pensas: „Li troigas. Mi lernis la anglan, la germanan aŭ tiun aŭ tiun ĉi lingvon, kaj mi parolas ĝin flue. Ne estas tiel terure.“ Se tiel estas, mi gratulas vin. Sed eble tute simple vi ne konscias vian sportan nivelon.

Kiam vi uzas esperanton, vi estas kiel homo, kiu kuras rektalinie sur ebena tereno. Kiam vi uzas la alian lingvon (se ne estas unu el la malmultaj kun strukturoj same regulaj, kiel la esperantaj), vi kuras sur tereno kun fortaj deklivoj, jen supren, jen malsupren, sekvante zigzagan vojeton kun harpinglaj turniĝoj, plenan je truoj perfide faligaj, kaj kiun de tempo al tempo rokoj baras, tiel ke ne eblas pluiri sen grimpi transen. Se vi flue parolas, tio signifas, ke vi tiom ekzercis vin, ke vi parkere konas la malfacilajn lokojn kaj, ĉiufoje, la plej efikan manieron ilin venki. Vi similas al atleto, kiu ĉiutage trakuras la ĵus priskribitan terenon. Sed eĉ se via kurrapideco havigas al vi aplaŭdon, tamen restas la fakto, ke, sur tiu tereno, via koro pli rapide batas, vi spiras pli forte kaj brue, vi estos pli laca, ol dum vi kuris senturne kaj senbare sur la ebenejo. Kiom ajn ekzercita vi estas, vi elspezis pli da energio.

Mal-: *ĉu beno aŭ malbeno?*

Kuri sur malfacila tereno povas esti stimule, se oni tion faras propravole por la plezuro sporti aŭ kun la celo trejni sian korpom. Sed homoj, kiuj deziras (aŭ devas) intergente komuniki, rajtas ne esti sportemaj, aŭ preferi aliajn kampojn por atleti. Al

ili esperanto estas destinita. Tial Zamenhof konceptis ĝin tia-maniere, ke komunikado okazu senstreĉe. (Se vi ŝatas streĉi viajn fortojn, ne mankas terenoj por vin trejni: lingvoj kiel la rusa, la franca, kaj la araba dissemis stumblejojn abunde).

Por eviti streĉon, necesas senti sin sekura. Al tiu sekureca sento kontribuas la scio, ke oni ĝuos grandan liberecon en la kombina uzo de la lingvaj elementoj. Pro tio verŝajne la prefikso *mal-* tiom uziĝas en la „reala lingvo“.

Efektive, esplorante pri parola esperanto, mi miris pri la ofteco de tiu prefikso. Homoj konstante uzas ĝin, ofte humure. Jen bela ekzemplo de lingva ero, kiun la homoj rapide asimilas kaj emas ĝeneraligi. Kaj tamen, *mal-* elvokas reziston ĉe relative multaj.

En letero, kiun mi ĵus ricevis, brazila amiko diras, ke oni nepre bezonas la vorton *liva* por anstataŭi *maldekstra*. Kiel *mal-samaj* homoj estas! Mi ne pretendas esti normala (se tio signifas ion), sed esperanto estas la sola lingvo, en kiu mi havas neniun problemon pri ‚dekstra‘ kaj ‚maldekstra‘. Eble vi ne kredos min. Se tiel, demandu miajn edzinon kaj gefilojn, ili konfirmos al vi jenon: kiam mi ŝoforas kaj mia apudulo instrukcias, ke mi iru dekstren aŭ maldekstren, se li konas min, li mane gestas al la ĝusta direkto, ĉar nek en la franca, nek en la angla, nek, verdire en iu ajn el la aliaj nacilingvoj, kiujn mi iom scias, mi havas ĝustan reflekson. Nur en esperanto mi ne eraras.

Kompreneble, se la granda plimulto el la homoj havas problemon malan al la mia, mi volonte konsentos, ke oni rezignu je *maldekstra* favore al *liva* aŭ alia taŭga formo. Mi neniel volus trudi miajn apartaĵojn. Tamen mi esperas, ke oni respektos la starpunkton de tiuj, kiuj diferencas de la plimulto, kaj ke oni memoros la averton de Zamenhof, „kontraŭ forĵetado de malnovaj formoj, antaŭ ol la novaj estos sufiĉe elprovitaj kaj tute *definitive* kaj *sendispute* akceptitaj“ (vd. ĉi-supre, p. 10; ĉi-foje substrekis mi).

Sed, kiel mi jam diris, mi fidas je la saĝeco de la kolektiva, nekonscia maniero solvi lingvajn problemojn. Pro tio min tigrade interesas la formoj, kiuj spontane ŝprucas ĉe interbabilado. Al tiu, kiu surterene esploras, kiel faras ĉiu serioza lingvisto, baldaŭ evidentiĝas, ke *mal-* ege oftas en la „reala lingvo“. Mi jam

citis *malstultiĝo* kaj *malprotestas* en la sekcio pri la riĉeco de la parola lingvo, sed mi povus aldoni centojn da aliaj kazoj.

Ekzemple foje mi diskutis kun Marc Fettes, la nuna redaktisto de *Esperanto*, okaze de kunveno, ĉe kiu ni kune prezentis UEAn, kaj li diris al mi: „*tio estus malpozitiva reago*“ (Ĝenevo, 88.02.06). Mi bedaŭrinde ne scias, ĉu li konscie elektis tiun formon, aŭ ĉu simple la vorto enmensiĝis al li pli rapide ol *negativa*.

La esprimon *nek tro, nek maltro* mi registris tiel ofte, ke ĝi eble jam ŝablونيĝas. Plurfoje, mi notis *malkiel* en la senco ‚kontraŭe al‘, ‚diference de‘. Jen kelkaj pliaj ekzemploj:

Ili riproĉas, ke la lingvo estas malnatura (Pekino, Ĉinio, 86.07.29, ĉino; miaopinie, tiu ĉino trovis la ĝustan esperantigon de la koncepto, kiun ni kutime vortigas per *artefarita*, kio elvokas ion tute alian)

Tio estas tro malpoezia (Locarno, Svislando, 87.05.16, itallingva sviso)

Mi estas malpesimisma (Santala, Finnlando 87.07.14, ĉiliano, kiu poste klarigis, ke li ne estis certa, ĉu la radikoj *optimism* ekzistas)

Kiam okazos la malinaŭguro? (Santala, Finnlando, 87.07.18, britoj)

Oni hodiaŭ malfestas la sovetiigon de Estonio (Tallin, Estonio, Sovetio, 87.07.20, estono)

La ekspozicio estos malinaŭgurata dimanĉon (Zagreb, Jugoslavio, 87.08.04, kroato)

Mi venas por lerni, ne por mallerni (Zagreb, Jugoslavio, 87.08.05, aŭstralianino, laŭdevene pollanda judino)

Temas pri malfermita, t.e. aperta personeco (Zagreb, Jugoslavio, 87.08.04, kroato; interesa ekzemplo: ĝi montras, ke la unua vorto atinganta la menson estas la derivaĵo, la neologismo alvenas nur poste)

Ni **malsekvu** la *sagojn* (por reveni laŭ vojo, kiun ni trovis sekvante la *sagojn* direktomontrajn; Vieno, Aŭstrio, 87.10.28, germano)

Li estas **malfaka** *kuracisto* (t.e. ĝeneralmedicinisto; Ĝenevo, Svislando, 88.11.07, germanlingva sviso)

La *reala lingvo* uziĝas ankaŭ en korespondado. Por persono, kiu lingviste interesiĝas pri tiu aspekto de ĝi, publikigitaj leteroj de legantoj estas plej interesa fonto de observoj. La ĉi-supra teksto jam estis tajpita, kiam mi legis la numeron de julio-aŭgusto 1988 de *Esperanto*. En ĝi, sur sama kolumno, aperas du interesaj *mal*-aĵoj:

En pluraj aliaj kazoj, mi intence uzas verbojn malptive (t.e. ,kontraŭe al tio, kion PIV rekomendas'; Aldo de' Giorgi, *Esperanto*, julio-aŭgusto 1988, p.137)

Urĝe bezonata estas (...) gramatiko de la lingvo, kiu malkomplikos la enhavon de [PAG] (Audrey Childs-Mee, samloke).

La kontrasto inter la malŝato al tiu prefikso ĉe kelkaj esperantistoj kun literatura pretendo unuflanke, kaj, aliflanke ĝia ofteco en la spontana lingvo, ĉefe parola, sed ankaŭ letera, vere mirigas min. Mi tute ne scias, kiel klarigi la menciitan malŝaton. Ĉu tiuj aŭtoroj hontas pri la ekzisto de *mal*- kun tiu senco? Temas ĝenerale pri homoj el latinidaj lingvoj aŭ kun alta estimo al la latina; eble ĝenas ilin, ke *mal*- en tiu lingvofamilio laŭdevene signifas ,malbona' (dum en la slava, ĝi signifas ,eta' aŭ ,malmulta': en la rusa, *sil'nyj* signifas ,forta', *malosil'nyj* ,malforta', t.e. ,malmultforta', ,malgrandforta').

Aŭ ĉu ĝenas la sono? Ĉu ĝi estas tro aŭdebla? Verŝajne intence Zamenhof elektis prefikson speciale klarsonan, ĉar li opiniis grava tuj distingi ion disde ties malo. Ĉu ĝenas la ofteco? Min tio ne ĝenas, sed miajn kriteriojn difinis vivo malsama ol tiu de la homoj, kiujn *mal*- agacas. Ĉu ĝenas la dubsenceco? Estas vere, ke vortoj kiel *malmanĝi* povas egale signifi ,vomi' aŭ ,feki',

kaj ke kelkaj aliaj, kiel *maltima*, ne estas tute certe kompreneblaj komence. Sed tio rilatas al ege malgranda nombro da radikoj.

Ĉu ili riproĉas tendencon konfuzi la *mal*-vorton kun ĝia kontraŭo? Se jes, ili timas nerealan danĝeron. En pli ol dudek jaroj da atenta aŭskultado kaj da registrado de parola esperanto mi neniam spertis unu miskomprenon ŝulditan al *mal*-. Mi ĉeestis erarojn, ekzemple *malfermi* anstataŭ *fermi*, sed ne miskomprenojn. Similaj eraroj aperas same ofte en ĉiuj lingvoj: vortoj, kiuj rekte kontrastas unu la alian, lokiĝas najbare en nia menso kaj ni facile diras la kontraŭon de tio, kion ni celas. Ĉar la kunteksto komprenigas la penson, la plimulto el tiuj okazoj restas neperceptataj. Nur esploranto pri lingvo rimarkas ilin. En *Psikopatologio de ĉiutaga vivo*, Sigmund Freud, inter multaj ekzemploj de fuŝ-agoj, citas prezidanton, kiu (germane) diras: „mi fermas la kunsidon“, anstataŭ „mi malfermas“ ĝin; estas do klare, ke tute ne temas pri fenomeno ligita al la lingvo.

Kial ferm kaj malferm?

Koncerne la vortojn *fermi* kaj *malfermi* multaj kritikis, ke Zamenhof elektis *ferm* kiel bazan radikon, de kiu oni derivas la vorton *malfermi*. Kial li tion faris? Rapida kontrolo montras, ke *ferm* ne estas pli ofta. Sed malprave, miaopinie, oni vidas en tiu elekto eraron.

Zamenhof havis eksterordinaran psikolingvikan intuicion, kiun li plej ofte sekvis, tute saĝe. Nu, ŝajnas, ke por nia menso, la baza koncepto estas stato. Ago, kiu ŝanĝas tiun staton, estas io malpli fundamenta.

Komodo ŝajnas pli normala kun la tirkestoj fermitaj. En librovendejo aŭ biblioteko, la granda plimulto el la libroj estas fermitaj. En vinbutiko, la boteloj estas ŝtopitaj. En dormoĉambro lito estas kovrita (aŭ, en kelkaj landoj, volvita). Ie, funde de nia nekonscia menso, ni rigardas fermecon la normala stato. La alia normala stato estas, ke troviĝu nenio fermebla: baze, diras nia menso, aŭ ne troviĝas pordo (nur libera pasejo), aŭ ĝi estas fermita. Malfermi estas ago, kiu likvidiĝas en eta momen-

to, kaj do ne havas same densan ekziston kiel la longa, daŭra konstanta stato de fermiteco. Se, revenante el ferioj, vi vidas de malproksime, ke viaj pordo kaj fenestroj estas malfermitaj, via tuja reago estas, ke io estas ne en ordo. Similajn faktojn nia menso nekonscie registras ekde la plej juna infaneco. Tial por ĝi, ‚malfermi‘ rompas ion en la normala stato de aferoj, kaj estas do **derivita** koncepto.

Verŝajne pro tiu universala maniero koncepti, la plimulto el la lingvoj rigardas la fermitan kaj similajn statojn plej bazaj, tiel ke fermo esprimiĝas per simpla radiko, dum la vortojn por la ideoj proksimaj al malfermado oni derivas el la baza ‚ferm‘-verbo helpe de afikso. En aviadilo, la stevardino diras angle: „*Fasten your seat belts*“ (fermu viajn sekurzonojn), kaj la vorto uzata por signi malfermon estas *unfasten*. En la franca, oni diras *verrouiller / déverrouiller* (‚rigli‘ / ‚malrigli‘), *boucher / déboucher* (‚ŝtopi‘ / ‚malŝtopi‘); *couvrir / découvrir* (‚kovri‘ / ‚malkovri‘); *voiler / dévoiler* (‚vuali‘ / ‚malvuali‘); *lier / délier* (‚ligi‘ / ‚malligi‘); *nouer / dénouer* (‚nodi‘ / ‚malnodi‘); *visser / dévisser* (‚ŝraŭbi‘ / ‚malŝraŭbi‘); ktp. La origina vorto ĉiufoje indikas fermon, t.e. malebligon de rekta percepto aŭ de libera ago, kaj malfermo esprimiĝas derive.

En la angla oni diras *to lock / to unlock* (‚ŝlosi‘ / ‚malŝlosi‘); *to pack / to unpack* (‚paki‘ / ‚malpaki‘); *to button / to unbutton* (‚butoni‘ / ‚malbutoni‘); *to latch / to unlatch* (‚klinke fermi‘ / ‚klinke malfermi‘); *to bolt / to unbolt* (‚rigli‘ / ‚malrigli‘); *to tie / to untie* (‚ligi‘ / ‚malligi‘)... En la gemana ni havas *schließen / aufschließen* (‚ŝlosi‘ / ‚malŝlosi‘); *wickeln / entwickeln* (‚volvi‘ / ‚malvolvi‘); *decken/entdecken* (‚kovri‘ / ‚malkovri‘)...

La rumana, en kiu ‚fermi‘ diriĝas *închide* kaj ‚malfermi‘ *deschide* konfirmas tiun regulecon, pri kiu ni trovas multajn ekzemplojn ankaŭ en la rusa. La rumana prefikso *des-*, kiel la franca *dé-*, *dis-* ja respondas ĝenerale al la esperanta *mal-*, kaj la radiko *chide* (prononcu: *kide*), parenca al la itala *chiudere*, al la franca *clore*, fakte signifas ‚fermi‘. La rumana vorto do estas ekzakte paralela al nia *malfermi*. Ankaŭ la malnovfranca havis similan verbon: *desclore*, ‚malfermi‘ La nuntempa franca *éclore*, ‚malfermiĝi‘ (parolante pri floro, kiu estis burĝona), prezentas

plian ekzemplon de kazo, en kiu la vorto pri malfermo derivas de la vorto signifanta ‚fermi‘ (*clore*).

Finan ekzemplon ni ĉerpu ekster Eŭropo. En la svahilia, la verbo ‚malfermi‘ formiĝas el ‚fermi‘ kiel regula *mal*-derivajo: *kufunga*, ‚fermi‘, *kufungua*, ‚malfermi‘, aŭ *kufumba*, ‚fermi‘, *kufumbua*, ‚malfermi‘ (komparu *kukunja*, ‚volvi‘, *kukunjua*, ‚malvolvi‘; *kufuma*, ‚teksti‘, *kufumua*, ‚malteksti‘; *kuvaa*, ‚vesti sin‘, *kuvua*, ‚malvesti sin‘, ‚senvestigi sin‘).

Tiuj ekzemploj ŝajnas al mi sufiĉaj por montri, ke Zamenhof ne mispaŝis elektante *ferm* kiel bazan radikon.

Ena filozofio

Kial *mal*- tute ne ĝenas min? Eble ĉar mi lernis la lingvon estante 11-12-jara, kaj do ne havante la saman lingvan fonon kiel plenkreskuloj jam lernintaj la latinan aŭ similan lingvon. Se, kiel mi supozas, esperanto logas homojn, kiuj deziras novan, pli egalecan manieron interrilati, estas normale, ke multaj havas, fone de la menso, la penson: „Kial unu homo (Zamenhof) daktu al mi, kiel mi esprimu min? Mi estas lia egalulo. Ankaŭ miaj ideoj samrajtas“. Tia rigardo al la lingvo konformas al ĝia spirito, aŭ pli ĝuste al ĝia etoso. Tie fontas la reformemo de multaj esperantistoj.

Sed infano malsame reagis. Kiam mi lernis la lingvon, *mal*-*multa* kaj *mal*-*granda* estis simple por mi oportunaj vortoj, kiuj klare esprimas sian sencon, en sistemo, kiun mi tutkore aprobis, ĉar ĝi estas tute konsekvenca, kio ĝenerale plaĉas al infanoj. Mi ne zorgis pri etimologio, same kiel anglalingvan infanon ne ŝokas la fakto, ke *grandson*, ‚nepo‘, *granddaughter*, ‚nepino‘, *grandchildren*, ‚genepoj‘, povus esti konsiderataj kiel lingvaj monstraĵoj, ĉar la prefikso devenas de franca vorto signifanta ‚granda‘, sed aplikiĝas al homoj pli etaj, fakte anstataŭante francan prefikson kun la senco ‚malgranda‘ (en la franca, oni diras respektive *petit-fils*, *petite-fille*, *petits-enfants*, kaj *petit* signifas ‚eta‘).

Ne nur *mal*- ne ŝokis min, sed mi vidis en ĝi senfine fekundan vortformilon, plej bonvenan. Mi suspektas, ke pli poste,

kiam mia plej ŝatata ĉina korespondanto enkondukis min en la orientazian pensmanieron, kaj kiam mi lernis lian lingvon, mi estis influata de Dao-ismo (*Tao-ismo* laŭ PIV, sed mi preferas la oficialan ĉinan transskribon *Dao*). Plaĉas al mi la ideo, ke ie en *malbona* kaŝiĝas ‚bono‘, en *malforta* ‚forto‘, en *malgranda* ‚grandeco‘, en *malami* ‚ami‘. Tradicia ĉina mondrigardo, laŭ kiu io enhavas la ĝermon de sia kontraŭo, kaj ankaŭ laŭ kiu ĉiu adjektivo estas relativa, akordas kun mia maniero aliri la realon.

Verdire, ĝian ĝustecon ĉiutage konfirmas mia profesio. Kiom da forto kaŝiĝas en iu malforta, kaj kiom da malforto en fortulo! Kiel proksimas unu al alia amo kaj malamo! Kaj kiom da psikologia progreso, kiam homo ĉesas kompreni adjektivojn kiel ion absolutan, difinitan per si mem, dum fakte ili postulas referencon. Ĉu *malgranda* elefanto ne estas imprese *granda*? Ĉu ne kortuŝe *malgranda* la plej *granda* formiko? Tio, kio *malfacilas* al mi, eble estas por vi plej *facila*. Kiam homoj suferantaj pro „komplekso pri malplivaloro“ komprenas, ke en la frazo „mi estas malforta“ aŭ „mi konstante malsukcesas“, la vortoj *malforta* kaj *malsukcesas* rilatas al nur unu aspekto de ili, kaj ke ie ili havas ankaŭ forton kaj sukcespovon, ili ekiras la vojon al plena liberiĝo el tiuj turmentaj ideoj pri si mem, venenan al la vivĝojo.

Ni rimarku, ke simila saĝeco troviĝas ankaŭ en okcidento: „Feliĉaj la malfeliĉuloj, amataj la malamataj, altaj la malaltuloj“ klare sonas en la mesaĝo de la krista surmonta prediko. Iu filozofia ludo kaŝiĝas en la *mal*-vortoj, kiu ege plaĉas al mi. Sed estas vere, ke Kartezio (francanome Descartes) ege malhelpis kompreni tiun aliron al konceptoj, rigardataj kiel duvizaĝaj.

Jes, *mal*- ricevas de mi fervoran ŝaton kaj estimon. Kiam mi legas tutan tekston sen ĝi - ekzemple la iltis-an *Literaturan Manifeston* - mi havas la impreson, ke mankas io, kaj instinkte mi konkludas, ke la aŭtoro ne kapablas verki nature, ke li ne posedas la normalan lingvon, la *realan*. Subjektiva mi estas, ĉu ne? Kompreneble! Sed ĉu ne ankaŭ ili, kiuj kondamnas *mal*- ?

4. EMO DIFINI, EMO ELVOKI

Angoro kaj trovalorigo de la maldekstra cerbo

La fakto, ke *mal-* povas uziĝi senbare, estas aspekto de la mutacio. Sed mutacio signifas rompon, kaj rompo dolorigas. Aŭ ĝi vekas neelporteblan angoron.

Tian angorigan rompon travivis la homaro, kiam sciigis, ke la stabila tero, apogita sur fortikaj fundamentoj, kiu estis ĝia vivejo, fakte estas nur pilketo ŝvebanta en nesolida medio. Imagu! Ni estis la centro de la universo; nin protektis plafono nomata ĉielo, ornamita de lumiloj, kiuj iras sur ĝi sian regulan iron; la ebenaĵo, sur kiu ni staris, sentiĝis plej firma; kaj ĉion ĉi oni ekmontras eraro, iluzio, kaj la grundon oni forprenas de sub ni por tien loki abismon! Terura bato tiu rivelis estis.

Pro ĝi, verŝajne, okazis la filozofia renverso de Kartezio. Se ni ne plu povas fidi la evidenton pri la ekstera mondo, kie trovi ion firman? Kartezio imagis, ke tion povas doni nur logiko kaj pensado: eĉ la scion pri la propra ekzisto li pendigis de pensado: *mi pensas, do mi estas*. Kiel malsame homoj reagis! Mian ekzistosenton mi perceptas el sufero kaj ĝuo, el konscio pri mankoj kaj pleniĝoj, el mia povo ami kaj admiri... Sed mi ne estas filozofo.

Estu kiel ajn, la terura timo, kiu kaptis la eŭropanojn subite konsciajn pri sia sur-abisma situo, stimulis, helpe de Kartezio, la maldekstran cerbon. La rezultoj de tiu mensa revolucio, kiu, verdire, ĉefe trafis Okcidenton, sentiĝas ankoraŭ nun: la hodiaŭa universitata etoso, pure intelekta, la publika instruado, nia civilizacio materia estas stampitaj per tiu supervalorigo de penso super sentado, de dedukto super intuicio, de kredo super fido.

Franca edukprincipo influas lingvan konceptadon

Kartezio estis franco, kaj liaj ideoj pli influis la francan kulturon ol la aliajn (sed la plimulto el la postaj plej influaj filozofoj,

kiuj iris similan vojon, portante pensadon pli supren ol ĉion alian, estis germanoj; sekve, la germana kulturo simile ĉefvalorigis la maldekstracerbajn funkciojn: pensado, disciplino, rigoro, pedanta precizeco alte rolas tiugente). Nu, la franca pensmaniero ludis aparte gravan rolon en nia lingvo. Tio okazis parte, verŝajne, pro la prestiĝo, kiun la franca kulturo havis fine de la pasinta jarcento, kaj parte pro tio, ke francoj fariĝis tre gravaj en la movado ekde la komenco de la nuna. Ne hazarde la unua kongreso okazis en Francio, kaj la dua en franclingva urbo. Ankorau nun, franclingvanoj estas strange multnombraj en la Akademio. La ĉefredaktoroj de niaj plej prestiĝaj vortaroj, *Plena Vortaro* kaj *Plena Ilustrita Vortaro*, estas francoj. Franco kunaŭtoris *Plenan Analizan Gramatikon*.

Nu, la francoj aliras sian lingvon, kaj do lingvojn ĝenerale, malsame ol la plimulto el la aliaj popoloj. Franca infanedukado ege emfazas la neceson uzi pri ĉio la „ĝustan terminon“. Kaj ie, en la subkonscio de l'francoj, flagras la ideo, ke la spontana vorto, la infane kreita, ne estas la ĝusta, ĉar ĝi sonas tro simple.

Dum la lasta somero, mi ĉeestis jenan scenon, kiu verŝajne estus neimagebla en alia lando ol Francio. Mia edzino kaj mi gastis ĉe terkulturisto, samtempe vinproduktisto, viro klera, kiu pasigas multan tempon surtraktore kaj mane laboranta, sed kiun ankaŭ karakterizas alta intelekta nivelo kaj ekonomi-konscia maniero prizorgi sian bienon. Ni parolis pri la vetero kaj lia edzino diris: „Mi aŭdis ĉe la radio, ke la nulopunkto troviĝas je alteco de 4000 metroj“. Ekkoleris la viro kaj diris: „Min incitas via maniero neniam uzi la ĝustan vorton. Se vi parolas pri *izotermo* diru *izotermo*, ne *nulopunkto*.“ Certe troviĝis, baze de tiu reago, ia geedza konflikto, sed en kiu lando edzo ema riproĉi sian edzinon elektus kiel pretekston la neuzon de komplika, sciencia vorto en plej banala interparolo privetera?

Jen alia ekzemplo. Tuj post la dua mondmilito, Belgio kaj Svislando havis pli altan vivnivelon ol Francio, kaj, kontraste kun tiu, disponis dolarojn, kiuj ebligis importi multon el Usono. Inter la novaj varoj, kiuj tiel atingis ilin, troviĝis la unuaj magnetofonoj. Kaj en Svislando kaj en Belgio, franclingvanoj nomis ilin *enregistreurs*, ĉar la funkcio de tiuj aparatoj ja estas *enregistrer* (.registri'; tiun vorton oni uzis por

surdiskigo). Se riskis okazi konfuzo kun alia tipo de „registrilo“, oni diris *enregistreur magnétique*.

Kaj jen post kelkaj jaroj similaj aparatoj fine aperis en Francio. La francoj, ignorante jam radikiĝintan lingvouzon en du francilingvaj regionoj - tri, fakte, ĉar en Kanado oni uzis *enregistreuse* - organizis fakkunvenojn por diskuti pri la termino kaj akuŝis je *magnétophone*, bela sciencosona vorto, kies ĉefa kvalito estis verŝajne, ke ĝi estis ne tuj komprenebla - kontraste kun *enregistreur* - kaj do pli probable respondis al la nekonsciaj kriterioj de „la ĝusta termino“.

En Francio, do, kiam infano uzas „neĝustan terminon“, oni korektas ĝin. Tio kredigas al ĝi, ke nur unu vorto estas uzebla por unu koncepto, aŭ ke, se ĝi uzos vorton kun pli vasta signifo, ĝi eraras, ĝi agos malbone. Tial konceptoj, kiuj alipopole inkluziviĝas, ruspupe, unu en la alian, staras aparte kaj kontraste en la franca menso. Anstataŭ inkluzivi, la francoj kontrastigas.

Ekzemple, kiam franca infano, ekvidinte unuĝiban kameleon krias: „*Oh! Un chameau!*“ („Ho! Kamelo!“), la patro tuj korektas: „*Ce n'est pas un chameau, regarde, il n'a qu'une bosse, c'est un dromadaire*“. („Ne estas kamelo, rigardu, ĝi havas nur unu ĝibon, estas *dromedaro*“). En la aliaj gentoj, la kategorio „kamelo“ **inkluzivas** la subkategorion „dromedaro“. (Rigardu la desegnaĵon sur la pakoj de *Camel*-cigaretoj). Ne ĉe la francoj. Tie, la dromedaroj ne estas kameloj, ili, pro la eduksisistemo, fiksiĝas en la menso precize kiel io **kontrasta** al kameloj, kiel io atentinde plej nekamela: „**Ne estas kamelo, estas *dromedaro***“. (En alia popolo, patro deziranta klerigi dirus: „*Ho jes, kamelo! Tian unuĝiban kameleon oni nomas **dromedaro***“). Kiel ofte, la spontane uzata vorto facile prononceblas (*chameau* elparoliĝas /ŝamó/), dum la altrudita de la gepatroj estas pli komplika: plia ekzemplo, ke „la ĝusta termino“ devas soni barbare.

Nuntempe, se usonano diras al mi „*It is recorded on tape*“ (ĝi estas registrita sur bendo'), li plej probable parolas pri kasedo. *Tape* ‚bendo‘, inkluzivas la bendojn aranĝitajn en maldika skatoleto tiamaniere, ke la du bobenoj ne apartiĝas (alivorte, en kasedo). Ĉe francoj, la vorto *bande* ne inkluzivas la bendojn enkasedajn. Se vi diras „*enregistré sur bande*“, franco bildigas al si unusolan bobenon, kies bendon vi povas tuj mane tiri kaj mal-

volvi, kaj kiun vi devas mem alkroĉi al malplena bobeno. Se temas pri bendo enkaseda, vi devas nomi ĝin *cassette*, kaj franco normale eĉ ne pensas pri tio, ke la aĵo en ĝi fakte estas *bande*. Kiam la koncepto „kasedo“ aperis, anglalingvanoj ĝin **inkluzivis** en la pli vastan koncepton „bendo“, francoj ĝin **kontrastigis** al ĝi.

La franca maniero procedi, kiu radikas en la sistemo kartezia (Kartezio ja emfazis la neceson rezoni per *ideoj klaraj kaj apartigitaj*), ial transformiĝinta al io pedante aplikenda, rajtas je respekto. Fakte, lingvo tiagrade enplektiĝas kun penso, ke pensi laŭ la inkluziva sistemo estas por multaj francoj tre malfacile, se ne diri neeble. Kiam mi klarigas al franco, ke la objekto, kiun li nomas *fauteuil* („brakseĝo“, „apogseĝo“) estas iu formo de seĝo, kaj ke usonano povas nomi ĝin *chair*, „seĝo“, sen la precizigaj vortoj (la preciza esprimo estas *armchair*, *overstuffed chair*, *easy chair* aŭ *comfortable chair*), tre ofte venas la reago: „*Sed fotelo ne estas seĝo!*“ Rigardante brakseĝon, multaj francoj ne povas imagi, ke oni povas klasi tiun meblon inter la seĝojn: ĝi estas io alia, apartenanta al tute malsama kategorio.

Sed la fakto, ke iu pensmaniero respektindas, ne signifas, ke ĝi estas oportuna. Por intergenta lingvo, la franca sistemo ja alportas kun si seriozajn malavantaĝojn.

La signif-amplekso de la vortoj: io konvencia

La insisto pri „la ĝusta termino“, pro la aĝo, kiam la infano komencas ĝin preni serioze, fiksas en la nekonscia menso la ideon, ke la realo jam estas dividita en konceptojn, ĉiu el kiuj estas nomita, aŭ almenaŭ nomebla kaj nomenda. Ĝi emigas pensi, ke „verdo“ ekzistas per si mem, kiel io per si aparta de „bluo“. Fakte, la realo de la spektro estas kontinua, kaj ke oni metas la limojn tien kaj ne tien ĉi, estas arbitra tradicio de la koncerna kulturo. Kiam ĉinlingva konato, kun kiu mi foje trinkis kafon en la Singapura flughaveno, mire rimarkis, ke la tiea sukero estas *huang*, li uzis vorton, kies kutima traduko estas „flava“. Tiu nerafinita sukero estis bruna por miaj okuloj kaj menso, sed la ĉina

huang havas alian signifkampon ol nia *flava*: ĝi etendiĝas al tio, kion ni nomas *bruna*.

Simile la du kontrastaj francaj konceptoj *fier*, ‚fiera‘, kaj *orgueilleux*, ‚malhumila‘, ‚orgojla‘, estas grupigitaj en la angla en la saman kategorion: *proud*. Aŭ, eble eĉ pli trafe, konsultu la esperanto-vortaron de Wells: vi vidos, ke *voli* estas tradukita kiel *to want*, sed ke *to want* estas tradukita, unue, kiel *deziri*. Nu, ĉe multaj popoloj *voli* kaj *deziri* estas du tute malsamaj aferoj. *Voli* ja estas diri jes aŭ ne al sia *deziro*, tiu verbo signas la reagon al la deziro, kaj sekve elekton, decidon, dum *deziri* signifas „senti inklinton al“ kaj elvokas naturan, spontan anperon de tiu inklino. (*Voli* estas la reago de la maldekstra cerbo al *deziro* unue ŝprucinta cerbobaze). Tiun distingon la anglalingvanoj ĝenerale ne faras.

Reciproke, la franca havas nur unu vorton, *crier*, ‚krii‘, por la diversaj manieroj alvoki aŭ laŭtsone esprimi emociion, kiu por anglalingvano tre diferencas unu de la alia, kaj kiujn li vortigas per tiaj verboj kiel *shriek*, *shout*, *yell*, *scream*, *call out*, *roar*, ktp.

Se ni imagas, ke al ĉiu koncepto de nia kulturo respondas iu realaĵo, ni malfacile akceptas, ke diversaj eroj de nia vortprovizo povas ne havi unuvortan, ekzaktan tradukon en la internacia lingvo. Ni konfuzas tiun mankon kun malriĉeco. Sed tio ĝi ne estas. La angla estas unu el la plej riĉaj lingvoj en la mondo laŭ la nombro da vortoj kaj da nuancoj, kiujn ili ebligas esprimi. Tamen ĝi ne povas eldiri per unu vorto konceptojn kiel *samrasano* aŭ *samlingvano*, mankas al ĝi ordinara vorto por la koncepto *voló*, kaj por traduki la simplan francan adverbos *frileusement* (kies signifo proksimiĝas al „malvarmtimule“; Zamenhof uzis tiusence *frosteme* kaj *fornosidiste*, sed ĉu tiuj esprimoj ankoraŭ kompreneblas?) ĝi bezonas longan ĉirkaŭvojon, ekzemple: *with the kind of shivering movement typical of people particularly sensitive to cold*. Tian simplan vorton, kia estas nia esperanta *meblo*, la riĉega angla lingvo povas traduki nur per komplika multisilabaĵo: *piece of furniture*. Ke multaj esperantaj vortoj ne estas unuvorte tradukeblaj en la francan aŭ la anglan, kaj reciproke, tio estas tute natura: ĉiu

lingvo distranĉas la realon laŭ propraj anguloj, en tranĉojn kun malsamaj formoj kaj grandecoj.

Ni grupigas en unu koncepton, „ami“, vastan kampon da diversaj sentoj, kiu estis dividita en tri kategorioj en la malnovgreka: *agapan*, *filein*, *eran*, depende de tio, ĉu temas precipe pri larĝkora akceptemo, pri amikeca korinklino aŭ ardo pasia.

filein	}	AMI
eran		
agapan		

Se ni bezonas distingi tiujn tri formojn de amrilato, ni precizigas per adverboj aŭ aliaj elementoj. Sed ofte ni ne faras la distingon, eĉ en lingvoj ĝenerale rigardataj kiel riĉaj. En la johana evangelio, ekzemple, troviĝas loko (21, 15-18), kie trifoje Jesuo demandas Petron, ĉu tiu lin „amas“, kaj Petro ĉiufoje respondas jese, uzante verbon, kiu signifas „ami“. En la tradukoj kutime uzataj en la laŭdire riĉaj lingvoj de Okcidento, revenas ĉiufoje la sama vorto (*aimer*, *to love*, *liebhaben* k.s.), dum en la greka originalo du malsamaj verboj uziĝas.

Ĉiu kulturo havas sian aliron al la pens- kaj komunik-objektoj. La eŭropa maniero koncepti la geflojn de samaj gepatroj estas laŭseksa. Sed ekzistas lingvoj, ĉe kiuj ne la sekso estas konsiderata, sed la aĝo. Ekzemple, en la joruba, lingvo parolata en okcidenta Afriko, la divido estas inter pli aĝa kaj malpli aĝa, senkonsidere pri tio, ĉu la gefratoj estas viraj aŭ inaj. En la ĉina, ambaŭ faktoroj estas atentataj, tiel, ke ĝi havas kvar vortojn entute, du por nia *frato* kaj du por nia *fratino*:

<u>Esperanto</u>		<u>Joruba</u>	
<i>frato</i>	<i>fratino</i>	<i>ègbón</i> ,pli aĝa frat(in)o'	<hr style="border: 0; border-top: 1px solid black; margin-bottom: 5px;"/> <i>àbúrò</i> ,pli juna frat(in)o'
<u>Ĉina</u>			
<i>gege</i> ,pli aĝa frato'	<i>jiejie</i> ,pli aĝa fratino'	<i>didì</i> ,pli juna frato'	<i>meimei</i> ,pli juna fratino'

La ideo, ke esperanto estas malriĉa, rezultas el miskompreno pri la diversaj manieroj, laŭ kiuj la malsamaj kulturoj distranĉas aŭ aranĝas en konceptojn la realon aŭ mondojn fantaziajn. Por ĉino, la eŭropaj lingvoj estas ege malriĉaj en sia vortprovizo ebliganta paroli pri familiaj rilatoj. Por nia koncepto *onklo*, la ĉina havas malsamajn vortojn depende de tio, ĉu temas pri pli aĝa frato de la patro, pli juna frato de la patro, frato de la patrino, edzo de la fratino de la patro, edzo de la fratino de la patrino, ktp.

Tiu atribuo de malriĉeco al esperanto parte ŝuldiĝas al la franca ideo pri „la ĝusta vorto“, kiu ne akceptas, ke la realo aŭ fikcio dividiĝu en konceptojn laŭ aliaj anguloj ol en la gepatra lingvo. Sed eĉ sen ĝi, natura etnocentreco, kombinita kun ideoj prilingvaj naskitaj en infanaĝo kaj neniam forlasitaj, malhelpas kompreni la diferencon inter vortoj aŭ konceptoj unuflanke, la priparolataj realo aŭ fikciaĵoj aliflanke.

Kiu ajn la kaŭzo, multaj havas la impreson, ke esperanto estas malsupera al la nacilingvoj kaj ke, sekve, necesus ĝin altigi al ties nivelo. Tiucele ili rekomendas enkonduki en ĝin

vort-por-vortajn tradukojn de ĉiu koncepto, por kiu ilia lingvo havas terminon. Puraj estas tute certe iliaj intencoj, sed ilia celo estas nerealigebla. Esperanto ja disvastiĝis al ĉiuj partoj de la mondo, kaj montras ekster la eŭropa kultursfero viglecon, kiu pravigas pensi, ke ĝi tie firmiĝos kaj uziĝos pli kaj pli. Se ĉiu popolo rezonos kiel la francoj kaj iliaj samopinianoj, kaj postulos esperanto-vorton por ĉiu vorto de sia lingvo, nia vortprovizo fariĝos tiel giganta, ke ĝi ne plu uzeblas. Imagu la situacion, kiam por ĉiu familirilato laŭ la ĉina kulturo ni havos novan radikon, kaj same pri multegaj aspektoj de la materia, socia, psika kaj alikampa vivo! Francilingva tradukisto ne taksas sian lingvon malriĉa, ĉar por multegaj anglaj vortoj ĝi ne havas laŭvortan tradukon, li nur lernas la arton esprimi personon, kaj ne vortojn. Tion bonaj esperantistoj instinkte faras nun, plej sukcese. Kiamaniere? Ili aplikas du principojn: (1) distancigi sin de la vortaroj; (2) sin demandi: „kion mi volas diri?“

Alivorte, ili faras tion, kion vi nature faras, kiam, parolante vialingve al vialingvano, vi ĵus uzis vorton, kiun li ne konas: vi klarigas per aliaj vortoj la aferon. La granda avantaĝo de esperanto estas, ke la klarigon ĝia struktursistemo povas ege densigi.

Ekzemple, francino foje diris al mi: „Mi bezonas la neologismon *timida*, ĉar kiam mi estis juna, mi estis tre timida, sed ne timema. En esperanton la francan vorton *timide* oni tradukas per *timema*. Ne *timema* mi estis“. Ŝia eraro estis kredi la vorton. Ĉar ŝi tie trovis *timide* = *timema*, ŝi ne serĉis pluen. Fakte, kion ŝi volis diri? La franca koncepto *timide* (kaj la similaĵoj de multaj eŭropaj lingvoj) grupigas serion da reagoj, sentoj, kondutoj, kiuj estas tre diversaj.

Aserti, ke ĉar esperanto ne havas unu vorton, kiu kovras la saman grupon, ĝi estas malriĉa, egalus deklari, ke la malnovgreka ne estas riĉa, ĉar ĝi ne havas **unu** vorton por nia sentogrupo „ami“, aŭ la angla, ĉar mankas al ĝi **unu** vorto por la diversaj manieroj laŭtvoki, kiun ni nomas *krii*, aŭ la ĉina, ĉar ĝi ne povas **unu**vorte esprimi nian koncepton „onklo“, aŭ la franca, ĉar ĝi havas vortojn por „krajono“, „plumo“, „kreto“, sed nenion samsencan al nia pli ĝenerala *skribilo*.

En esperanto la franca koncepto *timide* povas esprimiĝi per tre multaj vortoj kaj esprimoj, ĉiu kun la propra nuanco kaj la propra signif-amplekso. Jen kelkaj: *sinĝenema*, *malaplomba*, *ruĝiĝema*, *hontema*, *inklina sin ĝeni*, *ema ne aserti sin*, *ema re-tiriĝi en sin*, *ema konscii alies rigardon*, *nerebatema*, *ne ŝatanta elstari en grupo*, *neassertema*, *timema*, *gruptimema*, *timema pri nekonajoj (aŭ nekonatoj)*, *sendecida*, *malcerta pri si*, *evitema*, *alfrontevitema*, *nealfrontema*, *malinklina sin enĵeti*, *ne montriĝema*, *ĉiam provanta malplej elstari*, *nememfida*, *manka je memfido*, *facile ŝanceliĝanta*, *embarasiĝema*, *retropaŝema*, *facile lasanta alian imponi al li aŭ ŝi*, *inklina senti psikan paralizon*, *inklina senti sin fuŝa*, *ĝene memkonscia*, ktp ktp. Fakte, la vortoj *sinĝenema* kaj *malaplomba* havas praktike la saman signifkamon kiel la franca *timide*. Mi listigis la aliajn simple por montri, kiavoje oni serĉu. Kaj ankaŭ por ilustrati la fakton, ke estas normale uzi plurvortan esprimon por traduki unuvortan koncepton de la fontlingvo.

Paradokse, kiam estas rilato inter la francaj ideoj pri „la ĝusta vorto“ kaj tiuj pri malriĉeco, la pedanteco, kiun stimulas tia maniero kompreni lingvon, fakte efikas al ĝi malriĉige. Anstataŭ permesi, ke la penso situu jen je tiu nivelo, jen je tiu alia, kaj do disponu pli multajn variaĵojn en la esprimado, oni trudas nur unu. Tion povas ekzempligi la manio, ĉi-foje ĉefe renkontata ĉe germanlingvanoj - kies kulturo, kiel ni vidis, ankaŭ favoras pedantecon - nepre anstataŭigi la spontane ŝprucantan *pensi per opinii*, kiam temas pri opiniesprimo. La fakto, ke similkaze oni diras en la angla *I think*, en la rusa *ja dumaju*, en la ĉina *wo xiang*, en la franca *je pense* jam sufiĉas por montri, ke tio estas tre natura maniero vortigi la ideon „mi opinias, ke“.

Sed fakte ne necesas studi komparan lingvistikon por tion konfirmi: *opinii* ja estas maniero *pensi*, alivorte la koncepto „opinii“ estas **inkluzivita** en la koncepto „pensi“. Vi ne povas opinii sen pensi, ĉefe: vi ne povas esprimi vian opinionon ne pensante ĝin. Kial prezenti kontrastaj konceptojn, inter kiuj la rilato estas inkluziva? Se tiu kutimo disvastiĝus, la sola rezulto estus, ke anstataŭ disponi du manierojn esprimi sin - *mi pensas*,

ke...; mi opinias, ke... - verkistoj kaj esperantoparolantoj disponus nur unu: la lingvo malriĉiĝus.

Timo malprecizi

Sistemo, en kiu konceptoj estas kontrastigataj multe pli ol ili inkluziviĝas, havas duan malavantaĝon por interkultura lingva komunikilo, nome, ke ĝi malhelpas plenan akcepton de la deriva kaj kunmeta vortfarado. Se *brakseĝo* ne estas *seĝo*, aperas stulte nomi ĝin uzante la radikon *seĝ* plus iun precizigan elementon. Tio sentiĝas kiel lama rimedo, kiel konfeso pri malriĉeco, kiun oni iel provas kompensi. Tiu aliro al la lingvo tute kontraŭas la solvon al la dikvortara problemo, kiun Zamenhof kortuŝe priskribis en sia letero al Borovko: esprimi kompleksajn konceptojn per kombino de limigita nombro da eroj.

Kiel ni vidis, la franca maniero kompreni la lingvon favoras pedantecon. Lingva pedanto emas malfidi la ĝeneralajn helpojn al komuniko, kiuj estas la kunteksto, la situacio, eventuale la gestoj. Li ne akceptas, ke, se natura konsento formiĝas pri la signifo de kombinaĵo, komunikado perfekte disvolviĝas. Al li ne sufiĉas, ke la kunmetitaj eroj **elvoku** la koncepton, li volas, ke ili **difinu** ĝin. (Temas pri la malfido de la maldekstra duoncerbo al la dekstra). Tiu sama bezono pri pedanta difino forturnigas de la simpla uzo de simplaj vortoj en situacioj, kiam neniu dubsenceco eblas.

Tipa ekzemplo pri ĉi-lastata fenomeno estas la kutimo, enkondukita de la francoj, anstataŭigi *bona* per *bongusta*, kiam temas pri manĝaĵo aŭ trinkaĵo, eĉ kiam la kunteksto igas ĉion absolute klara. Mi plurfoje ĉeestis jenan scenon inter francaj esperantistoj. Iu ekmanĝas frukton, apudulo demandas: „ĉu ĝi estas bona?“ kaj sperta esperantisto korektas tiun dirante: „oni ne diras *bona*, sed *bongusta* tiaokaze“. Nu, en multegaj lingvoj, oni tiam simple diras „bona“. Estas vere, ke la koncepto „bona“ estas tiel vasta, ke ĝi povas rilati al ĉiaspecaj sferoj, sed la necesan precizigon alportas la situacio. La maniero rigardi, la tono, la fakto, ke unu ĵus ekmanĝis kaj la alia ne, ĉio ĉi precizigas, ke *bona* ne signifas ĉi-kadre „morale bona“, „socie bona“, „bona

por la sano“, „teknike bona“ aŭ „bona“ laŭ alia kriterio. Cetere, *bona* inkluzivas *bongusta*.

...*kaj angoro perdi*

La trovalorigo de la maldekstra cerbo, kiun Kartezio, inter aliaj influoj, trudis al la francoj, ne nur estigis timon pri nesufiĉa precizeco, sed ankaŭ vibrigis ian praan, infanecan angoron perdi, kiu, pro la menciita graveco de francoj en la esperanto-historio, orientis la evoluon de la lingvo laŭ direkto fremda al tiu es fundamenta naturo.

Alpreni internacian lingvon, tio signifas ŝanĝi la nivelon, sur kiu oni komunikas: oni ĉesas troviĝi inter samgenteroj kaj ekrilatas nur kiel kunhomoj. Por tio necesas ion rezigni: malfacile difineblan komunecon de sentoj, spertoj, aludoj, referencoj, unuvorte ĉion specifan, kio ligas inter ili la anojn de iu gento. Bedaŭrinde, rezigni estas seniĝi, kaj seniĝi malfacilas, ĉar tio tro similas al perdo.

Kompreneble, oni perdas nur dum tempo, kaj nur por gajni ion alian, samvaloran, ofte eĉ plivaloran. Sed ne eblas gajni sen komence perdi. Se viaj manoj estas plenaj je io ŝatata, vi povas akcepti ion pli ŝatindan nur unue demetinte, kion vi tenas en ili.

Tiu regulo validas egale, kiu ajn la internacia lingvo. Se mi diskutas angle kun skandinavo, ĉar ni ne havas alian komunan komunikilon, mi devas rezigni multon miakulturan, ĉar tiuj tipoj ne pasas tra la angla kanalo. Ekzemple la fakton, ke se unu el ni diros *his secretary*, la alia ne scios, ĉu tiu estas vira aŭ ina, dum france mi dirus *son secrétaire*, ‚lia (aŭ ŝia) sekretario‘ kaj *sa secrétaire*, ‚lia (aŭ ŝia) sekretariino‘. Aŭ la fakton, ke la distingo inter *tu*, ‚vi‘ (se temas pri iu, kun kiu mi familiaras) kaj *vous*, ‚vi‘ (se temas pri iu, kun kiu mi rilatas malpli familiare) nun perdiĝos, dum eble io simila ekzistas ankaŭ en la gepatra lingvo de mia kunparolanto. Ambaŭ do perdos ion por gajni la eblon komuniki.

Tio estas normala. Nenio valora riceviĝas senkoste. Se mi volas komuniki sur intergenta nivelo, mi devas pagi la prezon.

Feliĉe, ĉi-koncerne, esperanto montriĝas *bona lingvo* durilate: unuflanke, ĉiu perdas malpli ol se alia komunikilo uziĝus; aliflanke, la lingvo estis konceptita por dividi la koston kiel eble plej egale inter la diversaj popoloj.

Ve! Praaj refleksoj ofte malhelpas tion kompreni. La familia medio estas sekuriga, kaj seniĝi, eĉ nur momente, je ĝiaj apartaĵoj sentiĝas terure. Tial multaj esperantistoj provas gajni tutmondan esprimilon sen perdi la trajtojn de la nacia. Ili strebas al io neebila: interkultura lingvo, kiu estu iliakultura.

Mi ne scias, ĉu refoje elmergiĝas mia partiece, sed ŝajnas al mi, ke tio multe pli oftas ĉe francoj ol ĉe aligentanoj. Mi neniam renkontis ĉinan, rusan, britan, aŭ usonan esperantiston, kiu postulis, ke esperanto havu absolute ekzaktan tradukon de tiu aŭ tiu tipe nacia koncepto, kiel mi konstante spertas ĉe francoj (memoru, kion ni diris pri *timida*). Aperas, ke anoj de tiuj popoloj pli konscias, ke alia lingvo ne povas havi saman signifsistemon kiel la propra, dum francoj perceptas en tiu diferenco mankon korektindan.

La timo perdi, kiu do karakterizas multajn francojn rilate al la havaĵoj de sia lingvo, ege influis esperanton. Multo internacie ne necesa, sed tipe franca, enŝteliĝis en la lingvon, nur - se mia hipotezo pravus - ĉar francoj ne komprenis la neceson rezigni iun nombron da francaĵoj por ĝui la pli altan nivelon de internacieco. Verŝajne tial ni diras *magnetofono* anstataŭ *surbendigilo*, verŝajne tial la ege franceca PIV rekomendas *jahurto* anstataŭ la reallingva *jogurto*, verŝajne tial ankaŭ multaj francoj sentas la mankon de pronomo familiara por ‚vi‘, egala al la franca *tu*, kiel malfacile akcepteblan perdon, terure malriĉigan.

Ili ne komprenas, ke riĉi signifas, ne havi ĉion, sed havi multon. La angla, sen samsencaĵo al *tu*, estas ege riĉa lingvo. Krome, se la aliaj popoloj rezonus kiel la francoj, kiom da pronomoj ili rajte postulus enkonduki en esperanton! La indonezia estas eble la plej facila lingvo en la mondo por la meza terano (klare pli facila ol esperanto), sed ĝia facileco estas grandparte fuŝita por fremduloj nur pro tiu pronomo ‚vi‘.

Parolante al nur unu persono, en esperanto, ni diras: *kien vi volas iri?* En la franca estas du ebloj: *où voulez-vous aller?* kaj *où veux-tu aller?* La distingo estas laŭ familiareco. Ankaŭ en la

hebrea estas du formoj, sed la distingo ne rilatas al pli aŭ malpli alta grado de intimeco, sed al la sekso: vi diros *lean ata roce la-leĥet?* se vi parolas al viro, *lean at roca laleĥet?* se al virino. La araba simile funkcias.

En la indonezia, la gamo inkluzivas sekson, aĝon, gradon de familiareco, gradon de respekto, socian relativan situon, ktp: sekve, por esprimi nian simplan vorton ‚vi‘, al infano vi diros *ka-mu* aŭ *engkau*; al superulo *bapak* (sed ne se temas pri virino, ti-am vi diros: *ibu*); al onklino *bibi*; al ŝoforo *supir*; al via patro *ayah*; al nekonata viro *tuan*; al viro iom konata *saudara*, ktp ktp: la listo per tio ne finiĝis! Indoneziano, kiu lernos esperanton, trovos nian *vi* pli facila, sed povos ankaŭ senti la ŝanĝon de lingvo kiel transiron el rafinita mondo al kruda, sennuanca. Nur iom post iom li konstatos, ke la nuancoj perditaj unurilate kompensigas per multaj aliaj ceterloke gajnitaj.

Se ĉi tiu libro povus helpi la francojn konscii, ke alpreni esperanton postulas rezignon je kelkaj proprajoj favore al ĉies plejbono, kaj ke estus tre nejuste, se ĉiam la samaj popoloj devus cedi, kaj la samaj (francoj, latinidanoj) ricevi kontentiĝon, la peno verki ĉi tiun tekston estus vaste kompensata.

5. LA ARTO DE VORTFARADO

Simila vortfarado en malsamaj popoloj

La bezono, ke franca koncepto plej ekzakte esperantigeblu, ligita al nekompreneo pri er-kombina sistemo grandparte bazita sur inkluzivado, kaj ne sur kontrastado, naskis tendencon alpreni novajn radikojn, dum ekzistis kunmetaĵo aŭ derivaĵo perfekte taŭga por esprimi la koncernan ideon. Tiu tendenco estas des pli bedaŭrinda, ĉar malsamaj lingvoj ofte sekvas similajn vojojn por kunmete vortfari. Ni vidis ĉi-supre, ke rilate al la divido en konceptojn, kulturoj ege diferencas, sed rilate al vortfarado ili ofte tre similas inter si: estas do io universala en la maniero konverĝi al unu nova koncepto deirante de du aŭ pluraj antaŭe formitaj. Alivorte, lingvoj el plej malsamaj familioj ofte sekvas egalajn modelojn en la kunmeta procezo.

Ekzemple tri malsamfamiliaj lingvoj povas esprimi la koncepton „bela“, rilate al homo, per kombino de la eroj „bona“ kaj „rigardi“: en la angla oni diras *good-looking* (<*good*, ‚bona‘, *look*, ‚rigardi‘, *ing.* multifunkcia finaĵo), en la ĉina *haokan* (<*hao*, ‚bona‘, *kan*, ‚rigardi‘), en la hebrea *tov-mar’e* (<*tov*, ‚bona‘, *mar’e*, ‚rigardo‘). Saman paralelecon oni retrovas en la hebreaj kaj ĉinaj nomoj de la manĝoj: la hebreaj *aruĥat-boker* kaj *aruĥat-erev* ekzakte respondas, respektive, al la ĉinaj *zaofan* kaj *wanfan*, al la esperantaj *matenmanĝo* kaj *vespermanĝo*. Tria ekzemplo: la vorto ‚hospitalo‘, ‚malsanulejo‘, rezultas el sama kunmeto en la tri historie senrilataj lingvoj germana (*Krankenhaus* <*krank*, ‚malsana‘, *Haus*, ‚domo‘), hebrea (*bet-ĥolim* <*bet*, ‚domo‘, *ĥolim*, ‚malsanuloj‘) kaj malaja-indonezia (*rumah sakit* <*rumah*, ‚domo‘, *sakit*, ‚malsanuloj‘).

Por kompreni esprimojn tiamaniere formitajn, oni devas scii, ke vorto estas kvazaŭ la standardo aŭ ŝildo, kiu signas la teritorion, kaj ne la ĉirkaŭbarilo, kiu difinas ĝian tutan amplekson. Vortoj, kiel *fervojo*, *orfiŝo*, *terpomo*, *flava febro*, k.s. estas tute oportunaj, kvankam oni ne povas dedukti ilian signifon el la konsistigaj eroj. Ke ili ne starigas problemojn praktike, tion pravas la fakto, ke oni neniam proponis neologismojn por ilin

anstataŭi. La granda avantaĝo de tiaj formajoj estas, ke ili ege helpas memoron. Estas pli facile trovi ion, kio situas je la interkruciĝo de du konataj vojoj, ol ion lokitan ie sur tereno, kie vojmontriloj mankas.

Tiu sistemo, kiun ĉiu lingvo uzas, jen multe, jen malmulte, funkcias bone nur, se oni rezignas pedantecon. Foje mi defendis la uzon de la vorto *terkulturisto*, kiun mi taksas pli konforma al la spirito de esperanto ol *agrikulturisto*, necesiganta la iom pezan radikon *agrikultur*, kaj eĉ ol *agrokulturisto*, kiun mi sentas nenatura: mi dubas, ĉu la vorto *agro* vere apartenas al la „reala lingvo“; mi neniam aŭdis ĝin. Sed mia kunparolanto diris, ke ni bezonas alian vorton, ĉar multaj „agrikulturistoj“ ankaŭ bredas bestojn kaj do ne estas ĝuste ilin nomi laŭ nura terlaboro.

Sed kial imagi, ke *terkulturisto* estas „nur kulturisto de tero“? La vorto estas la standardo, kiu konigas la teritorion, sed tiu povas esti multe pli vasta, ĝi tre bone povas inkluzivi ankaŭ bestobredadon. Se temas pri persono, kiu ĉefe bredas, kaj nur apude kulturis kampeton, ni nomu lin *bestobredisto*. En malsanulejo, krom malsanuloj troviĝas ampleksa alia personaro: kuraca, flega, laboratoria, administra, farmacia, ktp. La fakto, ke tiom da lingvoj uzas la kombinon „malsanuldomo“ por signi hospitalon, montras, ke la sistemo tre bone povas funkcii allasante pli malpli vastan nedifinitan marĝenon.

La ĉefa karakterizo sufiĉas por nomi la tutan signifkampon, kiun, fakte, finfine difinas la lingvouzo. Esperanto aparte taŭge funkcias tiukampe, pro la distingo, kiun ĝi ofte faras, praktike, inter kunmetita vorto kaj, se tiel diri, vorto akompanata. Estas interese konstati, ke, tiurilate, ĝi funkcias kiel la ĉina. Ekzemple ni diras *orfiŝo* por nomi vivantan fiŝon kun ora, oranĝa aŭ ruĝa koloro. Se ni volas paroli pri juvelo el oro kun la formo de fiŝo, ni diras *ora fiŝo*. Tio perfekte paralelas la ĉinan: *jinyu*, ‚orfiŝo‘, *jinde yu*, ‚ora fiŝo‘, kaj, se mi ne eraras, ankaŭ la anglan, kiu distingas inter *goldfish* kaj *golden fish*. Simile, la vojo, sur kiu pasas trajnoj, nomiĝas *fervojo* (ĉine *tielu*) kaj se ni volas paroli pri netrajna vojo, kiu estus farita el fero, ni nomus ĝin *fera vojo* (ĉine *tiede lu*). Ke vortoj estas kunmetitaj, tio tute ne ĝenas ilian precizan signifon. La tuta ĉina medicina terminaro konsistas el

kunmetitaj vortoj. Ĝi ne kreas komunikproblemojn, kiujn evitus la okcidenta greklatina fakterminaro.

Eble iu kritikema leganto pensos: „Tiu aŭtoro kontraŭdiras sin. Li antaŭe diris, ke esperanto havas aliajn celojn kaj funkciojn ol la naciaj lingvoj, kaj ke oni do ne uzu tiujn kiel modelojn por ĝi, sed nun li trovas, ke oni devus konformigi ĝin al nacia lingvo kiel la ĉina.“

Ne tion mi diris. Mi plu kredas, ke nia *bona lingvo* ne devas sekvi iun ajn nacian modelon: la ĉina formiĝis responde al la bezonoj de la ĉina popolo, same kiel la angla al tiuj de la brita, kaj la bezonoj, kiujn esperanto celas kontentigi, estas tute aliaj.

Mi nur volas emfazi jenon: se vi vidas, ke io ekzistanta en esperanto dekomence kaj plene akorda kun ĝia spirito retroviĝas ankaŭ en alia lingvo, kaj tie montriĝas efika, ni povas pli klare konsciiĝi, el tiu ekstera kazo, ke la koncerna trajto nialingva ne estas manko, aŭ fuŝo, kiun necesus ripari. Eble eĉ ĝi estas altvalora riĉaĵo, kiun ni riskus neglekti pro troa koncentriĝo sur la modeloj, kiuj ĉirkaŭas nin.

Pri la arto klare klarigi kaj kelkaj aliaj

Se oni ne konscias, kiel fekunde funkcias la er-kombina sistemo, dank'al la kapablo de nia dekstra duoncerbo kompreni laŭelvoke, kaj se oni krome pedantas pri „la ĝusta vorto“, oni emas pezigi la lingvon per ampleksa balasto el senutilaĵoj.

Ni konsideru la ekzemplon de la vorto *klarigi*. La rusa *ob'jasnit'* (*ob* estas prefikso, *-it'* infinitiva finaĵo, la radiko estas *jasn-*, ‚klara‘), la ĉina *shuoming* (<*shuo*, ‚diri‘, *ming*, ‚klara‘), la nederlanda *verklaren* (*ver* estas verba prefikso), la svahilia *kueleza* (*ku* estas verba prefikso, la radiko *elea* signifas ‚klari‘, ‚esti klara‘), montras, kiel mondvaste natura estas la inklinado esprimi per vortoj, kiuj formiĝas el aŭ per radiko signifanta „klara“ la ideon „provi komprenigi aferon montrante, kiel ĝi estiĝis, prezentiĝas aŭ funkcias, donante detalojn pri ĝi aŭ malvolvante ĝiajn kaŝitajn aspektojn“. Sed se, ne akceptinte, ke vortfarado procedas per elvokado, oni postulas difinon, oni konkludas, ke

klarigi devas signifi „igi klara“, kaj oni ne plu povas uzi la verbon en tiaj frazoj kiel „li klarigas ne tre klare, mi komprenas nenion“ aŭ „lia klarigo ne estas klara“.

Tial oni havas senton, ke en la lingvo mankas vorto, kaj oni enkondukas *ekspliki*. La eraro kuŝas en la ignoro, ke vorto esprimas multe pli ol la teorian signifon. Kion ĝi ne esprimas, tion konigas la kunteksto, aŭ ofte simple la frazostrukturo. Se mi diras: „li komunikas tre malbone, mi nenion komprenas“, ĉiuj trovas la frazon akceptebla, kvankam en tiu preciza okazo la koncerno ne pli komunikas ol lia antaŭulo klarigis per siaj neklaraj klarigoj. En ambaŭ kazoj, ia verbo kiel „provas“ aŭ „intencas“ estas subkomprenata: li provas klarigi sed ne sukcesas, li provas komuniki sed ne komunikas.

Krome, ŝajnas al mi, ke *x-igi* ne egalas *igi x*. La unua akcentas la agon, la dua la rezulton. *Li tute klarigis* rilatas al lia peno komprenigi, t. e. al ĉio, kion li faris, por ke oni komprenu. *Li igis tute klara* esprimas la fakton, ke tiu peno sukcesis: nun ni komprenas.

Alia faktoro, ankaŭ devenanta de la francaj instru-tradicioj, eble agas ĉi-kaze. La franca lingvo estas tia, ke en ĝi oni laŭeble evitas ripetigon de la sama vorto. En lernejoj, oni instruas al infanoj belstili provante ne uzi plurfoje vortojn similsonajn. Pro tio, eble, kelkaj francoj, dezirante plibeligi esperanton, serĉis sinonimon al *klarigi*, por eviti la ripeteton de *klar* en frazo kiel *li klarigas ne tre klare*.

Sed esperanto ne estas la franca, kaj kio estas kriterio de beleco en unu lingvo, ne nepre estas en alia. En la angla, tiu evito de sama vorto estas multe malpli atentata eĉ de plej bonaj verkistoj. Bela stilo dependas de la strukturado de la lingvo, de ĝiaj apartaĵoj, kaj senkritike transmeti stilprincipojn de unu lingvo al alia estas erare. En *li klarigas ne tre klare* oni povas percepti la belecon de aliteracio, se oni aliras la frazon liberigite de naciaj antaŭjuĝoj. Fakte, se oni vere enpenetris lingvon, tiagrade, ke oni pensas kaj sentas en ĝi, oni ne rimarkas multajn apartaĵojn, kiuj orelfrapas aliulojn. Neniu scias, kiel sonas la propra lingvo, ĉar neniu aŭdis ĝin el ekstere kiel aliaĵon. Mi konstatis ĉe francoj, kiuj plendis pri la troa ripetado de *mal* en esperantaj frazoj, ke ili ne rimarkas, kiom ofte la silabo /*dé*/ re-

venadas en francaj. Frazo, kiel *la plupart des détenus ont décidé de se débarrasser des...* ‚la plimulto el la malliberuloj decidis seniĝi je la...‘ enhavas sesfoje la sonon /de/ en dek vortoj, kio estas altega proporcio, sed franco aŭdanta ĝin tion eĉ ne perceptas.

Ofte, la ideo, ke al ĉiu nacilingva vorto devas respondi unu vorto esperanta, kreas eviteblajn problemojn, barante la esploron de la lingvo serĉe al plurvorta esprimo de la koncepto. Franca esperantisto, kun kiu mi babilis tiuteme, foje diris al mi: „se *klarigi* signifas ‚expliquer‘, kiel vi tradukas la francan *clarifier*, kaj se *senkulpigi* signifas ‚excuser‘, kiel vi tradukas *disculper*?“

Tipa reago de homo, kiu bezonas unuvortan translingvigon de ĉiu unuvorta koncepto. Respondi estas facile, se oni liberigas sin de tiu senbaza regulo. *Clarifier* atentigas pri la rezulto, ne pri la ago. Ĝi do povas esperantiĝi per *igi klara*, *igi pli klara* aŭ *igi tute klara*. Kaj *disculper* signifas ‚pruvi senkulpa‘ aŭ ‚deklari senkulpa‘. Kial do ne uzi senpere jen tiun, jen la alian esprimon, laŭ la vortigota penso?

„Nu, ĉu vi ne trovas tiujn formojn tro longaj?“ mia kunparolanto malfide demandis. Refoje, estis facile respondi: ne. Tiuj estas pli longaj ol la respondaj francaj vortoj, sed se oni rigardas, ne la unuopajn vortojn, sed la frazojn aŭ eĉ, pli bone, la tekstojn, evidentiĝas, ke esperanto ne bezonas pli da tempo aŭ da papero ol la franca por esprimi la samajn ideojn, eĉ se oni devas kelkfoje uzi plurvortajn esprimojn. Unulokan longigon ja baldaŭ kompensos densigo aliloka. Esperanto prezentas multajn okazojn koncizigi, kiujn latinidaj lingvoj ne havas. Se kalkuli laŭsilabe, *frate* havas nur duonon de la longeco de *fraternellement*, kaj nia *hispanigo* estas agrable pli malpeza ol la franca *traduction en espagnol*. Je la nivelo de frazo, esperanto ofte estas pli mallonga ol la franca: *la landaj asocioj decidis kunlabore agi* enhavas malpli da silaboj (16) ol la franca traduko: *les associations nationales ont décidé d'agir en collaboration* (21).

Skemismo, naturalismo: ĉu akcepteblaj terminoj?

La prilingvaj ideoj, enŝovataj en la menson de la francoj ekde ilia infaneco pro la tradicia eduksistemo, alportis al esperanto pedantecon kaj nekomprenon pri inkluziveco, kiuj ne troviĝis en ĝi komence, kaj kiujn oni povas rigardi fremdaj al ĝia spirito. Tio siavice kaŭzis necesan grandigon de la radikaro. La malfido al la kunteksto, al intuicio, al la elvoka potenco de er-kombinado eble spegulas la malfidon de Kartezio al la naturo kaj al la realo, al kiu li preferis penson, ideojn, logikajn ĉenojn, en kiuj ĉio estu senmanke preciza. Ree, temas pri la malfido, kiun la maldakstra duoncerbo nutras en si, en multaj popoloj, rilate al sia dekstra kunulo.

Kiel vi scias, oni kutimas nomi *skemeca* la skolon, kiu preferas esprimi la konceptojn surbaze de jam ekzistanta radikaro, kaj *naturalisma* tiun, kiu preferas ĉerpi la vortojn el la aliaj lingvoj. Tiujn terminojn mi opinias misgvidaj.

Ni vidis pli supre, ke, se juĝi laŭ esploroj pri la lingvoformiĝo ĉe infanoj, la eraroj de fremduloj kaj la homa parolmaniero ĝenerale, regula aranĝo de paroleroj estas plej **natura** rimedo vortigi siajn pensojn kaj sentojn. Fremdulo, kiu, france, diras *ir-résolvable*, 'nesolvebla', anstataŭ la ĝusta vorto *insoluble*, aŭ, angle *ununderstandable*, 'nekomprenebla', anstataŭ la ĝusta *incomprehensible*, tute ne skemas, sed lasas la naturajn leĝojn de lingva esprimado mem formi la vorton. Nur subpremante la **naturan** vorton li sukcesas asimili la oficialan, kaj tiu konstato validas ankaŭ pri la infanoj: nur luktante kontraŭ sia natura vortfarado, ili ellernas paroli la ĉirkaŭan lingvon, koste de konstanta media korektado.

La diferenco inter la du manieroj aliri la riĉigon de la esperanto-vortaro ne estas, ke unu procedas nature kaj la alia skeme, sed ke unu ĉerpas el ekstere, dum la alia ĉerpas el la propra bazo. Estus pli honeste nomi tiujn skolojn, aŭ tiujn konceptadojn, *elekstera* kaj *elinterna*. Se oni observas parolan esperanton, oni ja renkontas multajn formojn, kiuj ne troviĝas en vortaroj, sed kiujn homoj spontane uzas. Ekzemple, mi ofte aŭdis homojn diri *surbendigilo* anstataŭ la oficiala *magnetofono*,

piedpilko anstataŭ futbalo, aŭ buŝtradukisto anstataŭ konferenca interpretisto.

Ke tiaj formoj **nature** aperas, estas evidente. Uzi por tiu sistemo vorton, kiu subkomprenigas volan preparadon, fakte neekzistantan - skemi ja postulas konscian aktivigon de la intelekto - kaj por la kontraŭa sistemo vorton, kiu elvokas naturon, dum naturo agas ne konscie, kaj fakte temas pri konscie farita, intelekto decidita, ne speciale natura transprenado el ne speciale naturaj lingvoj, estas malhelpi klaran rigardon al la situacio. Estas miksi subjektivan juĝon kun objektiva priskribo. Estas, fakte, renversi la realon, nomante la agadon de unu duoncerbo per la karakterizo de la alia, kaj reciproke. Tamen, la agantaj faktoroj, la konsekvencoj de la elekto de tiu aŭ de la alia sistemo, same kiel la historiaj, sociaj kaj psikologiaj kaŭzoj de la prefero por unu aŭ por la alia meritas pli objektivan konsideron.

Neniam estas saĝe kontraŭi naturon en kazoj, kiam ĝin sekvi malbonfaras al neniu. Rilate riĉigon de la vortprovizo, laŭiri la naturan vojon estas ankaŭ pli justu al la plimulto. Ju pli da novaj radikoj, des pli da malfacilaĵoj por la homoj ne naskitaj en la vortfonta gento. Malegaleco tiel kreskas inter la popoloj kaj la sociaj tavoloj rilate al lern- kaj uz-facileco.

La tendenco ĉerpi novajn radikojn el ekstere estas des pli stranga, ĉar esperanto estas, kiel ni vidis, aparte riĉa lingvo, en kiu sinonimoj abundas. Mi jam prezentis pri tio ekzemplojn, sed bonvolu permesi, ke mi aldonu plian. Multaj esperantistoj tion ja ne konscias, kaj estas utile per plurfoja reveno traradi vojon por la vero tra iliaj antaŭjuĝoj. La koncepto, por kiu la franca havas nur la du (malsamnuancajn) vortojn *camarade* kaj *compagnon*, povas esprimiĝi en esperanto per tuta serio da vortoj: *kamarado*, *kunulo*, *kuniranto*, *kunvojaĝanto*, *voj-kunulo*, *samsortulo*, *kunvivulo*, *kunvivanto*, *samlaborulo*, *samvojulo*, ktp. Ĉe tia abundo, la vorto *kompano*, kiun ekzemple de Diego uzas en sia traduko de la verko de Jack London *Norda Odiseado* (Chapecó: Fonto, 1988, p.43), aperas absurda balasto. Kial devigi la leganton traserĉi glosaron aŭ vortaron, se la saman sencon eblas esprimi per la normala lingvo?

Iuj kelkfoje asertas, ke al vortoj, kiel la ĉi-supre prezentitaj, mankas ia poezia, korvibriga etoso. Tion povas diri nur homoj, kiuj ne bone konscias, kio estas la nuna, reala esperanto. Se jes. ili perceptus, ke por la plimulto el ĝiaj uzantoj vorto kiel *kompano* estas plej frosta fremdaĵo, morta sonĉeno vekanta nenium eĥon, multe pli senharmonia kaj malpoezia ol vortoj formitaj el la normala stoko, kiu, pro jardekoj da uzado, akiris propran vivon. Kaj ili trovas trafan esprimon kadre de la kutima lingvo. Laŭ la kunteksto, tio povus esti, ekzemple, *kunpanulo* aŭ *sampanulo*, kiu spegulas la originan sencon de *compagnon*, *compañero*, *companion*, sed ankaŭ, depende de la situacio, *kunfumanto*, *samteulo*, *kunvinulo*, *kunpaŝanto*, *kunlaculo*, *voj(aĝ)frato* aŭ iu ajn alia kombino de taŭgaj elementoj. Cetere, se la franca, lingvo tute taŭga por literaturo, perfekte bonfartas kun nur *compagnon*, kial nia *kunulo* ne sufiĉus al ni?

Pri patrino, ejo kaj kelkaj pensigaj eraroj

Miaopinie, la neglekto de tiuj internaj latentajoj favore al prefero ĉerpi el ekstere kontraŭas la spiriton de la lingvo. Ke esperanto baziĝas sur la principo kunglui erojn por vortformi, tion elokvente pravas la aranĝo de niaj vortaroj.

Tion bele ilustras ankaŭ la vorto *patrino*. En la ega plimulto el la lingvoj, eĉ la t.n. izolaj kaj aglutinaj, tiu fundamenta koncepto vortiĝas per aparta, nederivita formo. En nia lingvo ĝi postulas derivaĵon. Tiu apartaĵo des pli emfazas la fundamente gravan rolon de er-kombinado en esperanto, ĉar la radikoj *mama* estas eble la sola, al kiu prave aplikiĝas la kriterio „internacieco“ aludita en la 15-a regulo de la fundamenta gramatiko: oni diras *mama* en la ĉina, *mamma* en la bengalia, *mama* en la haŭsa, *mama* en la svahilia, ktp. Kaj ĉu ne estus saĝe konsideri, ke la situacio ŝanĝiĝis depost la zamenhofa tempo, kaj ke multaj popoloj, kiuj liaepoke ne partoprenis en la internacia vivo, nun aktive rolas en ĝi, tiel ke la koncepto „fremda vorto“ aliĝis? (La 15-a regulo ja parolas pri vortoj, kiuj intersimilas „en la plimulto el la lingvoj“).

Ĉar mi tuŝas la temon de tiu 15-a regulo, mi faru konstruan proponon. Kial ni ne decidu, ke ĝi aplikiĝos nur, kiam la vorto respondos al objektiva kriterio? Tia kriterio povus esti, ke la radikoj ekzistu, samsence, en kvin **ne**-hindeŭropaj lingvoj. La turka, la hebrea, la indonezia, la hungara, la japana, la finna kaj aliaj ja akceptis multajn origine okcidentajn vortojn. Ĉu demokratio ne postulus tian kontrolon antaŭ ol ni rigardu vorton internacia? Same, kiam koncepto montriĝas malfacile vortigebla, kial ni ne organizu esploron en la diversaj lingvoj, ĉefe tiuj, kiuj funkcias kunmete? Ofte, oni tiel trovas solvon al problemo unuavide nesolvebla.

Sed ni revenu al la vorto *mamao*. Fakte, kvankam ĝis nun neniam uzata, ĝi apartenas al la lingvo laŭ tiu 15-a regulo de la fundamenta gramatiko. Oni povas suspekti, ke la neuzo de tiu laŭfundamente ĝusta vorto havas profundajn psikologiajn kialojn, kies esploro sendube ĵetus interesan lumon sur la konsiston de la esperanto-kolektivo. Estu kiel ajn, la ekzisto de derivado ĉe tiel baza vorto kiel *patrino* substrekas, kiel radikale esperanto emas ekspluati la eblojn de er-kungluado.

Mi ne neas, ke eleksterismo havas sian rolon en la internacia lingvo, sed tiu rolo estas pli supraĵa, malpli esenca ol elinternismo. La spontana evoluo, kiu kondukis al la ĝenerala uzo de *komputilo* kun sencoŝanĝo de la radikoj *komput*, kaj la abundo, en parola esperanto, de „fuŝaj“ - laŭ la oficialaj kriterioj - formoj kiel *teatrejo* (vd la programon de la pekina kongreso), *parlamentejo*, *kuntribui*, *medikaĵo* ktp ilustras la forton de la er-kombinaj tendencoj nialingve. Similaj faktoj pravigas la opinion, ke tiu trajto pli karakterizas la esencan spiriton de la internacia lingvo ol ĉerpemo elekstera.

Unu el la kaŭzoj, pro kiuj kelkaj malfidas la kunmet- kaj derivsistemon, estas nekomprene pri la vastaj ebloj, kiujn havigas la metafora uzo de lingvoelementoj. Ekzemple, en multegaj lingvoj, eble eĉ en ĉiuj, manifestiĝas la natura homa tendenco uzi por institucio vorton, kiu komence signis nur lokon. Diri *la Centra Oficejo decidis...* estas tute natura maniero sin esprimi. Okazas en la menso laŭgrada, neperceptata transiro de la loko al la homoj en ĝi, kaj de tiuj al la institucio mem. Neniu trovas stranga la frazon *la afrika sidejo konfliktis kun la tutmonda*

ĉefsidejo, starigita en Londono. Ejoj estas institucioj. Kiam oni tion komprenis kaj akceptis, oni povas ege senbalastigi la lingvon: anstataŭ *ministerio* oni diras *ministrejo*, anstataŭ *sekretariato, sekretariejo*, anstataŭ *redakcio, redaktejo*, ktp. Praktiko montras, ke tiu sistemo perfekte funkcias.

Ekzemple, en *Intermeze*, aldonajo al *La Revuo Orienta* (68, 1987, marto 3, p.5), mi legas la frazon *La japana ministrejo de poŝto rekomendas...* Ĉu vere oni gajnus ion dirante tiakaze *ministerio*? Mia opinio, tute ne. Temas pri natura tendenco, kiel atestas ankaŭ jena okazaĵo. Foje, dum mi parolis kun universitata profesoro, li diris al mi: „*nia fakultejo organizis...*“ Mi tuj notis tiun interesan esprimon, kiun la parolanto mem ne rimarkis. La radiko *fakult-* ja ne ekzistas en esperanto. Tiu profesoro spontane formis, por paroli pri institucio, *ej-vorton*, kiu teorie ne eblas (la ĝusta vorto estus *fakultato*)! Ĉu lia eraro ne estas signo pri tio, kien nature evoluas la *bona lingvo*?

6. IES MALFIDO, FIDO MIA

Homo emas rezisti al la propra bono

Provante klarigi, kial la kunmet- kaj deriv-sistemo miskompreniĝis, mi menciis la francan obsedon pri la „ĝusta termino“. Sed ni gardu nin kontraŭ la emo trosimpligi. Alia faktoro verŝajne intervenis.

Mi antaŭe montris, ke okazis mutacio, ke mutacio estas rompo, kaj ke rompo timigas. Socioj bezonas tempon por asimili radikalajn ŝanĝojn. Sekve, dum unu parto kuras antaŭen, entuziasma pri la nov-aperajo, alia provas ĉiuforte bremsi la progreson, por havi la tempon kutimiĝi al ĝi. Se vi havas dubon pri la natureco de tiuj reagoj, iom studu la historion de la komunistaj partioj, aŭ la reagojn al la Dua Vatikana Koncilio de la katolika eklezio, aŭ ankaŭ la reziston, kiun siatempe elvokis ĉiu nova eltrovaĵo, kiel fotografio, fervojoj aŭ la decido havigi al kamparoj elektran energion. Eĉ la metra sistemo, tiom pli faciluza ol la tradiciaj mezurunuoj, ankoraŭ nun ne estas tutmonde akceptita.

Unu el la plej bonaj ekzemploj de tiu homa inklino rezisti kontraŭ la propra bono havigas al ni la hindaj ciferoj, kiujn en Eŭropo oni nomas arabaj, ĉar la araboj ilin konigis. Necesis pluraj jarcentoj por ke, en tiu mondoparto, ili anstataŭu la romiajn. Tamen, ili prezentis per si grandegan progreson, dank'al la nulo kaj al la konsekvenca rilato inter la pozicio de ĉiu cifero kaj la dekuma tranĉo al kiu ĝi apartenas. Tiaj trajtoj ege faciligas ĉiujn kalkulojn. Provu obliĝi CMXLVII (947) per MCDXXXI (1431)! Nur matematikistoj tion sukcesis fari. La enkonduko de la novaj ciferoj ebligis al metiistoj, infanoj, plej simplaj komercistoj kalkuli tute glate. Estis do demokratia progreso. Sed ĝi venkis nur post longa kaj akra rezisto. Eĉ unu ŝtato (Venecio, se mi ne eraras) malpermesis dum pluraj jardekoj la uzadon de la novaj ciferoj.

La rilato inter la hindaj/arabaj ciferoj kaj la romiaj estas komparebla al la rilato inter la er-kombina sistemo de esperanto kaj la enkonduko de neologismoj. Ambaŭkaze, plene

konsekvenca sistemo, utiliganta minimumon da bazaj elementoj, kaj funkciiganta ĉefe inteligenton, kontrastas al sistemo malpli orda, kiu postulas pli grandan elspezon de nerva energio, kaj pli apogiĝas sur memoro aŭ sur konsulto de dokumentoj.

Ekzistas ĉe kelkaj aŭtoroj tendenco transpreni novajn radikojn por ideoj, kiuj havas bone enradikiĝintan vortigon en la lingvo. Ekzemple la Iltis-a *Literatura Manifesto* uzas *poka* por esprimi la koncepton 'malmulta'. Aliaj, eĉ malpli kompreneble, enkondukis *dificila*, 'malfacila', *centenario*, 'centjariĝo' kaj *in-amika* aŭ *inimika*, 'malamika'. Tiu inklinio povas esti rigardata kiel manifestiĝo de la fortoj provantaj rezisti al la nova sistemo; ĝi estas, interne de esperanto, reprezentanto de la malnova maniero komuniki. Fakte, simile agis la "kuzoj", kiuj aperis post esperanto: Ido, Novial, Occidental, Interlingua, ktp; oni do povas rigardi ĝin ankaŭ enŝoviĝo de tia kuza lingvo en la spirite kaj strukture multe malpli latinecan esperanton.

Ĉar temas pri longdaŭraj socihistoriaj fortoj, estas normale, ke eĉ Zamenhof havis en si ambaŭ tendencojn. Ankaŭ li (probable nekonscie) rezistis al la radikala ŝanĝo. Li estis ne la mutaciulo, sed la portanto kaj eksteriganto de la sukcesonta mutacia ĝermo. Certe li havis dubojn pri ĝi. Li havis neniun rimedon scii, kiu, inter liaj disaj inklinoj, efektive pravas. Li ne povis flegi la ĝermon senkompromise. Eble indas precizigi lian rolon en la okazinta mutacio.

Longperiodaj socihistoriaj faktoroj

La homaro bezonas siajn heroojn, siajn geniulojn. Por kontentigi tiun bezonon, ĝi atribuas eltrovaĵon al unu difinita homo, kvazaŭ la aferoj disvolviĝus jene: antaŭe estis nenio, la grandulo venis, kaj poste la mondo dank'al li estis ŝanĝita. La vero estas malpli simpla. Malkovroj okazas pli malpli samtempe diversloke, ĉar ili grandparte estas socihistoria fenomeno. Ili aperas, kiam la kondiĉoj estas por ili maturaj. Per tiu diro, mi tute ne volas malpliigi la rolon de la koncernaj individuoj: ilia personeco, ilia laboro, ilia persistemo estas tre seriozaj faktoroj en la nov-aperajo, kiun ili ofte stampas per propraj karakterizoj. Sed

oni miskomprenas la realon, se oni rigardas ilin tro izolitaj disde la socihistoriaj fortoj, kiuj portas ilin.

Pri la lingvo internacia tiu rimarko plene validas. Ĝi aperis, kiam historio tion postulis, kiam la sociaj kondiĉoj estis pretaj por ĝi. Se ne estus Zamenhof, certe estus iu alia, eble kun prokrasto de unu aŭ du jarcentoj, eble pli malpli samjare, kiu prezentus verkon kun similaj strukturaj trajtoj, kvankam ilia konkreta formo estus malsama.

Zamenhof ne iniciatis sur fono de neniaĵo. Li respondis al sopiro. Ekzistis en parto de la tiutempa homaro intensa deziro komuniki per facila, demokratia rimedo. Eble la deziro ne estis konscia. Sed esperanto neniam sukcesus, kiel ĝi sukcesis, se ĝi ne estus respondo al atendo.

Tiun sopiron naskis serio da ŝanĝoj, kies gravecon ni, fine de la dudeka jarcento, inklinas forgesi. La mondo pli ŝanĝiĝis inter 1830 kaj 1870 ol iam ajn antaŭe. Publika instruado lerniĝis al ĉiuj legi, kaj gazetoj aperis, kiuj igis la mondon mense atingebla por homoj socie tenataj dum jarcentoj ekster ĉia rilato kun ĝia vasta kaj diversa mirindeco. Fervojoj rapide kovris la teron, kaj pensigis pri vojaĝoj kaj kontaktoj. Konsciiĝo aperis ĉe laboristoj pri sia digneco, kaj tio kreis ĉe multaj strebon al kulturo. Soifo ekkoni kaj kontakti disvastiĝis.

Tiu parto de la homaro, en kiu tiuj aspiroj vivis, estis la latentata patrino, kiu deziris naski, kaj sopiris al la viro, kiu fekundus ĝin. Ĝi estis la grundo, sen kiu la semo ne povus evolui al io vivanta. Zamenhof jetis la semon, kaj tiu grundo ĝin akceptis, protektis, nutris, transformis, ĝis esperanto firmiĝis kiel stabila, ekzistanta lingvo ne plu dependa de individuoj: la reala lingvo.

Eĉ nun, se mortus ĉiuj esperantistoj, la lingvo pro tio ne malaperus. Ĝi troviĝas en tro multaj bibliotekoj, estas tro da homoj, kiuj interesiĝas pri lingvoj kaj lingvoscienco, la bezono de internacia komunikilo estas tro granda, por ke ĝia ne-pluvivo daŭru longe. Iu studento, iu histori-esploranto, iu ĵurnalistulo retrovus tiun mirindaĵon, kaj relanĉus ĝin. Pro sia interna taŭgeco ĝi prosperus: ĝi estas ja *bona lingvo*.

Esperanto estas tiel revolucia, se oni rajtas uzi similan vorton pri io plej neperforta, ke ĝi nepre devis vekti fortajn kontraŭstarojn. La eksteraj estas konataj, kaj mi ilin ne priparolos ĉi

tie, sed pri la internaj oni ne sufiĉe konscias. Ili estas ĉio, kio, en Zamenhof mem kaj en liaj posteuloj, nekonsciante celis forpreni el la lingvo ĝiajn revoluciajn trajtojn rilate al la demokratieco de intergenta komunikado.

Rekte rilati interkulture estas timige, ĉar tiel perdiĝas la lingva barilo, kiu agas bufre kaj moderigas la ŝokojn. Same, rilati sen superuloj kaj malsuperuloj estas io neniam spertita, kaj do terura por la parto de la psiko, kiun ĉio nekonata facile angorigas. Krome, al kelkaj homoj mankas la fleksebleco necesa por adapti sin al sistemo diferenca de tiuj, kiujn ili lernis uzi, tiel ke ili povas miskompreni la tutan novan aranĝon. Tio, miaopinie, okazis al Waringhien.

Malŝido al la lingvo

En la antaŭparolo al sia unua eldono de Parnasa Gvidlibro (represita en la dua eldono, Varsovio: Pola Esperanto-Asocio kaj Heroldo de Esperanto, 1968, p. 6) li ja diras jenon:

(...) la tro ofta uzado de vortoj formitaj per la kontraŭecaj prefiksoj *mal*, *ne* aŭ *sen* (...) malutilas en poezio. ne ĉar ili ne estas sufiĉe elvokantaj, sed ĉar ili estas elvokantaj kontraŭsence. Efektive, se oni rememoras la klasifikon de la vortoj laŭ ilia elvokiveco, oni vidas, ke tiu estas des pli malforta, ju pli abstraktaj ili estas - kaj inter la plej abstraktaj troviĝas la gramatikaj iloj; kiel tia, la negacio estas absolute sena je poezia valoro. Por ke la leganto sentu la malon de unu donita impreso, ne sufiĉas kunmeti negacion kun la vortoj, kiuj ĝin esprimas; ĉar oni tiele ne forigas la evitendan bildon, oni elvokas ĝin, dum oni kredas ĝin forpeli. Tradukante poemon de Longfellow, kiu priskribas grizan vintran tagon. Grabowski skribas:

La tago malvarma, malgaja, sensuna...

verso taŭga por doni la impreson de sunplena somertago, ĉar tian bildon la tri *mal* aŭ *sen* neas ja intelekto, sed ne malaperigas el la sens-imago (...)

Miaopinie, nur persono ne sentanta esperanton, kia ĝin sentas la plimulto el la ordinaraj uzantoj, povas tion skribi.

Aŭ ĉu mi estas maljusta? Ĉu ni ĉi tie trafas unu aspekton, fojfoje tragikan, de la homa estado, nome, ke homoj povas tiagrade malsami en sia maniero percepti la mondon, ke tio, kio evidentas al unu, estas nevidebla al la alia? Pro konsidero al tiu eblo mi komence de ĉi tiu libreto diris, ke eble esperanto vivos sub du formoj, kiel la angla vivas sub usona kaj brita...

Estas klare, ĉiaokaze, ke mi sentas la aferon tute malsame ol Waringhien. Se sinceri, mi diros, ke mia unua reago, kiam mi legis la ĉi-supre cititajn liniojn, estis pensi: aŭ tiu aŭtoro ne havas normalan lingvosenton, aŭ li ne estas honesta kaj friponas kun la propra reago, por povi pruvi sian tezon. Nur poste mi atingis pli tolereman pozicion, pensante: nu, eble li simple estas tre malsama ol mi.

Fakto estas, ke mi eble tridekfoje relegis la koncernan version, diversepoke, kaj ke neniam prezentiĝis al mi impresoj de sunplena somertago. Mi kunvibras kun poeto priskribanta tagon vintran, nuban, funebrekan, sen-akrekan ĝis plena grizo. Kaj mi min demandas, kiel ion alian eblas percepti. Mia toleremo, naskanta la hipotezon, ke eble Waringhien estas nek malhonesto kun si, nek homo sen lingvosento pri esperanto, rezultis el konscia peno: mi devas streĉi miajn pensofortojn por trafian ideon, ĉar ĝi estas absolute kontraŭnatura al mi.

Kial? Temas pri neracia reago, kiun analizi verŝajne ne eblas. Tamen mi diru, ke por mi neado tute ne estas io abstrakta. Kiam bebo forturnas la kapon disde nutraĵo, kiun oni proponas al ĝi, kaj kiu al ĝi odoraĉas, ne okazas io abstrakta, sed io plej viva, plej konkreta, plej profunde senta. Kaj tiu gesto estas la origino de ĉiuj neadoj. Miriga estas la distanco inter Waringhien kaj mi. Eĉ en la franca, mia gepatra lingvo, mi reagas same kiel en esperanto. Kiam unu el miaj konsultantoj diras: "*je suis malheureux*", 'mi estas malfeliĉa', lia frazo neniel povus elvoki en mi feliĉon. Mi ne aŭdas *heureux*, 'feliĉa', mi aŭdas nur *malheureux*, kio signas la malon. Fakte, mi konstatas, ke mi reagas same, kiu ajn la lingvo.

La angla frazo

he felt unhappy, unlucky, unloved

'li sentis sin malfeliĉa, malbonŝanca, neamata' tute ne elvokas en mi amon kaj feliĉon. Mi ne perceptas tiujn vortojn kiel ion modifitan per abstraktaĵo supozata efiki neige. Mi perceptas ilin kiel tutaĵojn, same kiel, se mi aŭdas indignan paroladon pri *injustice*, mi aŭdas, ke temas pri maljusteco, nenio tiuvorta elvokas al mia menso justecon.

La cititaj vortoj de Waringhien faligas min en abismojn de dubo kaj konsterno. Se lia menso funkcias tiamaniere, kiel li povas komuniki? Se kiam oni parolas pri patrino, la vorto elvokas al li patron, pri miskompreno, komprenon, pri domaĉo, domon elegantan, kiel li povas pensi en esperanto? Kiel li povas senti tiulingve, kaj do interhome rilati? Mi provas esti tolerema, kaj konvinkiĝi, ke, nu, lia menso tre diferencas de la mia. Sed mian provon tiel rezoni konstante atakas la ideo, ke li neniam sukcesis vere senti la lingvon.

Aŭ eble li aliras ĝin laŭ tiagrade franca vidmaniero, ke li uzas iun varianton de ĝi, kiu sufiĉe diferencas de la ĝenerale uzata. Multo en PIV pri tio atestas. La difinoj de vortoj kiel *kulturo*, *alternativo*, *spirito*, *ĵurnalo* pli spegulas la lingvouzon de la respondaj francaj vortoj ol tiun de la esperantaj.

Tipe franca estas la konfuzo inter *spirito* kaj *menso*. Konstante, en la difinoj de PIV, ni trovas la vorton *spirito*, kiam la internacia lingvouzo postulus *menso* (vd. ekzemple la unuan difinon de *konsideri* kaj de *memori* aŭ la kvinan de *kulturo*). Sed ĉar la franca ne havas vorton, kiu signifas "menso", francoj kutimas traduki la anglan *mind* kaj la samsencaĵojn alilingvajn per *esprit*, kiu etimologie parenas al la esperanta *spirito*. La tria difino de *spirito* en PIV estas "la pensanta parto de homo", sed la zamenhofaj ekzemploj tuj poste prezentitaj klare montras, ke tiu difino mistrafas: *fervora*, *malgaja*, *kolerema*, ne estas vortoj, kiuj taŭgas por penso; temas pri io alinivela, pli subtila, sed kion la franca intelektula kulturo ĝenerale ignoras, verŝajne ĉar ĝi havas neniun sperton pri tiu homa dimensio, kaj ne sukcesas koncepti ĝin. (Mi diras *intelektula*, ĉar laŭ mia sperto,

multaj francoj havas spiritan dimension kaj tute bone sentas la sencon de tiu vorto, eĉ se ilia lingvo konfuzas ĝin kun "menso", sed tiu kompreno estas multe pli malofta ĉe intelektuloj, precipe senreligiaj).

Inklino juĝi superule... kaj fali en antaŭjuĝon

Alia trajto tipa pri la franca intelektula kulturo estas la emo aŭtoritate juĝi el supera sinsituigo. (La personoj, kiuj ĉeestis la budapeŝtan konferencon pri maŝintradukado *New Directions in Machine Translation*, spertis la 19-an de aŭgusto 1988 bele ilustran kazon pri tio, kiam Prof. Boitet komentis la prelegon de Dietrich Weidmann, parolante per nepravigeble humiliga tono, kiu eblus en preskaŭ neniu alia kulturo kaj kiu ŝokis multajn ĉeestantojn). Tiu supereca juĝemo disfloras en PIV.

Ekzemple, *sinkretismo* estas difinita kiel

konfuza kaj kompleksa kunigo de diversoriginaj ideoj (...) en **ŝajne** koheran tuton: *spiritismo*, *bahaismo ktp estas ekzemploj de sinkretismo* (emfazo mia).

Kion bahaanoj opinias pri sia apero tiufraze? Per sia tono, tiu PIV-a ekzemplo frape rebatas mian tezon, ke esperanto signas mutacion en homaj rilatoj, kiujn ĝi gvidas al demokratieco, toleremo kaj respekto reciproka. Jen alia ekzemplo:

Jave/o. La propra nomo de Dio en la Biblio, mistradukita per "La Eternulo".

Mi ne scias, ĉu Waringhien mem verkis tiun teksteton, sed, kiu ajn la aŭtoro, kiel ĉefredaktoro kaj unu el la du kontribuintoj pri religioj kaj biblio, li respondecas pri ĝi. Denove, mia reago estas konsterno. La redaktinto agas, kvazaŭ la vokaloj de la hebrea JHVH estus konataj, dum nur la ĉefpastroj ilin sciis, kaj tiu tradicio perdiĝis, kiam la romianoj detruis la jerusalemajn templojn antaŭ dumil jaroj. Kaj kiarajte li taksas la zamenhofan tradukon *La Eternulo* misa, kvazaŭ la longa rabena tradicio

tiurilata ne ĝustus kaj ne meritis konsideron? Kie li akiris la lingvan kaj religian kompetentecon, kiun postulas tia akra kondamno? La dulingva hebrea-franca eldono de la Biblio farita sub la direktado de ĉefrabeno Zadoc Kahn ĉiufoje tradukas la hebrean JHVH per *l'Eternel*. Ĉu Waringhien scias pli pri la Biblio kaj la hebrea ol la religiaj gvidantoj de la franca judaro?

Kara Leganto, bonvolu indulgi al mi! Mi provas esti tolere-
ma, sed mi ne sukcesas. Mi indignas. Mi indignas, ke homo tiel
malmulte internaci-mensa havis tiom da potenco pri nia lingvo,
kiel prezidanto de la Akademio, kiel ĉefredaktoro de la precipa
unulingva vortaro, kiel kunaŭtoro de la Plena Gramatiko, pri
kiu mi bedaŭras, ke oni ne aŭdis la averton de Zamenhof:

Ellabori plenan detalan gramatikon estas afero tute ne ebla.
La verkado de tia gramatiko postulus grandan serion da ja-
roj, sed en la rezultato... tia gramatiko ne sole ne faciligus la
lernadon de la lingvo, sed terure ĝin malfaciligus! (Lingvaj
respondoj, n-ro 140 A, *vk cit.*, substrekis Zamenhof mem).

Obsede fantomas al mi la demando: ĉu Waringhien serioze en-
profundiĝis en esperanton? Se jes, kiel li povis skribi:

Sufiĉas malfermi dulingvan vortaron por konstati, kigrade
la naciaj lingvoj estas pli precizaj ol la internacia. La sola
"pinto" signifas france "pointe, bout, sommet, cîme, faite".
(*Parnasa Gvidlibro, vk cit.*, p. 6)

Tion diri oni povas nur rezigninte sian kritikan menson. Ĉu ve-
re li ne vidis, ke oni ne povas juĝi lingvon laŭ la vortaristoj? Mul-
tegaj anglaj vortoj, kiel *tape, pattern* aŭ *right* havas pli da fran-
caj tradukoj ol tiu *pinto*; ĉu tio signifas, ke en la angla la vortoj
ne estas precizaj? La nevalidecon de la varingjena rezono pru-
vas la fakto, ke oni povas returni la argumenton: ĉe simila du-
lingva vortaro, sed alisenca, al la sola franca *condisciple* oni po-
vus apudmeti longan serion da esperantaj tradukoj, kiel *sam-
klasano, samlernejano, kunstudanto, kunlernanto, studo-
kunulo* ktp. Same, vortaristo aplikanta lian rezonon al la fran-
ca *traduire* povus enmeti: *latinigi, ellatinigi, ĉinigi, elĉinigi, an-*

gligi, elangligi, kaj tiel senfine. Kiu lingvo estas pli preciza ol la alia? Palas la kvin precizaj francigoj de nia *pinto* kompare kun tia ekzakteco!

Kaj kiamaniere verkiĝas vortaro? Ĉu ties aŭtoro devus enmeti kun la tradukota vorto ĝiajn sinonimojn, kaj diri: **pinto, supro, ekstremaĵo, plejalto**, ktp: *pointe, bout, sommet...*? Estas absurde, el tia vortara prezento, fari dedukton pri la (mal)riĉeco de unu el la du lingvoj. Cetere, ankaŭ malprecizeco, se ĝi kunekzistas kun precizeco, estas io riĉiga. Ke la franca havas nur precizajn vortojn por la diversaj objektoj uzataj por skribi, kaj mankas al ĝi ekzakta traduko de nia *skribilo*, certe ne estas bonaĵo, pri kiu ĝi fanfaronu.

Malfacilas eviti la konkludon, ke la kono de esperanto, ĉe Waringhien, estas elekstera, kaj ke li havas antaŭjuĝojn kontraŭ ĝi, kiel evidentigas ambaŭ ĉi-supre prezentitaj citaĵoj el *Parnasa Gvidlibro*. Multaj eldiroj liaj ja montras, ke li havas akran kritikan menson (vd *sinkretismo* kaj *Javeo* ĉi-supre). Kial li rezignas ĝin taksante esperanton malpreciza laŭ tezpruve elektita ekzemplo, se ne ĉar tion postulas lia antaŭe alprenita sinteno, alivorte antaŭjuĝo? Li ne profundigis sufiĉe en la lingvon por ĝin plene senti kaj malkovri ĝian riĉon. Li aliras ĝin el juĝista kaj supereca pozicio. Mankas la du kondiĉoj, kiuj ebligas koni ion vivantan: sento pri sia nescio, kaj respekto. La mutacia aspekto de esperanto ne tuŝis lin.

Certe mi estas ege partia kaj subjektiva. Mi sendube respektis, rilate al tiu sinjoro, la abruptan desupriĝon, kiun mi travivis, kiam, adoleskanto, mi renkontis miajn unuajn esperantis-tojn, kaj ŝiris min la doloro ekvidi, kiom perdis la lingvo, kompare kun tiu, kiun mi ĝue uzis dum miaj junaj jaroj antaŭe.

Sed mia konsterno kaj indigno ne signifas, ke mi ion riproĉas al Waringhien, al lia persono. Disvolviĝas ja vastega historia evoluo, kun sociaj fortoj tiel potencaj, ke individuoj estas grandparte senhelpaj rilate al ili. Ne mi elektis mian starpunkton pri esperanto, neologismoj, ktp. La vivo ĝin trudis al mi. Simile, plej verŝajne, ne li elektis sian. Ĉar la vivo de ĉiu el ni malsamas, ĝi trudas al ĉiu el ni malsaman rigardmanieron. Mi ne neas la rolon de nia libera volo, sed mi opinias ĝin, ĉi-okaze, ege limigita.

Ke Waringhien ne konscias la riĉecon de esperanto, kaj ke li sentas abstraktaj tiel konkretajn vortŝanĝilojn, kiel *mal*, *ne* aŭ *sen*, tion, miaopinie, kaŭzis nevola engluto fare de la kontraŭmutaciaj fortoj agantaj en la socio. Estus nekredeble, ke ĉion trankvile konsiderinte, li libere elektis.

Pli probable, li estis kaptita en socihistoria kontraŭfluo. La juĝista kaj preskriba tono de multaj eroj en PIV kaj PAG apartenas al la sama tendenco: bezono, ke rilatoj okazu inter superuloj kaj malsuperuloj. Alitipa rilatado estas neimagebla por kelkaj homoj, kies menso strukturiĝis en juĝa, aŭtoritata etoso. Kaj, se kredi la priskribojn, kiujn mi ofte aŭdis, pasi tra la francaj lernejoj kaj universitatoj estas submeti sin al tiom da ekzemploj pri la ĉioscia, juĝpova instruisto, ke ne estus home rezisti la influon de tiuj kondutmodeloj, kiam oni mem profesoriĝas.

Du sublingvoj

Ke mutacio vekas kontraŭmutacian reziston, tio estas plej normala. Vivo postulas ekvilibron inter du kontraŭaj emoj: emo konservi senŝanĝa, emo revolucii, t.e. rapide ŝanĝi ĉion nekontentigan. Se la unua mankas, la ŝanĝoj okazas tro rapide, kaj ĉio ŝanceliĝas. Se mankas la dua, regas kvazaŭmorto, la organismo rigidiĝas kaj perdas la kapablon adaptiĝi al la evoluanta medio. Tiu leĝo validas por ĉiu tutaĵo povanta plu daŭri nur per propra adapto: dum tablo aŭ aŭto ne bezonas kaj ne povas prizorgi mem sian adapton al medioŝanĝoj, aliaj estaĵoj devas tion fari: organo de via korpo, ekzemple, aŭ via tuta korpo, sed ankaŭ same societo, tuta lando (pensu pri la sovetia historio), kaj... lingvo.

Esperanto travivas streĉiĝojn kaŭzatajn de tri disaj tiroj. Potencaj evoluigaj fortoj strebas al du malaj direktoj: disvolvi plejplej konsekvence ĝiajn enaĵojn unuflanke, igi ĝin radik-riĉe okcidenteca aliflanke. Samtempe agas tria speco de fortoj: tiuj provas malhelpi ĉian evoluon. Mi diras *fortoj* kaj ne *homoj*, ĉar unu persono povas esti puŝata de fortoj malsamdirektaj.

Ekzemple, Waringhien estas konservema pri *ami* kaj *ŝati*, sed revoluciema pri la *mal*-vortoj (vd PAG, par. 420, pp. 506-507).

Kion mi ĵus diris, tio rilatas nur al la internaj fortoj, kiuj agas, kia ajn la evoluo de la ĉirkaŭa mondo. Sed krome la lingvo devas adaptiĝi al ties ŝanĝado: aperas novaj aĵoj, kiuj postulas nomon: ĉu ni diru *komputero*, *komputoro*, *komputilo*; *kaseto*, *kasedo*? Esperanto, kiel ĉiu vivanta lingvo, hezitas, kaj povas bezoni jardekojn por stabiligi ĉe unu kontentiga vorto. La kunagado de enaj ŝanĝofortoj kaj de la neceso adaptiĝi al ekstera evoluo estigas malsamajn lingvoformojn, kiujn mi proponas nomi *sublingvoj*.

La ekzemploj pri *ministerio* / *ministrejo* kaj *fakultato* / *fakultejo*, viditaj en la antaŭa ĉapitro, ilustras la kunekziston de du tiaj sublingvoj esperantaj. Tia duobleco ne timigu nin. Estas normala fenomeno ĉe lingvoj. Kiam mi estis en Norvegio, mi rimarkis en tramo, kiu kondukis min de la studenta domo al la centro de Oslo, ke la nomo de la haltejoj estas malsame skribitaj en la tramo kaj ĉe la stacioj. Kaj oni tie rakontis al mi la anekdoton pri la ulo, kiu "parolas dek lingvojn, inkluzive de naŭ norvegaj". Estas fakto, ke multaj lingvoj prezentiĝas plurforme, kaj ke tio ne tre ĝenas komunikadon.

Rilate al esperanto estas klare, ke la lingvaĵo trovebla en la tradukoj de Diego aŭ en la iltis-a *Literatura Manifesto* situas, ĉe unu poluso, pro la abundo de neologismoj eĉ por esprimi konceptojn, por kiuj la reala lingvo havas tradician vorton (ekzemple *poka* anstataŭ *malmulta*, aŭ *konstituas* anstataŭ *formas*), dum tiu de *Mondo kaj Ni* (antaŭe *UN kaj Ni*) situas ĉe la alia, pro aparte persista uzado de derivitaj kaj kunmetitaj formoj (*elcento* anstataŭ *procento*, *buŝtradukisto* anstataŭ *interpretisto*, ktp).

Ofte, formoj apartenantaj al du malsamaj sublingvoj troviĝas kune en unu publikigaĵo. En *Kontakto*, n-ro 111 (1988, 5), oni legas, supre de la dua paĝo, la vorton *redaktoro*, dum malsupre de la 15-a la sama koncepto esprimiĝas per *redaktanto*. Simile, sur la frontpaĝo de la n-ro 3/4 de 1988 de *Norvega Esperantisto* okulfrapas la konsilo *Mendu vidbendojn Esperantajn!* kun referenco al paĝo 28. Sur ĉi-lasto paĝo, sub la titolo *Vidbendoj* proponiĝas al la leganto *videokasetoj*. Klare temas

pri la sama objekto, nomita jen laŭ unu sublingvo, jen laŭ la alia.

Kiu el la du sublingvoj estas la "reala lingvo"? Mi dirus, ke ambaŭ ne ekstremaj lingvoformoj kune konsistigas ĝin. *Vidbendo* certe apartenas al la reala lingvo, sed ne malpli certe ankaŭ *videokaseto*, *videobendo kaj videokasedo*. Same, ne eblas dubi, ke *redaktoro kaj redaktanto* ambaŭ estas parto de la lingvo ordinare uzata, alivorte, de la reala. Kontraste, vortoj kiel *poka*, 'malmulta', aŭ *kompano*, 'kunulo', troviĝas ekster ĝia kampo. Estas granda diferenco inter fremdvorto uzata de persono priparolanta ion novan, kion li ne scias, kiel nomi en esperanto, kaj vorto uzata en ordinara kunteksto anstataŭ perfekte samsenca tradicia esprimo, tiel ke la leganto (praktike, neniam temas pri aŭdanto) sin demandas: kial tiu ne esprimas sin normale?

La lingvaĵo de *Mondo (UN) kaj Ni* plejparte apartenas al la reala lingvo, sed kelkaj apartaĵoj situas ekster ĝi (ekzemple *Japanlando* anstataŭ la reallingvaj *Japanio kaj Japanujo*, aŭ *japanlingvo* anstataŭ la reallingva *la japana*); tiuj strangetaĵoj speciale okulfrapas, ĉar ili ofte aperas titole en tiu periodaĵo.

Ĉu esperanto evoluos kiel la angla, en kiu pluraj sublingvoj klare kunekzistas, kiel evidentigas la ofteco de pluraj vortoj por koncepto havanta nur unu vortigon en la plimulto el la lingvoj (*freedom / liberty*, 'libereco'; *unavoidable / inevitable*, 'neevitebla'; *brotherly / fraternal*, 'frata', ktp.), aŭ ĉu unu el la sublingvoj iom post iom konkeros la teritorion de la alia? Nur la estonta historio povos respondi.

Multo tiurilate dependos de la maniero, laŭ kiu la lingvano-ro evoluos. Povos okazi, ke la konsisto de la esperantistaro aliĝos kaj ke homoj el nehindeŭropaj lingvoj fariĝos la plej multaj. Tio povus konduki al prefero por pli er-kunglua lingvoformo. Unu el la faktoroj, kiuj kaŭzas lingvoŝanĝon ja estas tio, kion lingvistoj nomas "subtavolo" (aŭ, en la alia sublingvo, "substrato", kvankam *strato* ĉi tie signifas ne straton, sed tavolon): temas pri la fakto, ke, kiam homoj alprenas novan lingvon, la strukturoj de ilia gepatra lingvo plu aktivigas en ilia nekonscia menso, dum ili uzas la due lernitan.

Ekzemple, se anglalingvano diras *scienca serĉado*, anstataŭ la normallingva *scienca esploro*, tio okazas, ĉar la angla vorto *research* ĉeestis subsojle de la konscio, en la subtavolo. Same, se franco diras "*la kelnero servis bieron al li*" anstataŭ la laŭnorma "*la kelnero servis lin per biero*", aŭ "*la kelnero alportis bieron al li*", li tion faras influate de la subtavolo (en la franca, la verbo *servir* povas signifi 'disponigi ion konsumotan').

Vortoj kiel la ĉi-supre menciitaj *redaktoro* kaj *videokaseto* signas la intervenon de eŭropa subtavolo. Fakte, ĝuste pro la influo de eŭropa subtavolo en la menso de Zamenhof troviĝas en esperanto multaj formoj, jen gramatikaj, jen vortaj, kiuj ne kongruas kun liaj diversloke klare esprimitaj intencoj rilate al la facileco, logikeco kaj internacieco de la lingvo. La plej influa subtavolo en esperanto ĝis nun estis eŭropa, sed tio povus facile ŝanĝiĝi.

Verdire, eĉ se la konsisto de la lingvanaro, kaj do la subtavolo, ne aliĝos, povos okazi evoluo favora al pli alglua lingvoformo - al elinternismo - se la uzantoj pli bone konscios la esencon de la kunmeta kaj deriva sistemo. Oni ja ne forgesu, ke sub la unua, nacilingva subtavolo, troviĝas pli profunda: la mensaj meĥanismoj, kiuj regas spontanen sin-esprimadon. Tiuj, kiel ni vidis en la tria ĉapitro, favoras er-kombinadon. Mia impresado estas, ke tiusenca konsciigo nun komencis aperi, ĉefe inter la junuloj, sed temas nur pri plej subjektiva sento, kaj mi ne scias, kiamaniere kontroli ĝian eblan pravecon.

Motivoj de ni nekonataj igas nin preferi tion aŭ tion ĉi

Ni ĉi-supre konsideris la diversajn fortojn agantajn en la lingvo nur el la vidpunkto de prilingvaj ideoj kaj de la neceso adaptiĝi al konstante modifiĝanta socio. Sed lingvo estas homa fenomeno, kaj en ĉio homa enplektiĝas psikaj motivoj, el kiuj la plejparto ne estas konata de la aganta individuo. Psikologia esplorado pruvis, ne nur la ekziston de tiaj nekonsciaj fortoj, sed ankaŭ alian interesan fakton, nome, ke homo same nekonscie emas atribui neĝustan, aŭ nur parte ĝustan, klarigon al siaj nekonscie elektitaj agoj. Tiun psikan meĥanismon oni nomas

raciecigo, ĉar ĝi celas doni raciecan motivadon al ago, kies ĉefajn motivojn racio fakte ne regis.

Iom komplike, ĉu ne? Eble vi komprenos pli facile, se mi aplikos tiun veron al mia kazo. Kial mi ege favoras elinternismon? Vi trovos en ĉi tiu verketo multajn klarigojn. Sed la veron mi ne scias. La motivoj, kiujn mi atribuas al mi, povas esti veraj, sed ili ankaŭ povas esti trompaj, kvankam mi estas sincera. Io en mi povas trompi min. La ideoj, kiujn mi havas pri la racia bazo de mia starpunkto, povas esti simplaj raciecigoj: argumentoj, kiuj ebligas al mi akcepti mian vidpunkton kiel nestultan, sed kiuj eble tute ne rilatas al la aŭtentaj kaŭzoj de mia prefero. Homo neniam scias vere, kial ĝi preferas tion kaj ne tion ĉi. Sed ĝia psiko protektas ĝin, dirante trompe-lule: ne havu zorgojn, vi prave elektis, vi agis pro ĉi tiu kaj tiu ĉi kaj tiu alia kaŭzoj, kiuj estas tute bonaj.

Simile, multaj homoj, kiuj, sciante nenion pri esperanto, trovas ĝin dekomence forpuŝa, tute ne konas la kaŭzon de sia malŝato, sed tiun nekonon ne konscias: ili povas klarigi al vi multkiale, konvinke, racie, kie fontas ilia sinteno.

Rilate al nia *bona lingvo*, ĉu gravas, ke ni ne konas la motivojn de niaj prilingvaj preferoj kaj povas iluzii nin pri ili? Iom, eble, sed fundamente ne. La sociaj fortoj, kiuj portas esperanton, kaj la lingvo mem estas multe pli potencaj ol individuoj. La lingvo prizorgos mem sian ekvilibron, per nekonsciaj rimedoj, kiel konstante faras normala homa korpo. Tiu kompensas mankojn, defendas sin ĉe mikrobaj kaj virusaj atakoj, vundojn riparas, forĵetas troaĵojn, adaptas sin kiel eble plej bone, ne sciante, kiel ĝi tion faras. Kompreneble, tiu maniero prizorgi sian ekvilibron sukcesas plene nur, se la koncerna korpo estas sana kaj fortika, alivorte: se ĝi estis sufiĉe rezista, kiel plej eta etulo, por travivi sendifekte malfacilajn kondiĉojn, kaj tiajn renkontis sufiĉe por disvolvi en si taŭgan kapablon rezisti kaj venke bonfarti ĉe ĉiaj premoj kaj streĉado. La centjara historio de esperanto rivelis, ke ĝi estas organismo sana kaj fortika, kapabla transvivi plej premajn cirkonstancojn, gravedajn je morto. Ni do povas fidi ĝin. *Bona lingvo* ĝi pruvis sin ankaŭ laŭ rezistokapablo.

Greklatina kontraŭ propre esperanta, aŭ la tento "aristokrati"

Mi diris ĉion ĉi por prepari vin ekkoni suspekton mian. La advokatoj de eleksterismo havas argumentojn, je kies valideco ili certe sincere kredas. Sed oni rajtas tiun pridubi, same kiel ili rajtas pridubi la validecon de la miaj. Sian motivaron ili ne pli konas, ol iliaj kontraŭuloj konas sian. Tia estas la homa estado.

Mia suspekto estas jena: ke sub la prefero por eleksterismo, en okazoj, kiam tute sufiĉas la elementoj de la ordinara lingvo, kaŝiĝas nekonscia deziro superi. Laŭ tiu hipotezo, la ŝatantoj de tia sublingvo probable nekonscie deziras krei en esperantujo ian nobelan klason, distancan de la amaso. Inter orientaj azianoj, mi renkontis similan preferon nur ĉe homoj, kiuj, ial, bezonis montri sin (verŝajne ĉefe al si mem) superaj al la ĝenerala lingvanaro. Estas al tiu regulo escepto: *El Popola Ĉinio*, ĉe kiu, ŝajnas al mi, temas pli pri erara supozo, ke estas saĝa politiko adapti sin al la lingvaĵo de la okcidentanoj, kia la tradukistoj ĝin imagas laŭ la publikigaĵoj, manke de kontaktoj kun la vivanta, reala, spontane ŝprucanta lingvo.

Estas klare, ke tiu, kiu tuj komprenas eleksteran vorton, havas avantaĝon super tiu, kiu devas traserĉi vortaron aŭ foliumi la libron serĉe al ĝlosaro. Li estas kiel riĉa nobelo rilate al kamparano senmona, povanta atingi samaltan nivelon nur multapene kaj labore. Aŭ, se vi memoras la ekzemplon pri kuro, ĉiu ekstere ĉerpita vorto ne apartenanta al la reala lingvo estas kvazaŭ alta roko baranta la vojon, sur kiu vi kuras. Tra la roko ekzistas pasejo, sed ĝi ne estas tuj trovebla por ordinarulo. Nur privilegiuloj senhezite trapasas. Se vi diras *malfrua*, ĉiuj lingve maturaj esperantistoj tuj komprenos vin, ĉar la vorto apartenas al la reala lingvo: ne staras baraĵo. Se vi samsence diras *tarda*, alta proporcio el la lingvanaro haltos, devante serĉi, kiamaniere pasi transen por trovi vin kaj povi plu sekvi.

En la granda plimulto el la kazoj, la avantaĝo estas donita al tiuj, kiuj komprenas la latinan aŭ iun latinidan lingvon, plus tiujn grekajn radikojn, kiuj firmiĝis en la lingvaĵo de kleruloj okcident-eŭropaj.

Tiurilate, kelkfoje aperas strangaj misperceptoj. En artikolo, kiun li publikigis ("Kio akorde ne sonas, tio rimon ne donas", *Fonto*, 1981, 2, 13, pp. 35-38) rebate al mia teksto "La okcidenta Dialekto", aperinta en *Esperanto* (1977, julio-aŭgusto, p. 125), de Diego ironiis pri mia aludo al la sperto travivita de Kiotaro Deguĉi ĉe la Sofia Kongreso, kiam, provante sekvi la prelegojn de Internacia Somera Universitato, la juna japano bedaŭre konstatis, ke la tro multaj eŭropdevenaj fakterminoj baras lian komprenon. Diego rebatas, ke ankaŭ li ne konas la specialvortojn, kiam temas pri kampo, kun kiu li ne familiariĝis. Ankaŭ li ne povus sekvi.

Li misinterpretis min. Kio malhelpis komprenon ĉe la japano, tio estis, ne vortoj tiel fakaj, ke ili signifus nenion al meza okcidentano, sed vortoj, kiujn ĉi-lastata sufiĉe renkontadis en la propra lingvo por povi sekvi ĝeneralan tem-prezentadon, en kiu ili aperas. Temas ja pri vortoj kiel *pediatro*, *miokardio*, *diakrona*, *aŭtoktono*, *monokromata*, *eŭfonie* k.s. Tiaj vortoj havas, se mi ne eraras, tre proksiman formon en la hispana, tiel ke klera hispanlingvano tuj scias, kion ili signifas, aŭ almenaŭ al kiu sfero ili apartenas. Li povas samrapide kiel la gvidanto sekvi la vojon.

Por ĉino aŭ japano, male - kaj ankaŭ por multaj usonanoj socie nefavoritaj, aŭ, kvankam iom malpli, por rusoj (el la ses cititaj vortoj, nur *pediatro* kaj *aŭtoktono* havas similforman tradukon en la ĝeneralrusa vortaro de Oĵegov) - ĉiu tiutipa vorto baras la vojon; ĝi estas mistero, kiun necesas solvi foliume. Tion provis fari Kiotaro Deguĉi dum la koncerna prelegaro, sed li ne sukcesis sekvi la aperritmon de la nekonataj radikoj: la ISU-instruoj estis por li fermitaj. Por de Diego, tiel ne estus. Kaj tamen, por atingi tiun nivelon, de Diego certe penis multe malpli ol la japano.

Se, anstataŭ la cititaj vortoj, la preleganto aŭ verkanto uzas vortojn kiel, respektive, *infankuracisto*, *kormuskolo*, *tratempa*, *praloĝanto*, *unukolora*, *belsona*, ne necesas aparteni al la greklatina kulturmondo por tuj kompreni: ĉesas distingiĝi la klasoj lingve nobela (hispanoj, francoj, italoj, kleraj anglalingvanoj...), grandburĝa (germanoj, skandinavo), burĝa (rusoj kaj slavoj ĝenerale), etburĝa (hungaroj, nekleraj homoj diverslandaj...) kaj popola (azianoj, afrikanoj...): la rilato demokratiĝis.

Tia maniero esprimi sin konformus al la celo de Zamenhof. En sia teorumado pri la lingvo internacia, tiu ja forĵetis la sistemojn, kiuj havigus

ne lingvon internacian en la vera senco de tiu ĉi vorto, sed nur lingvon internacian por *la pli altaj klasoj de la socio*. ("Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia", *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto*, Parizo: Esperantista Centra Librejo, 1927, p. 299)

Kontraste al tio, li taksis venkonta tian lingvon, kiun

post kelke da monatoj povus bonege posedi jam per unu fojo la tuta mondo, *ĉiuj* sferoj de la homa socio, ne sole la inteligentaj kaj riĉaj, sed eĉ la plej malriĉaj kaj senkleraj vilaĝanoj. (*Samverke*, p. 300: kursivigo zamenhofs en ambaŭ citaĵoj. La vorto *inteligenta* verŝajne havas la sencon de la rusa *intelligent*, 'intelektulo').

Certe la esprimo *post kelke da monatoj* ne estas realisma. Sed ju pli ni uzas vortojn ne formitajn el la baza radikaro, des pli ni aldonas monatojn kaj jarojn da lernado aŭ da lingva malkomforto al kunhomoj, kiuj, eĉ estante plej kleraj en la propra kulturo ne havas rimedon diveni, pri kio temas niaj greklatinaĵoj. La zamenhofs celo de lingvo "por *ĉiuj* sferoj de la homa socio" tiel forlasiĝas. Por kio? Ĉu por io alia ol la plezuro aristokrati? Ĉu eĉ eble por nenio, nur ĉar konscio mankas? Lingvo, kiu respektus la celon de Zamenhof (eĉ se tiu, nesufiĉe klarvidinte, parte respondecas pri la problemoj) estus pli *bona lingvo* ol komunikilo ignoranta kaj la klerulojn, kaj la amasojn, kies kultura fono ne estas okcidenta.

La problemoj pri la grekaj elementoj

Unu el la problemoj de esperanto, se ĝi estu *bona lingvo* ne-nur-eŭropa, fontas el la fakto, ke tiom da terminoj, ekster la ĉiutaga lingvo, uzas grekajn elementojn, kiuj samsonas kiel bazaj esperantaj radikoj. Ni vidis en la unua ĉapitro la ekzemplon pri

teologo, en kiu la greka radiko *teo-*, signifanta "dio", kolizias kun nia vorto por la konata trinkaĵo. Multaj similaj formaĵoj min ege ĝenas. La lingvo estus pli konsekvenca, pli konformusian esencan spiriton, se *mono* signifus nur "pagilo", kaj ne devus transpreni, en grekdevenaj vortoj, la signifon "unu".

Same pri *homo* en la senco "sama". PIV registris, kiel ĝi devis, ĉar temas pri efektiva uzo, la vorton *homoseksuala*. Tiu signifas nenion alian ol "samseksema", kaj, kiel kutime ĉe greklatinajoj, ĝi estas pli longa. La inklino densigi estas tute normala, kaj ĝi nature kondukas al la pli oportuna *homoseksa*, kiun mi foje aŭdis. Sed tiu fariĝas neklara, ĉefe por neeŭropanoj, pro la ekzisto de la radikoj *hom* kaj *seks*.

Simile netaŭga mi taksas *neo* en la senco "nova". Al mi, *neologismo* estas vorto, kiu tute ne plaĉas (vi ne miras, ĉu?). Mi flaras en ĝi la *logon de neo*, de neniaĵo, tiel ke ĝi odoras iom diable. Mi preferas vorton, kiu sekvu la principojn de mia infana formo de la lingvo: *novformo*, *novvorto* aŭ *novradiko* mi tiam dirus, kaj mi fakte ankaŭ utiligas tiujn formojn, kvankam mi sentas min devigita kompromisi kaj do ankaŭ uzas la grekajon. Mi sinceru: ĉi-lastan mi eldiras nur kun piko de la konscienco, kvazaŭ mi ne estus tute honesta, aŭ perfidus ion sanktan...

Preterpase mi notu, ke, se, laŭ mia konvinko, la lingvo evoluos al pli intensa ekspluato de la riĉaĵoj kaŝe kuŝantaj en ĝia baza vortprovizo, ĝi servos al si per sistemo, relative malofte uzata, sed kies ebla fekundeco estas ege granda: la prefiksa uzo de kelkaj radikoj plej ofte uzataj adjektive. De longe oni diras *bonfari*, *bonvoli*, *novedzo*, *etindustrio*, *etburĝo*, *grandsinjoro*, *belartoj*, *belsoneco*, ktp. Mi opinias, ke pli vasta apliko de tiu sistemo povus serioze riĉigi la lingvon, respektante ĝiajn demokratiajn tendencojn. Tiu sistemo havigas la tri ĉi-supre cititajn sinonimojn al *neologismo*, kaj laŭ mia sento, vorto kiel *klarvidi* ne tute samsignifas kiel *klare vidi*, sed havas sencon pli proksiman ol "ĝuste percepti". Kiam mi verkis novelojn per limigita vortprovizo, mi plurfoje uzis tiajn formojn kaj ili montriĝis bone akceptitaj de la publiko.

Vorto do necesas por la koncepto "neologismo", sed se *novformo* aŭ io simila sufiĉas, kial devigi ampleksan parton de la homaro encerbigi al si plian, pli malfacile memoreblan

sonĉenon? Ia ŝpara principo regas en la plimulto el la lingvoj. Ne en ĉiuj, konsentite. La angla, ekzemple, tute ne havas ĝin: ĝi amasigas sinonimojn kaj tavolojn diversepokajn sen honto kaj hezito, tiel larĝigante la distancon inter la sociaj klasoj.

Sed ĝi estas escepta. La plimulton el la lingvoj regas kvazaŭ-ekonomiaj reguloj, kiuj konstante forbalaas la superfluaĵojn. En la franca, ekzemple, *faillir*, en la senco 'manki', *choir*, 'fali', kaj *tistre*, 'teksti' (el kiu restas nur la participo *tissu*, kun la senco 'teksaĵo') paralele uziĝis, dumtempe, kun la sinonimaj *manquer*, *tomber* kaj *tisser*. Sed la ĝenerala ekonomio de la lingvo kondukis al forlaso de la unuaj formoj, pli neregulaj, pli komplikaj, favore al la verboj postulantaj malpli da nerva elspezado. Ankaŭ ĉi-aspekte regas konkuro: inter diversaj kuzaj formoj, por esprimi difinitan ideon, fine venkas la plej taŭga. La principo pri neceso kaj sufiĉo aplikigigas.

La ekonomia principo ankaŭ prizorgas tion, ke la mankoj estu ŝtopitaj. Zamenhof nomis "komercan entreprenon" ankaŭ *firmo*. Sed ĉar tiu vorto koliziis kun la adjektivo *firma*, kiu havas tute alian senco, kaj disponi adjektivon rilatan al komerca entrepreno, ne konfuzeblan kun firmeco, estis oportune, la lingvo riĉiĝis per *firmao*. *Firma decido* kaj *firmaa decido* tiel fariĝis distingeblaj.

Esperanto celas peri komunikadon interkulture. Estus konforme al tiu celo, kaj ankaŭ, verdire, al la deziro de granda parto de la kolektivo, kiu vivigas ĝin, respekti tiujn ekonomiajn principojn. Ili prizorgus ekvilibron en la kreskado. Se oni larĝigas sen egale profundigi, oni ricevas tiel maldikan tavolon, ke ĝi fariĝas danĝere rompebla. Transpreni radikojn el ekstere estas etendiĝi horizontale. Disvolvi la kaŝitajn, subsupraĵajn riĉojn estas kreski vertikale, akiri fortikiĝan profundecon. Oni estas des pli stabila, ju pli profunda la pezocentro.

Tiadirekta evoluo estas sufiĉe probabla. Neologismoj kaj grekaĵoj grandparte estas skafaldo. Ili utilis, dum la lingvo estis konstruiĝanta, tro malforta por disflori surbaze de la propra havaĵo, sed nun, post kiam ĝi fortikiĝis kaj interne amasigis la rimedaron necesan por teniĝi mem, la skafaldo verŝajne malaperos: la konstruaĵo ne plu bezonas ĝin. La lingvo iĝis memstara.

La skafaldo tamen kelktempe plu restos. Multaj lingvo-uzantoj, en okcidento, ankoraŭ ne sufiĉe distanciĝis de la naciaj dirmanieroj, por vere asimili la lingvosistemon de esperanto kaj konscii ĝian bonecon. Pri tio oni indulgu ilin. Nia lingvo havas trompan aspekton: ĝi aperas multrilate tiel simila al la okcidentaj, ke ordinara okcidentano ne havas facilan rimedon scii, kio apartenas al esperanto, kaj kio ne.

Tamen, longperspektive, estos malfacile (kaj sensece) kontraŭbatali la bon-ekonomian principon. Se preni la vorton *aŭtodidakte*, ekzemple, kian avantaĝon ĝi havas rilate al *memlerne* aŭ *meminstrue*? Gi estas pli longa, pli peza, kaj signifas ekzakte la samon: *aŭto* estas la greka formo de "mem" kaj *didakt* la greka formo de "instru". Kial paroli greke, se eblas sin esprimi en esperanto? Tio estas kontraŭa al la naskokialo de la lingvo.

La vorto *autodidacte* necesas en la franca, ĉar tiu ne povas ĉi-sence formi vorton bazitan sur pure francaj rimedoj: la franca estas konstruita tiamaniere, ke la vorto por "mem", *soi-même*, neniam povas uziĝi prefikse, oni do tiufunkcie diras *auto* (aŭ *self*). Transpreni en esperanton la bonajn kvalitojn de alia lingvo havus sencon, sed la mankojn? Por kio do? Tio estas tro absurda por daŭri en la kondiĉoj de tutmonda komunikado.

Efektive, konsciigo konstateblas: antaŭ dudek jaroj, okcidentaj komencantoj malofte kritikis la konstantan uzon de grek- kaj latinaĵoj en esperanto. Iliaj nunaj posteuloj reagas malsame; ili demandas: "Kial oni akceptis *aŭtodidakte*, dum *memlerne* kaj *meminstrue* ekzistas?" Antaŭ tia demando, la kursgvidanto sentas sin kiel instruisto pri la angla, al kiu lernanto diras: "Kial oni ne povas traduki *mi povos* per *I will can*?" Kiel ni vidis, en la angla kurso la respondo povas esti nur: "Estas tiel", kio subkomprenigas: "Tia estas la forto-rilato inter la anglalingvanoj kaj ni". Sed ĉu io simila akcepteblus pri esperanto? Ne. Oni venas al esperanto-kurso ĝuste por lerni lingvon eksteran al forto-rilatoj. La sola ebla reago estas honeste konfesi: tio estas la nuna stato de la lingvo, kiun Zamenhof mem rigardis provizora, almenaŭ pri la simila kazo de vortoj pseŭdosufiksaj:

Ni povas *esperi*, ke pli aŭ malpli frue la (...) vortoj "fremdaj" fariĝos arkaismoj kaj cedos sian lokon al vortoj "pure Esperantaj"; ni povas eĉ *konsili* tion; sed *postuli* tion ni ne povas. (*Lingvaj respondoj*, n-ro 52, vk cit., p. 34-35; Zamenhof mem kursivigis).

Ni do povas klarigi al la lernantoj, ke esperanto estas libera lingvo, en kiu oni ne rajtas postuli. Sed oni rajtas *esperi* kaj *konsili*. Tiu zamenhova respondo ĝenerale kontentigas. La klaso denove spiras libere. Mi havas neniun eblon taksi, kio okazas en la mondo ĝenerale, sed mia impresio estas, ke la nunaj lernantoj pli bone sentas la lingvon ol iliaj antaŭuloj, verŝajne ĉar la kursgvidantoj mem pli bone sentas ĝin. Estus do ne mirige, se la evoluo kondukus al laŭgrada forlaso de la senutilaj grekaĵoj.

Kompreneble, tiu evoluo plu vekos reziston. Leginte la ĉi-supran paragrafon pri *memlerne*, kelkaj diros: "mi ne sentas la du vortojn ekzakte samaj; kvankam mi ne povas difini, kio, estas io plia en *aŭtodidakte*". Kompreneble estas io plia: ĝi havigas pli altan memtakson. Oni sentas sin pli altnivela - nobela, aŭ, grekece, aristokrata - se oni parolas greke, ol se oni parolas la normalan, ĉiutagan lingvon, tiun de la "plej malriĉaj kaj senkleraj vilaĝanoj". Kaj la deziro senti sin pli alta estas tre potenca forto en homaj aferoj. Tial eble dum longa tempo ambaŭ formoj de lingvo kunekzistos.

Kaj eble mi plene malpravas, kaj komplete venkos la grekeca esperanto, konkerante iom post iom la tutan mondon ĝis nun fremdan al ĝi... Se tiel, tio signifos, ke la mutacio okazis tro frue, aŭ ke entute ne temis pri mutacio. Ke la bezono senti sin supera estis tro forta ĉe tro multaj, por ke egalecaj rilatoj havu ŝancon prosperi.

Kelkaj jarcentoj pasos, jarmiloj eble. Kaj la konfuza, nebula sopiro homara al demokratiaj rilatoj plu agos en la ombro, subkonscie, ĝis ĝi enkarneĝos en nova lingvo kapabla realigi ĝin, lingvo konforma al la psikolingvikaj leĝoj de egaleca homa komunikado. Kontraŭaj fortoj provos dispremi ĝin aŭ devojigi ĝin de ĝia vojcelo. Sed al ili ĝi rezistos: ĝi ekzistos, ĝi persistos. Sub tute alia formo, eble, ĝi provizos la homaron per *bona lingvo*.

7. BONA LINGVO LITERATURA

La estonta verkisto

Vivanta lingvo naskas literaturon. Estas do normale, ke ankaŭ esperanto literature servu. Sed la verkisto, kiu vere influos la evoluon de la lingvo en la direkto de ĝia plejboneco, de ĝia kerna esenco, ankoraŭ ne vere montriĝis, kvankam kelkaj proksimis al tiu funkcio.

Miaopinie, tiu verkisto nepre aperos. Li verkos librojn, kiuj allogos tre ampleksan parton de la lingvokolektivo, pro ilia enhavo (temos ja pri iu, kiu havos ion por diri, kaj ne iu, kiu verkos amatore, pli por ludi per la lingvo ol por ion komuniki), sed ankaŭ pro ilia stilo. Estos iu, kiu bonege regos la ordinaran lingvon, la "realan", kiel mi ĉi-verke nomis ĝin. Li plene rezignos pri la novformoj, kiuj ne eniris la parolan esperanton, ĉar la beleco de lia stilo baziĝos sur plena ekspluato de la esprimo-ebloj, kies riĉecon konstante rivelas la formoj spontane ŝprucantaj, kiam esperantistoj komunikas inter si.

Tiu talentulo verkos nek por la propra gloro, nek por ŝanĝi la lingvon aŭ ĝin evoluigi laŭ sia teorio. Li verkos, ĉar li estos verkisto, kaj do ne povos ne verki. Kaj, ĉefe, li verkos por la publiko, kun granda respekto al tiu, kaj sekve al la speco de lingvo, kiun ĝi uzas. Sed ĉar li estos ege talenta, li uzos ĝin multe pli bele ol tio okazas en konversacioj kaj ordinara korespondado.

Miaopinie, li tute ne, aŭ tre malmulte, uzos grekaĵojn. Nek estos lia komunikilo la okcidenta sublingvo. Li ne bezonos unue verki kiel okcidentano, kaj poste korekti sin, anstataŭigante *ornitologia* per *birda* (aŭ *birdoscienco*), *hidraŭlika* per *akva* kaj *sekundara* per *duagrada*. Li nature sentos, ke ju pli simpla la formiĝo, des pli bela la stilo, ĉar des pli pure esperanta. Li do havos efikon malan al tiu de Kalocsay kaj Waringhien.

Tiuj kredigis al la publiko, ke esperanto ne povas per si mem beli. Ili komunikis al la amasoj, aŭ al la parto, kiu interesiĝas pri literaturo, sian nefidon kaj malestimon al esperanto. Siajn antaŭjuĝojn. Ne tiel la preparolata verkisto. Lia influo estos rivela: li malkaŝos al la esperantistaro, ke ĝi posedas trezoron, kiun ne

eblas elĉerpi, ĉar kombineblo estas senfina, kaj la kombineblaj eroj en la ordinara lingvo sufiĉe abundas por respondi al ĉiuj bezonoj.

Komence de mia enmovada vivo, mi legis poemon, kies aŭtoron mi forgesis, sed kies unua verso definitive fiksiĝis en mia memoro:

Nigraj nuboj dense noktas sur ĉielo...

Simile min tuŝis la versoj de Kurzens:

*Ankoraŭ devas fajri vera tago,
Ankoraŭ devas nigri vera nokto,
Ne povas ja de grizo ĉio pleni.*

kaj de multaj aliaj poetoj, inkluzive la ŝatindan unuverson de Waringhien (Maura):

Abelo lasta zumas super la lasta rozo.

Tiaj juveletoj montras la vojon, kiun sekvas la aperonta verkisto. Ili impresas ege bele, arte, kortuŝe. Sed ili ĉerpis nenion ekstere. Ili uzas plej simplan vortprovizon. Ili indikas, el kio konsistas literatura lingvo senpere alirebla al ordinara, neokcidenta esperantisto.

Literatura lingvo: io alia ol la ĉiutaga

Pro psikologiaj kaŭzoj, aluditaj en la unua ĉapitro, kiujn detaligi ĉi tie estus tro longe, prilingvaj diskutantoj emas atribui al la kunparolanto starpunkton pli ekstreman ol tiu efektive havas: emocio (eĉ ne konsciata) favoras trosimpligon. Krome, io puŝita ĝis-ekstreme estas pli facile komprenebla, kaj atakebla, ol pli nuanca konceptado. Tial, verŝajne, kiam mi traktas pri la punktoj ĉi tie konsiderataj, oni ofte miskomprenas min, kaj kredas, ke mi malakceptas la diferencon inter la literatura lingvo kaj la ordinara. Alivorte, oni riproĉas, ke mi rekomendas la

uzon de banala lingvaĵo, simila al tiu, kiun oni uzas en ĉiutagaj konversacioj.

Tion diri estas misformi mian penson. Mi forte kredas je literatura lingvo, do je lingvo plejplej malbanala. Sed kio vekas senton pri banaleco? Nekonscia statistikado. Nesciate, nia menso konstante klasas tion, kio trafas ĝin, kaj atribuas al la koncerna afero statistikan situon: ĉiama, oftega, ofta, mezofta, malofta, ege malofta, neniama. Niaj ideoj pri certeco kaj probableco tiamaniere estiĝas. Suno ĝis nun leviĝis ĉiumatene, sekve sunleviĝo lokiĝas en la kategorio "ĉiama": estas do *certe*, ke ankaŭ morgaŭ ĝi elnokiĝos nin. Malofte neĝas en novembro ĉi-regione, sed tio kelkfoje okazas: estas do *probable*, ke ankaŭ ĉi-jare novembro montriĝos senneĝa. Ankaŭ pri lingva esprimado nia menso, nekonscie, konstante statistikas, tiel ke ni povas diri al ni: tio estas banala, tio ne; tio estas normala, tio ne.

Pro tio mia opinie eraras la francaj esperantistoj, kiuj emas uzi *ci* anstataŭ *vi* por traduki la francan pronomon *tu*. Se, en diversaj medioj, vi surbendigos cent horojn da spontana esperanto, tutmonde, kaj analizos tiun materialon, vi rimarkos, ke *ci* ne aperas en via specimeno. Male, se vi registros franclingvajn konversaciojn sammediajn, vi rimarkos, ke *tu* ofte diriĝas. Vi rimarkos ankaŭ, ke en tiuj situacioj, kiam franclingvanoj diras *tu*, esperantistoj diras *vi*, ne *ci*. Tiujn faktojn, ĉiu lingvano kun mondaj rilatoj mense (sed ne necese konscie) registras. Uzante *ci* en teksto, vi do elvokas en via leganto impreson de strangeco, de malofteco, kiu ne sentiĝas, kiam franclingvano legas *tu*-frazon. Alivorte, la *ci*-uzantaj roluloj ne parolas normale kaj tiu formo en literatura verko praviĝas nur, se oni deziras krei etoson de nenormala medio, la etoson, kiun oni elvokus en la angla, anstataŭigante *you* per *thou*.

En lingva produktaĵo, banaleco povas rilati al la enhavo (pensoj neoriginalaj) kaj al la formo (maniero uzi la lingvon, sendepende de la temo pritraktata). Pri la formo, en esperanto, distingendas du elementoj: la radikoj mem, kaj ilia aranĝo.

Ke esperanto, literature, estas eksterordinare *bona lingvo*, tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la kombinlibereco ebligas malbanali uzante eĉ tre limigitan nombron da radikoj. Mi spertis pri tio specon de objektiva pruvo, kiam Henri Vatré kaj Reto Rosetti,

preparante antologion de esperanto-prozo, proponis enmeti en ĝin mian rakonteton "Timiga diro", aperinta en *Lasu min paroli plu* (Chapećo: Fonto, 1984, p. 48-51; la sama publikiĝis, kun kelkaj ŝanĝetoj, sub la titolo "Terura novaĵo", en *Kontakto*, 1983, 1, p. 10, kiel facilnivela teksto). Tiun rakonton mi verkis disponante nur la 460 radikojn (inkluzive de tabelvortoj kaj afiksoj) viditajn en la dekkvar unuaj ĉapitroj de *Gerda malaperis!*, ĉar ĝi estis "akompana teksto" por la lernantoj uzantaj tiun lernilon. Montriĝis, ke personoj legantaj ĝin eĉ ne rimarkas, ke ĝi estis verkita sub tiaj limigoj. Se la elementoj de la "reala lingvo" ne ebligus verki literature, ĝia elekto por antologio ne kompreneblus.

Multaj, aliflanke, provas malbanali per la uzataj radikoj. Miaopinie, ili mistrafas. Estas iluzio imagi, ke estetika efiko rezultas en esperanto el la estetika efiko de la koncerna radiko en la fontolingvo. Tio preteratentas, ke, kaj en la fontolingvo, kaj en esperanto, radikoj havas en la mensoj ian statistikan lokon, kiu dependas de ilia ofteco en la respektivaj lingvoj. Renkontiĝas pri neologismoj situacio simila al la supre komentita pri *ci*.

Ekzemple, leganto, kiu renkontas la vorton *febla* ('malforta', 'senforta'), reagas al ĝi kiel al io eksternorma kaj sekve sentas sin ne amike alirata de la verkinto, sed ŝancelata, forpuŝata ien ekster la teritorio de la lingvo, kiun li lernis kaj amas. La etoson de la franca vorto *faible* (prononcu: *febl*) li tute ne sentas. Eĉ franclingvano sentas ion alian, ĉar *faible* estas la normala vorto en la franca por esprimi la malon de 'forta', kaj en esperanto la normala vorto estas *malforta*. Rezulte, en la menso, la vortoj, kiuj situas egalloke estas nur *faible* kaj *malforta*. La vortoj *febla* kaj *faible* ne staras samnivele, aŭ, se vi volas, en la sama statistika kategorio, kaj la franclingva esperantisto ne sentas, per kiu nuanco *febla* distingiĝas de *malforta*. Tio kaŭzas ĝenon en la glata legado de la teksto, eĉ se la koncernato tuj komprenas la koncepton.

Por la plej multaj esperantistoj, la vorto simple estas mistero. Ili ĉesas sekvi la rakontanton kaj haltas, senhelpe. Inter ili, la reagoj malsamas. Iuj, post la ekhalto, ŝultroleve preterpasos. Se tiaj vortoj tro abundas, ili ne plu povos kompreni la rakonton kaj definitive fermos la libron. Eble ilia intereso pri espe-

rantlingva literaturo tiuhore mortos. Mi renkontis plurajn dekojn da homoj, kiuj diris al mi, ke ili neniam legas esperanto-poezion, ĉar ili foje provis, sed estis tro pene konstante uzi vortaron. Kiam mi montris al ili poemojn en la "reala lingvo", ili ege miris kaj admiris. Estis por ili ĝojiga kaj rekuraĝiga malkovro, ke ankaŭ ilia lingvo uziĝas poezie.

Inter tiuj, kiuj serĉos la signifon de la vorto, aperos larĝa gamo da diversaj reagoj. Kelkaj alprenos humilan sintenon ("*Mi ankoraŭ ne estas sufiĉe sperta esperantisto, multo restas al mi lernenda*"). Kelkaj reagos snobe ("*Haha! Nova vorto, kiun mi de nun uzos por impresi per mia kulturnivelo*"). Sed la plimulto, trovinte la signifon, sentos konsternon kaj miron, ofte miksitajn kun kolereto ("*Tio signifas nenion pli ol malforta! Kial diable tiu aŭtoro ne uzas la normalan vorton?*"), en kiun povos sin enŝovi naŭza elreviĝo ("*Mi lernis lingvon tute taŭgan por literaturo, sed jen denove libro verkita en alia dialekto. Oni trompas min!*").

Eblas poezii reallingve

Resume do, laŭ mia gusto kaj, konstateble, laŭ tiu de tre ampleksa parto de la esperanto-publiko, la beleco de verko ne ŝuldiĝas al la uzo en ĝi de radikoj eksteraj al la "reala lingvo". Oni povus esprimi tiun starpunkton per du principoj:

- Senbeleca frazo restas senbeleca, eĉ se en ĝi, anstataŭ vortoj el la "reala lingvo", oni uzas radikojn fremdajn al tiu (alivorte, anstataŭigi *freneza* per *fola* aŭ *malĝoja* per *trista* ne sufiĉas por igi frazon literatura).

- Bela frazo fariĝas pli bela, se oni anstataŭigas en ĝi la vortojn eleksterajn per vortoj elinternaj, t.e. per vortoj formitaj el elementoj el la "reala lingvo", kondiĉe ke oni bone sentu tiun kaj plene ekspluatu ĝiajn eblojn.

Limigi sin je vortelementoj el la "reala lingvo" ne signifas verki banale. Tion bele ekzempligas la ĉi-supre citita unuverso de Waringhien (Maura):

Abelo lasta zumas super la lasta rozo.

Staras en ĝi nur vortoj el la "reala lingvo", kaj cetere, ĉi-kaze, ĉiuj troveblas en la *Fundamento*. Tamen tiu frazo ne apartenas al la parola aŭ ĉiutaga lingvo, nur al la literatura. Kial?

Unue pro la ideo mem, pro la delikate pentrita bildo. Eĉ se ĝi aperus en tute ordinara interparolo, ĝi sentiĝus kiel ekstera al la ĉiutaga lingvo: ĝi estas tro freŝe poezia por ke oni sentu ĝin sialoka en banala konversacio; ĝi perceptiĝus kiel vizito de la literatura penso en la komunan.

Due pro la formo. La ritmo, kvankam ne perfekte regula (pro la akcento de *super*), tamen estas pli poezia ol tiu de normala frazo. Kiam, neintence, oni eldiras frazon kun regula ritmo, homoj tion rimarkas, kaj emas ŝerce komenti: "Ej! Vi poezias!" (Ekzemple se vi diros: "Mi morgaŭ certe venos, eĉ se vi min ne ŝatas", la nepoezienco de la ideo ne malhelpos viajn kunparolantojn senti la frazon, iel, poezia). Sed krome, en la priparolata verso, plej agrabla poezia efiko riceviĝas pro la neordinara loko de *lasta* post *abelo*, dum la normala loko konserviĝas en *lasta rozo*: la ŝanĝo rilate al la kutima vortordo kaj la intenca nesimetrio efikas literature. *Abelo lasta* situas laŭ nia mensa statistiko en la regiono "malprobabla". Tial estas neeble senti en ĝi banalajon.

Kompreneble, ne sufiĉas uzi nekutiman lingvaĵon por literaturi. Io plia, nedifinebla (ĉar rilata al la dekstra duoncerbo) krome necesas: io, kion vortoj kiel *harmonio* aŭ *bela* povas iomete elvoki. Diri

Zumas super la rozo lasta abelo lasta

estus esprimi sin nebanale, sed ne pro tio poezii.

Mi prenu duan ekzemplon, poemon de Lucien Thévenin, el
La vana kanto:

*Kiam mi revenis
al mia vilaĝo,
ne plu estis popoloj
sur la riverbordo,
kie ili staris.*

*Kiam mi revenis,
la ŝtonkruco flava
ĉe la voja rando
estis renversita,
kaj la pecoj kuŝis.*

*Mi ne plu retrovis,
kiam mi revenis,
la knabinon brunan,
kiu ludis kun mi:
ŝin la morto prenis.*

*Kaj la rozĝardeno
estas nun senflora.
Sur ĝi kreskas sole
la sovaĝaj herboj.*

Refoje: nur fundamentaj vortoj, kiujn oni facile registrus en specimenoj de la parola lingvo. Eĉ la vortordo estas preskaŭ tute tiu de ĉiutaga babilado. Kaj rimoj ne estas. La poezieco fontas nur el la ritmo kaj sentoj. Egale, ĉu tiu poemo plaĉas aŭ ne, ĝi nerebateble apartenas al la skriba lingvo, literatura.

Similajn kazojn oni povus multigi. Legu ekzemple la poemon de Lodewijk Cornelis Deij „Al la juda foririnto“, en *Esperanta Antologio* (William Auld, red.; Roterdamo: UEA, 1984, p. 375). Tiu plej kortuŝa verko uzas nur vortojn el la ĉiutaga lingvo.

Traduki: trakonduki al kompreno

Por fini ĉi tiun konsideradon, mi proponas al vi kompari la unuan strofon de la *Aŭtuna kanto* de Verlaine en la tradukoj de Pagnier, Grabowski kaj Kalocsay:

<u>Pagnier</u>	<u>Grabowski</u>	<u>Kalocsay</u>
<i>La longa plorado</i>	<i>Dum ĝeme sonas</i>	<i>La velksezon'</i>
<i>De la violonoj</i>	<i>La violona</i>	<i>Per violon'</i>
<i>De l'aŭtuno</i>	<i>Aŭtuna spir'</i>	<i>Ĝemosona</i>
<i>Vundadas la koron</i>	<i>Premiĝas koro</i>	<i>Vundas ĉe l'kor'</i>
<i>Al mi per langvoro</i>	<i>De monotona</i>	<i>Min per langvor'</i>
<i>Unutona.</i>	<i>Sopir'.</i>	<i>Monotona.</i>

La kaloĉaja teksto alte superas la du aliajn, i.a. ĉar ĝi sola perfekte redonas la ritmon de la franca originalo. Sed tiu sukceso neniel ŝuldiĝas al la uzataj vortoj. Se la lingvo fariĝus malpli grekeca kaj ni anstataŭigus lian *monotona* per *unutona*, lia traduko ne fariĝus malpli bela, kaj, inverse, tiu de Pagnier ne estus pli sukcesa, se, anstataŭ ĝia *unutona* ni dirus *monotona*. La literatura efiko fontas, ne el la vortoj, sed el la arta aranĝo de la lingvaj elementoj. Ekzemple, la kaloĉaja *velksezon'* estas genia maniero havigi poezian sinonimon al *aŭtuno*, tamen uzante nur fundamentajn radikojn.

Sed kio pri *langvoro*, kiu certe ne apartenas al la "reala lingvo"? Ni unue rimarku, ke ĝia enesto en la traduko de Pagnier ne sufiĉas por igi tiun literatura belaĵo. Kalocsay ne sukcesis eviti ĝin, aŭ ne deziris. Per tio li diferencas de la aperonta verkisto, pri kiu mi parolas ĉi-ĉapitre, ĉar tiu trovos rimedon esprimi la koncernan ideon per elementoj el la "reala lingvo".

Tion provis fari mi. Bedaŭrinde, mi havas nek la talenton de Kalocsay, nek tiun de la estonta verkisto; sekve, kiel atendeble, al mi ne prosperis. Tamen, mi sentas plej forte, ke mia neatingo ŝuldiĝas al mia manko de talento, ne al la malriĉeco de la ordinara lingvo.

Kiam mi estis profesia tradukisto, ni devis de tempo al tempo traduki poemon, jen tute, jen kelkajn versojn, jen nur unu

frazon. Ekzemple, en la Ĝenerala Asembleo de UN, ĉiuj parola-
doj estis francigataj, kaj kelkaj delegitoj, ĉefe latinamerikaj kaj
arabaj, emas enŝovi iom da poezio en siajn elokventaĵojn.

Plene fidele traduki tiajn tekstojn estas neeble. Ni do, kiel
tradukistoj, faris, kion ni povis. Kaj same faras tradukistoj, kiuj
publikigas sialingve poemaron el alia kulturo. Neniam vera tra-
dukisto ŝanĝas la lingvon aŭ enkondukas en ĝin fremdvorton,
ĉar li stumblis ĉe iu koncepto. Provante translingvigi, oni
sekvas ideon, ĝin forĵetas, kaptas alian, ĝin forĵetas, ktp, ĝis
restas kelkaj mistradukoj iom malpli misaj ol la aliaj. En
institucio, tradukisto tiam ĝenerale submetas siajn provojn al
kolegoj aŭ al reviziisto. Permesu, ke mi nun petu vin ludi tiun
rolon: decidu vi, kiu estas la malplej fuŝa el miaj fuŝtradukoj.
Verŝajne ja, eĉ se la rezulto de mia provado ne estas aparte
salutinda, interesos plurajn el vi vidi, kiavoje mi serĉis. Jen do
unu el miaj unuaj elcerbaĵoj:

La ĝema son'
De l'violon'
Velksezona
Portas min al
Korvunda pal'
Unutona.

Nia hungara famulo genie havigis al si la rimajn elementojn
necesaĵajn por bone elfrancigi la tri unuajn versojn. Kial do li ar-
bitre ŝanĝis la ordon de la ideoj, kaj per tio senutile malproksi-
miĝis de la originalo? Mi reordigis ilin, kaj faris el la *ĝema son'* la
subjekton de la verbo, kiel en la franca. Tio estas simpla apliko
de principo sekvata de ĉiuj bonaj profesiaj tradukistoj: dis-
tanciĝu de la originalo **nur**, se fidela transvortigo ne eblas, aŭ
ne respektas la spiriton de la cellingvo.

Pri *langvoro* li certe estas pli fidela, almenaŭ unuavide. Ta-
men, kun via indulgo, mi provu kiel eble plej bone advokati al
mi. La franca vorto *langueur* elvokas ian dolĉan melankolion,
mankon de forto, de vigeleco, de vivo. Benac, en sia por tiaj kon-
ceptoj ege preciza kaj nuanca *Dictionnaire des synonymes* (Pa-
rizo: Hachette, 1956), difinas ĝin dirante:

tiu vorto uziĝas pri animstato sen forto kaj sen volo, pri la mensaj produktoj senvarmaj kaj seninteresaj, pri la aferoj, kiuj havas nek aktivecon, nek movon (p. 528; elfrancigo mia).

Ni rigardu la trian difinon de *pala* en PIV; ĝi konsistas el kvin vortoj: *senviveca*, *senĉarma*, *seninteresa*, *senforta*, *senpova*. Ĉu tiuj, kune, ne elvokas ion plej proksiman al tiu *langueur*, kiun priskribas la vortaro de Benac? Kaj tamen, tiu vorto ne kontentigas: difinoj parolas nur al nia maldekstra cerbo, kaj la poezia efiko naskiĝas en ties dekstra kunulo.

Certe, kio plej ŝokos okcidentanojn en mia traduko, estas la uzo de *unutona* anstataŭ *monotona*. Sed ni ne diras *monobrakulo*, *monokolora*, *monolingva*, *monoanime*! *Unuanime* estas same metafora kiel *unutona*. Kial do tiun ne uzi, kiel oni faris dum la unuaj jardekoj de la lingvo? Mi preferas ĝin pro konsidero al la anoj de popoloj kun ne-hind-eŭropa lingvo, kaj ankaŭ ĉar la alia tuj pensigas min pri mono. Tamen mi ne volus pri tio batali: mi agnoskas, ke *monotona* apartenas al la "reala lingvo".

La teksto, kiun mi prezentis ĉi-supre, ne estas tre sukcesa. Mi nun submetos al vi tri pliajn provojn. Legante ilin, bonvolu ne forgesi, ke mia celo estas montri, ke, se traduki poemon estas neeble, nia "reala lingvo" sufiĉe riĉas por proksimigi nin al same kontentigaj solvoj, kiel en poezitraduko nacilingva. Alivorte, jenaj tradukprovoj ne estas pli malbonaj ol similaj, kiujn mi faris en la francan, kiam mi estis profesia tradukisto. La fuŝon oni do juste atribuu al mi, ne al la lingvo. Verdire, esperanton mi sentas pli riĉa kaj fleksebla ol la franca, kies literaturkapablon neniu iam ajn neis. Jen tri iom similaj trovaĵoj:

<i>La ĝema son'</i>	<i>Dum plore son'</i>	<i>La plenda son'</i>
<i>De violon'</i>	<i>De velksezon'</i>	<i>De violon'</i>
<i>Velksezona</i>	<i>Violonas,</i>	<i>Velksezona</i>
<i>Min vundas ĝis</i>	<i>Vunde en mi</i>	<i>Vundas min per</i>
<i>Kordolĉa griz'</i>	<i>Melankoli'</i>	<i>Dolĉa sufer'</i>
<i>Unutona.</i>	<i>Unutonas.</i>	<i>Unutona.</i>

Traduki poezion estas transdoni sentojn. Tial la laste citita provo aperos la plej bona, kvankam, unuavide, *sufer'* estas perfido. sento ja elvokiĝas per la tuta kun-efiko de pluraj esprimoj, ne per unu vorto. Patro plej malbone situas por juĝi sian idon, kaj mi mem do ne povas juĝi, sed mi ne mirus, se multaj legantoj opinius, ke kiam sufero estas dolĉa kaj unutona, krome naskata de violona lulado, ĝi fariĝas preskaŭ egala al tio, kion Verlaine nomis *langueur*.

La iluzio pri lingvo perfekta

Oni ne forgesu, ke por transdoni ion el unu kulturo al alia, la unua kondiĉo estas uzi vortojn komprenotajn. La ideo, ke *langvor'* pli fidelas, estas iluzia: ĝi transdonas ion nur al homoj, por kiuj la vorto estas elvok-riĉa. Por senti la harmoniojn de vorto, necesas, ke oni renkontu ĝin cent- aŭ almenaŭ kvindek-foje en diversaj situacioj kaj ĉirkaŭtekstoj. Legi la signifon el vortaro havigas al vi nenion el la etoso de la radiko: difino trafas nur, kiel ni vidis, la maldekstran cerbon, kiu estas plej indiferenta pri poezio.

Alivorte, ĉino, arabo, iranano, ruso renkontanta la vorton *langvor'* sentas sin antaŭ io senbilda, sensona, senanima. *Sufer'*, siaflanke, certe elvokas ion al la lingve matura esperantisto, kia ajn lia origina kulturo. Tiu vorto eble ne perfekte koincidas kun la verlena originalo, sed ĝi estas pli proksima, por tia leganto, ol kompleta nulvibraĵo.

Komparo helpas vin tion senti. Kion vi opinius pri la du versoj

*Gloru l'Eternulon: li bonas,
senfinas lia ĥesdo.*

Ĉu vi sentas tion esperanto? Ĉu tio elvokas ion al vi? Nu, bone, vi renkontas la vorton unufoje kaj serĉos ĝin en vortaro. Imagu do, ke vi trovas jenan difinon: **ĥesdo**: *eco de animo karakterizata per la deziro, ke la aliulo(j) disvolviĝu bone laŭ sia esen-*

co, sentu sin plej bone en etoso de respektateco; inklino donaci malavare; emo akcepti, pardoni; deziro favori iun; bonkoreco. Ĉu leginte tiun difinon, vi vibras kun la antikva hebrea poeto, kiu lirike esprimis entuziasmon pri sia Dio per la ĵus cititaj vortoj?

Estas plej dubinde. La aserto "tiu traduko plej fidelas" estus trompa, ĉar tute simple ne temas ĉi-kaze pri traduko. *Traduki* ja origine signifas „trakonduki“: gvidi la leganton tra la lingva montaro, kiu staras bare inter vi kaj la lando de kompreno. Kondukinte vin ĝis la dua verso, la gvidisto simple malaperis, lasante vin sola, limigita je viaj rimedoj (kaj tiuj rimedoj povas esti etaj-etaj: okcidentanoj facile pretervidas, ke en la cetera mondo multaj esperantistoj ne havas la monon necesan por akiri bonan, dikan vortaron).

Sed se la versoj tekstas:

*Gloru l' Eternulon: li bonas,
senfinas lia amo.*

la tra(kon)dukisto plenumis sian funkcion: li ebligis al vi sekvi la poeton, akompani ties senton, eĉ se la lasta vorto ne plene fidele komunikas la sencon de la netradukebla hebrea *ĥesed*. Fideleco en la dua kazo ekzistas, kvankam ne perfekta. En la unua, estas nur pseŭdo-fideleco.

La saman rezonon oni povas apliki al *langvoro*. Tiu vorto transdonas la senton al tro malgranda parto de la esperantokolektivo por esti akceptebla en traduko, se ni agnoskas la realon, ke ekzistas multaj esperantistoj ekster la mondo okcidenta.

Jes ja, ekzistas homoj, laŭ kiuj esperanton spirite stampas okcidenteco; por ili, ĝi radikas en okcidenta kulturo, kaj sekve rajtas senlime transpreni vortojn el latinidaj lingvoj (iom ankaŭ el ĝermanaj), sed ne el la cetero de la mondo. Mi forte dubas, ke la estonta evoluo pravigos ilin. Se, en interlingvo, validas la ideo privilegii tiun kulturon, kial ne kontentiĝi per la angla, en kiu preskaŭ ĉiuj latinidaj radikoj jam troviĝas? Aŭ per la latina? Aŭ almenaŭ alpreni interlingvon el la "naturalisma" familio, sen slava-jida spirito, lingvon, kies strukturoj ne estus fremdaj al la

hindeŭropa sistemo? La sinteno uzi esperanton, sed konstante privilegii unu kulturzonon, estas memkontraŭdira. Esperanto havas sencon nur kiel trakondukilo. Nur tiel ĝi restas *bona lingvo*. Aŭ ĝi respondos al tiu sia alvokiĝo, aŭ ĝi mortos.

Se ĉia traduko de la verlena strofo ne uzanta la vorton *langvoro* ŝajnas al vi pala, mi emos pensi, ke vin kaptis la sopiro havi en esperanto lingvon perfektan. Tia deziro estas plej natura: esperanto, eĉ se nur pro la nomo mem, vivigas esperojn, kaj unu el la esperoj kuŝantaj funde de nia koro estas eniĝi en perfektan mondon, kie ne plu estus zorgoj aŭ malagrablajoj, ĉar ĉio perfekte funkcias. Ve, tia mondo ĉi-tere estas iluzia. Perfekto estas io absoluta, kaj ni vivas nun en mondo de relativeco. Kvankam komuna kaj normala, la sopiro ĉi-vive renkonti perfektecon fakte apartenas al infana aŭ adoleskula tavolo de nia psiko; la plej matura parto de ni rezignis ĝin, ĉu entute, ĉu almenaŭ rilate al la vivo sur nia planedo, ĉi-flanke de morto.

Se ni volas pensi pri esperanto realisme kaj juste, ni devas anstataŭigi la absolutan koncepton "perfekta", niamense, per la relativa "plejbona". Se ni akceptos *langvoro* kaj similajn radikojn, la lingvo ne estos plejbona, eĉ se ĝi ebligos perfektajn elfrancigojn, ĉar ĝi ne ebligos samperfekte traduki el aliaj kulturoj. En rusaj poemoj kaj kantoj oftas la vorto *toska*. La rusa-esperanta vortaro de Bokarev tradukas ĝin per "sopiro, melankolio, angoro". Tiuj tri sufiĉe distancas unu de la alia, por ke vi komprenu, ke neniu perfekte esprimas la koncepton aŭ la sentojn elvokatajn de la rusa vorto. Por samperfekte traduki Puŝkin kiel Verlaine, ni do devus enkonduki *tosko*. Sed kio pri la portugala *saudade*, pri la angla *gloom*? Kaj pri la multaj francaj vortoj aliaj ol *langueur*, por kiuj mankas absolute ĝusta traduko?

En la francan ne eblas perfekte traduki la esperantan *sopiri*. La lingvo tamen bonege funkcias literature. Saĝeco kaj sentomatureco postulas, ke ni rezignu nian deziron je perfekta interlingvo. Ni havas lingvon ege riĉan, pli riĉan kaj pli flekseblan ol multaj grandliteraturaj lingvoj, kiel montras multaj niaj reallingvaj tradukoj. Kiel poezia traduklingvo, ĝi superas ĉiun, kiun mi sufiĉe scias por povi juĝi. Ke ĝi ne estas perfekta, tio ne estas manko; tio igas ĝin pli homa: *bona lingvo*.

Pliaj tradukprovoj

Sed ni revenu al Verlaine. Jen kelkaj aliaj provoj:

<i>Aŭtunsezono'</i>	<i>La ĝema sono'</i>	<i>La plenda sono'</i>
<i>Per violono'</i>	<i>De l'violono'</i>	<i>De l'violono'</i>
<i>Plende sonas,</i>	<i>Velksezone</i>	<i>Velksezone</i>
<i>Kaj vunda lul'</i>	<i>Vundpelas min</i>	<i>Vundas min ĉe</i>
<i>Al dolĉa nul'</i>	<i>Al koroŝlim'</i>	<i>Koro per ve'</i>
<i>Min fordonas.</i>	<i>Unutona.</i>	<i>Unutona.</i>

Singulta sono'
De violono'
Velksezone
Min vundas plu
Per kor-enu'
Unutona.

Mi ne kontrolis pri ĉiuj pecoj, sed la laste prezentita enhavas nur vortojn el la Fundamento. Ankaŭ la plimulto el la aliaj, plej probable. Kvankam, kiel dirite, farinto mem ne povas objektivite juĝi, ĉi tiu lasta ŝajnas al mi tre fidela al la originala verlenajo, kaj forme, kaj sence, kaj etose. Ĉiuj konceptoj/elvokaĵoj de la originalo troviĝas en ĝi, escepte de la "longeco" de la plorsingultado, kiun ankaŭ Kalocsay ellasis (se vi trovas, ke *singulta long'* aŭ *singultolong'* estas komprenebla, aŭ almenaŭ elvokas ion, ni povus tiel korekti la unuan verson kaj ricevi vere senmankan tradukon; fakte, la vorto *plu* iom esprimas tiun ideon miatekste). Krome, ili staras en ekzakte la sama ordo, kiel en la franca strofo, la senco estas ĝuste redonita, kaj la ritmo muzikas precize kiel en la verlenajo.

Mi ne kapablas same fidele traduki poemon el alia lingvo en la francan. Kiom ajn neperfekta mia rezulto, ĝi do estas por mi pruvo, ke la fundamenta lingvo pli riĉas kaj flekseblas ol mia gepatra, kaj mi rajtas pri tio paroli surbaze de efektiva sperto: mi estis multjare profesia francigisto.

Espereble, kia ajn via juĝo, vi konkludos el tiu provado, ke, se mi ne sukcesis, ne kulpas la "reala" esperanto. Ĝi estas ege riĉa, ĉar, kontraste kun multaj lingvoj, ĝia povo kombini estas senfina, kaj vi do povas senfine interŝanĝi la esprimojn, kiuj prezentiĝas al via menso. En la ĉi-supraj specimenoj, se ne plaĉas al vi *singulta*, vi povas anstataŭigi ĝin per *plorgema* el alia provo. Vi povas interŝanĝi la tri unuajn versojn de la lasta provo kun tiuj de la du antaŭaj. Ktp ktp. Jes, nia "reala lingvo" havigas al tradukisto ege pli ampleksan rimedaron ol la franca. Tiu formo de esperanto povas servi literature. Sed nur je la kondiĉo, kiun ĉiu arta agado postulas: oni havu talenton.

Tri interesoj samdirekte kunfluas

Talento karakterizos la reallingvan verkiston. Mi ripetu: mi ne dubas, ke tiu aperos. Lian intervenon postulas la tuta sociohistoria evoluo, kiu ebligis al esperanto enkarniĝi en Zamenhof kaj poste tutmonde disvastiĝi sub nekredeble malfavoraj cirkonstancoj, iom post iom amasigante la elementojn necesajn por iĝi la mirinda, literaturgraveda lingvo, kiu ĝi nun estas. Eble tiu porpopola verkisto jam ekzistas kaj verkis. Eble li aŭ ŝi nur devas nun konsciiĝi pri la fakto, ke lia persona intereso, la intereso de la popolo, kaj la intereso de la lingvo kunfluas samdirekte.

Lia persona intereso, ĉar tia verkado havigos al li plezuron, kaj eble ankaŭ famon. Serĉi la propran gloron influas negative, se tio estas la ĉefcelo, ĉar oni tiam volas superi, dum lingvo-progresiga verkisto ĉefe devas servi al io pli alta ol li. Ĉe famserĉanto, personaj konsideroj sufokas respekton al la kolektivaj, al la sociaj, alivorte al la legantaro kaj al la lingvo. Sed se famo estos, ne precipa celo, sed normala rezulto de bona verkado, ĝi estos ĝuebla kaj ĝuinda.

La popola intereso, ĉar la kolektivo deziras povi legi plaĉan literaturon, kiu ne devigas havi vortaron ĉe-mane. Kaj ĝi ege sopiras retrovi sian lingvaĵon, senorname beligita, altigita nur per talento. Oni identigas sin al sia lingvo. Se mia lingvo estas pli bela ol mi kredis, mi apartenas al io pli bela ol mi kredis, mi do iel

estas pli bela ol mi kredis. Homo, kiu legas *sian* esperanton, en formo pli arta, sed ne pli komplika, ol li mem povas uzi ĝin, sentas sin portata supren. Kaj homoj ŝatas tiun senton. La vivo tro ofte ja tenas ilin grundnivele.

La intereso de la lingvo, ĉar la lingvo emas evolui laŭ sia esenco. Se, sur io vivanta, kio komencis kreski, vi konstante greftas elementojn forŝiritajn el aliaj vivajoj, vi kreas monstron. Nutri sin ĉerpante el la ĉirkaŭa medio, dum oni tro malfortis por havi en si ĉion necesan, estas unu afero; sed stabiliĝinte kiel iu sana kaj fortika, travivi perfortan engluton de nenecesaj nutraĵoj estas alia. La lingvo deziras eleganti, ne elefanti, ne dikiĝi tigrade, ke ĝi tra-mamutu al si la vojon estontecen. La verkisto, kiu talente uzos ĝin, kia ĝi nun estas, servos ĝin kiel neniu antaŭe.

La generacioj dankos lin, aŭ ŝin. Ĉar ili estos regalitaj per mirinda donaco: *bona lingvo*.

POSTPAROLO AL LA DUA ELDONO

La aperon de la unua eldono de *La bona lingvo* sekvis por mi tri surprizoj: (1) tiu libro tre rapide disvendiĝis; (2) mi ricevis pri ĝi pli ol centon da leteroj, kio estas alta proporcio rilate al la eldonkvanto; (3) multaj recenzoj misatribuis al mi ideojn kaj sintenojn, kiujn mi ne havas kaj kiuj nenie troviĝas en la verko.

Naŭdek kvin elcentoj el la leteroj esprimis ĝeneralan aprobon, eĉ se pluraj ankaŭ montris malkonsenton pri tiu aŭ alia punkto. Multaj skribintoj akcentis, ke tian libron ili delonge atendis. Perceptiĝis ia senpeziĝo, kvazaŭ ili dirus: „Uf! Finfine libro pri Esperanto, kia ni ĝin uzas, konas kaj amas!“ Ili montris klare, ke ili perfekte komprenas, en kiu spirito la libro estis verkita.

Des pli strange do impresis la recenzoj. Unu, ekzemple, vidis en *La bona lingvo* serion da „akuzoj, kulpigoj, pafoj kaj ofendoj.“ Alia titoliĝas „Pledo por bona lingvo“. Tria diras, ke „Piron evidente konsideras sian libron samtempe defendo kaj atako kontraŭ ĉiuj tendencoj plivastigi la vortprovizon de Esperanto el ekstere“. Kvara trovis, ke „plaĉas al lia orgojlo fari Prof. Warinĝien la cel-tabulo de siaj atakoj kaj merdumadoj“... Kontraste al la leterskribintoj, por kiuj la verketo estis nur io priskriba kaj sentoesprima, multaj recenzintoj lokis ĝin en la sferon de potenciluktoj, konfliktoj, individua konkurado kaj nepra volo influi.

Nu, kontrolinte la presprovaĵojn de ĉi tiu dua eldono, mi legis la tekston speciale por vidi, kie mi defendas, pledas, atakas, pafas, kulpigas aŭ ofendas. Tiajn lokojn mi ne trovis. Eble estos interese, ke ankaŭ vi, kara leginto, kontrolu atente, ĉu tiuj sintenoj aperas en la libro aŭ ĉu ili troviĝas nur en la imago de la recenzintoj. Verŝajne vi konstatos, ke nenie mi rekomendas unu formon de Esperanto prefere al iu alia, nenie mi malkonsilas uzi neologismojn, neniun mi atakas aŭ volas ofendi. Mi faras kvar aferojn:

(1) Mi provas difini la spiriton de la lingvo kaj noti, kio, ĉe lego aŭ aŭdo, aperas plaĉa aŭ malplaĉa al la ordinaraj uzantoj.

(2) Mi provas analizi la faktorojn, kiuj influas la lingvon.

(3) Mi esprimas miajn sentojn kaj preferojn, ofte emfazante, ke ili estas subjektivaj.

(4) Mi diras, kien, laŭ mia subjektiva rigardo, la lingvo evoluas, t.e., kiu formo de lingvo plej probable firmiĝos, kaj kio, plej probable, elfalos el la lingvo.

Alivorte mi tenas min sur tereno *priskriba*, ne *preskriba*. Kial tiom da recenzintoj tion misperceptis?

Estis tre strange por mi malkovri, ke, kiam mi esprimas preferon aŭ opinion, kelkaj taksas ĝin rekomendo, aŭ atako al tiuj, kiuj preferas aŭ opinias kontraŭe. Kia miriga sinteno! Se mi diras: „Mi ne ŝatas la dolĉan kaŭkazan ĉampanon“, tio neniel subdiras: „Neniu trinku tian ĉampanon“, „Ni almilitu la kaŭkazĉampanemulojn“, „Nur nekaŭkaza kaj nedolĉa ĉampano estas trinkinda“. Estus komike rigardi mian gust-esprimon „pledo por franca ĉampano“ aŭ el ĝi konkludi, ke „Piron evidente konsideras sian diron samtempe defendo kaj atako kontraŭ ĉiaj tendencoj plivastigi la trinkadon de dolĉa kaŭkaza ĉampano“. Ke la koncerna ĉampano ne plaĉas al mi, tio estas fakto, kiun mi konstatas, kiam mi observas min. Kiam mia plej juna filino, kiu laboris en Kaŭkazo por la Internacia Ruĝa Kruco, entuziasme lirikas pri tiu por ŝi plej ĝuinda vino, venus nek al ŝia kapo nek al la mia la ideo, ke unu el ni pravas kaj la alia mal-. Por ni estas evidente, ke gusto, per sia naturo mem, ne povas validi por pli ol unu persono. Kiam mi diras, ke mi preferas *malnova* al *olda*, ke mi trovis ĝin pli bona, mi esprimas ion personan, pure informan; ke oni povas vidi en tio pledon por *malnova* aŭ rekomendon eviti *olda* estas por mi ege mistere, des pli ĉar mia subjektiveco estas ripete emfazata, plej eksplicite, en la libro. Alivorte, miaj diroj pri la lingvo estas invito dialogi: „Jen kion mi opinias, kion mi preferas. Diru al mi, kion vi opinias, kio plej plaĉas al vi; mi promesas, ke tion mi respektos, eĉ se vi pensas aŭ sentas tute malsimile.“ Verŝajne mi ne estis sufiĉe klara, se tiom da recenzintoj miskomprenis min.

Nu, miskomprenado estas io ofta kaj neevitebla en homaj rilatoj. Mi do nenion riproĉas al tiuj, kiuj misperceptis mian sintenon. Mia reago estis nur granda miro, ĉar ion similan mi tute ne atendis.

Tamen, kvankam mi esence tenas min je la samaj ideoj kiel en 1989, se mi verkus hodiaŭ, la libro estus plurrilate malsama. Ekzemple mi komentus multe pli mildavorte tion, kion mi perceptas kiel la misjuĝojn de Kalocsay kaj Waringhien. Dank' al pluraj leteroj, mi vidas pli klare hodiaŭ, kiel ilin markis ilia medio, en kiu la greklatina kulturo aperis klare supera, kvazaŭ evidenta modelo. Al tiu ili deziris kiel eble plej multe tiri Esperanton, ĉar ili timis, ke ĝi ne sukcesos teni sin viva sub la lavango de intelektulaj kritikoj pri ĝia „barbara“ naturo, kiun oni do civilizu, t.e. greklatinigu.

Fakte, pri Waringhien grandparte temis la kritikaj partoj de la leteroj, kiujn mi ricevis. Kelkaj korespondantoj ne rimarkis, ke mi esprimas miajn reagojn, ne pri lia persono, sed pri liaj starpunktoj kaj pri la potenco, kiun la Esperanto-kolektivo havigis al li. Feliĉe, Waringhien estis iu anime tre granda. En letero de la 28-a de decembro 1990, li esprimis al mi sian estimon kaj, per plej klara frazo - „Min ne vundis via libro“ - forigis miajn dubojn pri tio, ĉu, kiel pluraj skribis al mi, mi ofendis lin. Li klare akceptis, ke la fakto vekis indignon ĉe iu ne signifas, ke la indignanto ĉesas respekti kaj alte taksi. Por Waringhien kiel por mi, estas grandega diferenco inter kritiko kaj atako, inter forta esprimo de negativa sento *pri limigita aspekto de ies agado*, kaj malica, venenplena insulto al *persono*, kiun oni surtretas, sin-altige. Kritiko egalas al atako nur por iu, kiu sentas sin perfekta. Kiu akceptas, ke fuŝo estas io normale homa, kion plene eviti ne eblas, tiu trovas normala, ke aperu kritiko, egale ĉu tiu estas prava aŭ malprava. Ke Waringhien trovis min malprava, kaj mi lin, tio ne gravas: disopinio ne rompas amikan rilaton. Kaj tamen mi bedaŭras la tonon, kiun mi uzis pri li en la sesa ĉapitro. Kvankam mi konservas la saman opinion pri tio, ke pri multaj punktoj li mistaksis Esperanton, se mi nun reverkus la libron, mi esprimus min alistile. Nu, se legantoj indignos pri la maniero, laŭ kiu mi traktis lin, mi akceptos ilian reason komprene, kaj certe ne ofendiĝos.

Eble la leganto sin demandas, ĉu entute havas sencon verki libron subjektivan, en kiu esprimiĝas nur gustoj, sentoj kaj ideoj nepruveblaj. Mi opinias, ke sur la kampo de lingvo, jes, tio havas sencon. Ĝuste ĉar sur tiu tereno estas ege malfacile ob-

jektivi, eble eĉ nefareble, komparo de la malsamaj subjektivecoj ŝajnas al mi la sola maniero iom progresi al rigardo objektiva. Multaj juĝoj pri la lingvo troveblaj en PIV, en PAG, en *Parnasa Gvidlibro*, en multaj lernolibroj kaj similaj verkoj fakte estas subjektivaj, kvankam ofte ili prezentiĝas kun aŭtoritata tono. Prezento de alia subjektiva vidpunkto povas helpi konsideri ilin laŭ pli ĝusta, relativa perspektivo.

Cetere, la tre favora akcepto, kiun la Esperanto-publiko havigis al la unua eldono, montras, ke ĝi ne taksas senutila tian subjektivan aliron. Sed egale ĉu vi, kara leginto, aprobas aŭ ne tiun manieron fari, mi esperas, ke vi ĉerpis el ĉi tiu verketo plezuron kaj mensan stimuladon. Eble eĉ, leginte ĝin, vi pli amos nian lingvon kaj havos pli grandan fidon al ĝia estonteco. Se tiel, mi sentos min des pli danka al la eldonisto, kiu instigis min verki.

Claude Piron

ENHAVO

Enkonduke	5
La spirito de la lingvo	14
Natura sin-esprimado	32
Emo difini, emo elvoki	44
La arto de vortfarado	57
Ies malvido, fido mia	67
Bona lingvo literatura	88
Postparolo al la dua eldono	105

ALIAJ VERKOJ DE CLAUDE PIRON
haveblaj ĉe IEM

Pri Esperanto

☆ **Esperanto el la vidpunkto de verkisto.** 16 p. (Esperanto estas speciale taŭga ankaŭ por literatura verkado.)

Noveloj, romanoj

- ☆ **Ĉu vi kuiras ĉine?** 135 p. (la tria eldono de la unua romano el la fama krim-serio)
- ☆ **Dankon, amiko!** 36 p. (aventura romaneto en facila Esperanto)
- ☆ **La dorsosako de panjo Rut'.** 109 p. (noveloj de S.J. Bako kaj C. Piron)
- ☆ **La kisa malsano.** 78 p. (aventura romaneto en facila Esperanto)
- ☆ **Tien.** 140 p. (romano)

Instruiloj por franclingvanoj

- ☆ **Sen pardono.** Récit bilingue traduit et commenté. Lecture pour débutants. 20 p. (C'est dès la fin de la première leçon que l'on peut lire ce récit, qui traite de la fièvre du loto.)
- ☆ **Vivi estas miri.** 114 p. (Vivre, c'est s'étonner. Récits bilingues traduits et commentés. Lectures pour débutants)

ALIAJ LIBROJ HAVEBLAJ ĈE IEM
(iama eldonejo Pro Esperanto + IEM)

Pri Esperanto

- ☆ **Aktoj de la Internacia Scienca Simpozio „Esperanto 100-jara“.** Universitato de Vieno, 28. - 30.10.1987. (Tiu simpozio estis la plej grava scienca aranĝo en la jubilea jaro. Prelegoj kaj resumoj de la diskutoj.)
- ☆ Beckmann, Karl: **Historio de Esperanto.** AEI. 2-a aktualigita eld., 16 p.
- ☆ **La Internacia Esperanto-Muzeo.** Historio, taskoj, perspektivoj. 24 p.
- ☆ Mayer, Herbert: **La eterna neologisma diskuto.** 26 p. (pri la transpreno de novaj vortoj al Esperanto)

Originala Literaturo

- ☆ Becker, Ulrich: **La aĵoj kaj la sezonoj.** 114p. (rakontoj)
- ☆ Fernández, Miguel: **El miaj sonoraj soloj.** Poemoj 1992 - 1995. 100 p.
- ☆ **Glaŭka lum'.** Geja antologio. Poemoj. 88 p. (originalaĵoj kaj tradukoj)
- ☆ **Ibere libere.** Poemoj de G.Neves, G.Kamaĉo, L.Dek, M.Fernández. 136 p. (moderna poezio en Esperanto)
- ☆ Leser, Jolanthe: **La vivo estas pli forta.** 36 p. (noveloj de aŭstra verkistino)
- ☆ **La maŝino kiu kriis.** Rakontoj pri strangaj fenomenoj. Vol. 1. (multaj aŭtoroj, i.a. Boulton, Piron, Steele...) 105 p.
- ☆ Matthias, Ulrich: **Fajron sentas mi interne.** 100 p., (romano pri junulo kaj Esperanto)
- ☆ Montagut, Abel: **Karnavale.** Miksita rakonto. 65 p.
- ☆ Montagut: **Poemo de Utnoa.** Epopeo. 225 p. (Epopeo estas kva-zaŭ romano en versa formo. Unu el la literature plej bonaj libroj verkita en Esperanto! Ĝi rakontas la savon de la mondo kontraŭ pereiga diluvo.)
- ☆ Salovaara, Eija: **Kie boacoj vagadas.** 96 p. (noveloj el Finnlando)
- ☆ Steele, Trevor: **Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen.** 152 p. (Romano pri Germanio en la jaro 1968. Steele verkas en riĉa kaj modela Esperanto. Tre taŭga por perfektigi siajn lingvosciojn.)
- ☆ Steele: **Falantaj muroj** kaj aliaj rakontoj. 160 p.
- ☆ Steele: **Memori kaj forgesi.** 144 p. (noveloj pri Aŭstralio)
- ☆ Štimec, Spomenka: **Geografio de miaj memoroj.** 140 p. (rakontoj pri esperantistaj vojaĝoj)

- ☆ Ŝtimec: **Kroata milita noktlibro**. 104 p. (rakontoj pri la absurdo de milito en kontrasto al la Zamenhofaj idealoj)
- ☆ Ŝtimec: **Tena. Hejmo en Mez-Eŭropo**. 104 p. (prozo pri la viv-destinoj en la unua duono de la 20-a jarcento en Kroatio)
- ☆ **Vienaj legendoj antikvaj kaj originalaj**. 40 p., ilustrita. (4 antikvaj kaj 3 modernaj legendoj)

Originala Literaturo Klasika

- ☆ Baghy, Julio: **Verdaj Donkiĥotoj**. 175 p. (Tiu volumo enhavas la romanon "Paŭlo Paal" kaj la karikaturajn "Rondo familia", en kiu Baghy trafte pentras la pratipojn el la Esperanto-movado.)
- ☆ Bulthuis, Hindrik Jan: **Inferio**. 153 p. (scienc-fikcia romano el la jaro 1938)
- ☆ Bulthuis: **La vila mano**. Repr. 310 p. (fantomromano kun komikaj trajtoj, *vortolisto kun nederl., franca, angla kaj germana tradukoj*)
- ☆ Cart, Théophile: **Vortoj de Théophile Cart**. Eseo. Repr. 140 p. (prilingvaj artikoloj de la fama franca esperantisto)
- ☆ Engholm, Stellan: **La lupo sur Kapitolo** kaj aliaj noveloj. 93 p.
- ☆ Emba (= Imre Baranyai): **Maria kaj la grupo**. 2-a eld. 172 p. (originala romano kun Esperanta temo: la Esperanto-movado, 1-a eld. 1936)
- ☆ Kalocsay, Kolomano: **Versojn oni ne aĉetas**. 64 p. (poemaro)
- ☆ Meye, Richard: **La longa vojo**. 141 p. (romano pri la vivo de vagabondoj; klasika Esperanto facile komprenebla)
- ☆ Privat, Edmond: **Pri Esperanta literaturo**. 4-a eld. 31 p. (grava dokumento pri la frua Esperanto-literaturo)
- ☆ Privat: **Tra l'silento**. 4-a eld. 28 p. (poemaro)
- ☆ Ŝirjaev, Ivan G.: **La dormanta grafino** kaj aliaj noveloj. Plena Verkaro 1. 157 p. (Ŝirjaev estis Esperanto-pioniro en Ruslando. La eldonado de lia verkaro malkovras, ke li dece meritas honoran lokon en nia literatura historio.)
- ☆ Ŝirjaev: **La nova vivo**. Plena Verkaro 2. 80 p. (romano pri nova ŝanco en la vivo de fervojgardisto, verkiĝis ĉirkaŭ 1920)
- ☆ Ŝirjaev: **Sen titolo**. Plena Verkaro 3. 336 p. (Eble la **unua originala romano**. Ĝi verkiĝis ĉirkaŭ 1900. Temo: Vivo de Esperanto-pioniroj en Rusujo.)

Originala Literaturo Tradukita

- ☆ Steele, Trevor: **Remember and Forget**. 123 p. (anglalingvaj traduko kaj adapto de **Memori kaj forgesi** fare de la aŭtoro mem)

Zamenhofa Libraro

☆ Zamenhof, Ludoviko L.: **Lingvaj respondoj**. 130 p. (La fama kaj utila verko de Zamenhof. Ĝin prikomentis Gaston Waringhien.)

Instruiloj

- ☆ Mayer, Herbert: **Esperanto. Eine Einführung in die moderne Umgangssprache**. 3., wesentlich erweiterte Aufl., geeignet fürs Selbststudium und für Gruppenunterricht. 144 Seiten + kasedo
- ☆ Mayer: **Grammatik Esperanto**. 86 Seiten
- ☆ Mayer: **Sprache in Situationen. Sprachführer Esperanto - Deutsch**. 24 Seiten. (frazaro utila ankaŭ por lernantoj de la germana!) + kasedo
- ☆ Mayer: **Esperanto-Lesebuch**. 182 Seiten (mit Wort- und Grammatikerklärungen und Übungen) + kasedo
- ☆ Mayer: **Grundwortschatz Esperanto**. Ein Lernwörterbuch. 88 Seiten
- ☆ Maul, Stefan: **Falsaj amikoj. Schwierigkeiten im Wortschatz Deutsch - Esperanto**. Für Anfänger, Fortgeschrittene... Wesentlich erweiterte Auflage. 28 Seiten.

Revuo

☆ **La Dua Jarcento de Esperanto**. Interkultura revuo en Esperanto. Aperas 4-foje en la jaro.

Kial eblas diri pri Esperanto, ke ĝi estas psikologie, socie, morale, arte, strukture bona lingvo? Kie ĝi situas en la mondhistorio de la lingvoj? Kien ĝi evoluas? Ĉu ĝi nun estas kolektiva fenomeno pli potenca ol la decidoj de iu ajn individuo aŭ institucio? Ĉu principoj neniam klare difinitaj fakte regas la ekvilibron de la lingvo, nekonsciante? Ĉi tiu verko, kies unua eldono furoris, traktas pri tiuj kaj multaj aliaj punktoj, kiuj malfermos por la leganto novajn vojojn de prilingva pensado. Postparolo verkita por ĉi tiu dua eldono pritraktas la tre viglajn reagojn al la unua.



-IEM-
